

Sennacieca Revuo n-ro 147 2019



Sennacieca
Asocio
Tutmonda

En ĉi numero

Esprimlibero
per
presdesegnoj

Dediĉe al Jean Sella

Marcelo Redoulez




Bild-Deliraĵo far Sir', kun Zorhof, karikaturo de Zaza.

Supplément au n° 11-12 (1373-1374)
de Sennaciulo

ISSN 1248-2293

Sennacieca Revuo estas eldono de SAT

Asocia sidejo de SAT

67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio

Telefono: (+33) 09 53 50 99 58

kontakto@satesperanto.org

www.satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n-ro 1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064; BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: satx-s

Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo

Vic-prezidanto: Pedro Sanz

Sekretario: Diana Riŝar

Kasisto: Bruno Henry

Vic-kasisto kaj eldonestro: Guy Cavalier

Ceteraj membroj: Paz (Jung Hyunsoo), Dieter Rooke, Dominiko Simeone

Reprezentantoj de SAT en la LEA-Komitato: Paz kaj Dieter Rooke

Sennacieca Revuo

Redaktoskipa kunordiganto: Vinko Markovo

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'

Ceteraj redaktantoj: Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Marcelo

Redulez, José Maria Salguero (Kani), Pedro Sanz, Rikardo Schneller, Franciska Toubale

*Kontribuojn por ambaŭ gazetoj sendu
elektronike al*

sennaciulo.redaktejo@gmail.com

aŭ paperpoŝte al

SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent-Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Publikigo de artikolo ne signifas, ke ĉiuj redaktoskipanoj konsentas pri ĝia enhavo.

Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par: TROIS A, 4 rue Théodule-Ribot, FR-75017 Paris.

Parution annuelle. *Aperas ĉiujare.* Le directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel — *Jara abono*: Francio 39 eŭroj

Autres pays — *Aliaj landoj*: vidu la detalojn en la kotiztabelo presita en *Sennaciulo*.

Dépôt légal à la date de parution: n-ro CPPAP 0515 G 86567

Suppl. au n° 11-12 (1373-1374) de *Sennaciulo*

Prezento

La redaktoskipo

Karaj legantoj,

Jen la numero 147 el *Sennacieca Revuo*, enpaĝigita komence de 2020 surbaze de materialo kolektita kaj korektita ĝis la fino de 2019. Ĝin malfermas artikolo de Marcelo Redoulez. Okaze de la 5a datreveno de la buĉado de la karikaturistoj de la satira franca gazeto *Charlie Hebdo*, li detale esploris la historion de presdesegnoj, inkluzive de ĝia esperanta flanko. Alia temo ligita al la nun estas la priskribo de Vatto, unu el la monunuoj uzitaj por lokaj interŝanĝoj en Japanio. Ĝin prezentas Huzimaki Ken'iti. Poste Nikolao Gudskov resaltigas nin al la mezo de la 19a jarcento, pripensante la evoluon de inteligentularo en Rusio, ĝis la nuna epoko. Sekvas kontribuo de Ester Boquera, kiu rekte prezentis siajn esplorojn pri la uzo de Esperanto flanke de la Komisariato pri Propagando de la Kataluna Registaro dum la Hispana Enlanda Milito (1936-1939) okaze de la 92a SAT-kongreso en Barcelono. Alian perspektivon pri la rilato inter universaleco kaj nacia kulturo proponas la esploro de Miguel Fernández, pri la verkista triopo Buñuel-Lorca-Dalí. Ni poste plu antaŭeniras en la dudeka jarcento kun aro da rakontoj de atombombitoj el Hiroŝimo kaj Nagasako, kolektitaj de Hori Jasuo, lige al la konstato pri malrapida ratifado de la tutmonda traktato pri malpermeso de nukleaj armiloj.

Ni esperas, ke la tralego de la ĉi-jara artikol-kolekto estos al vi agrabla. Kaj ankaŭ, ke ĝi instigos vin viaŭvice funkciigi viajn klavarojn, fotilojn kaj desegnojn, por nutri la postan numeron.

Esprimlibero per presdesegnoj

Dediĉe al Jean Selle

Marcelo Redoulez

Tute nature pro ĝia esenco presdesegno rigardas la aktualaĵojn per propra flanka vidpunkto. Ĝi ĝenerale celas provoki, pripensigi, emociigi aŭ/kaj ankaŭ denunci. Tial ĝi kaptas la atenton de la leganto kaj ne lasas lin/ŝin indiferenta. Foje publikigita sub formo de ilustraĵo, eblas ankaŭ, kaj tio plej oftas, ke ĝi prezentas aktualaĵon sub formo de karikaturo. El la itala «*caricare*» signifanta «*ŝarĝi*», karikaturo celas akcente troigi la karakterizojn, la ĉefajn trajtojn de vizaĝo. Tial la arto de la presdesegno paralele kompareblas kun tiu de la karikaturo. Ĉu ne?

Se kredindas, ke karikaturistoj esprimiĝis, kiam demokratio tion permesis al ili, historio povas malpravigi tiun aserton. Sed bedaŭrinde eventoj tra la mondo de nia 21a jarcento montras, ke la fundamenta rajto libere esprimi sin, ĉie malprogresas. En aŭtoritataj reĝimoj desegno povas endanĝerigi la vivon de ĝia aŭtoro. Tamen ne nur tie. Ankaŭ en demokratiaj landoj. Amnestio Internacia observas, ke tiu libero estas ofte oferita nome de sekureco, naciaj aŭ religiaj tradicioj, aŭ pro lukto kontraŭ terorismo. En 2015 presdesegnistoj per sia vivo pagis sian rezolutecon senrimene profesie karikaturi. Ĉu esperantistoj same riskus?

Presdesegno kaj karikaturo, difinoj tra la historio



Karikaturo de Antonio Vivaldi far Pier Leone Ghezzi

La unuaj spuroj pri karikaturo troviĝas en antikvaj tempoj. Jam grekaj potoj misformis iujn personaĵojn por kontraŭi la tiamajn estetikajn belmodelojn. Mezepoke, groteskaj personaĵoj, fantastaj kaj simbolaj bestoj, alegorioj vidiĝas inter la skulptaĵoj sur la muroj de la preĝejoj. Renesance, dank' al disvolviĝo de diversaj gravurformoj, karikaturo kaj satiraj desegnoj multobliĝas. Karikaturarto iĝas profesio personigita de Pier Leone Ghezzi (1654-1755), kiu libere vendis siajn desegnojn en Romo. Aliaj fontoj citas desegnon publikigitan en la gazeto *Pennsylvania Gazette* [1] kiel komencon de la politika karikaturo kiel ĝenro.

Kun la teknika revolucio dum la 19a jarcento, presado industriiĝas kaj la presdesegnoj de tiam trovis sian lokon en la gazetaro. Kaj tiel tiu artoĝenro famiĝas. El la politikaj agitadoj fontas nekonsidebla inspiro: Napoleono la 1a, la reĝoj Ludoviko la 18a, Karolo la 10a, Ludoviko-Filipo, Napoleono la 3a sinsekvas kiel regantoj de Francio.

Tamen, temante pri imperiestro aŭ reĝo, indas respektigi ilian aŭtoritatecon. Plimultiĝas la malpermesoj direkte al la desegnistoj. Kaj kelkaj el ĉi-lastaj pagis pro sia insolenteco. Ekzemple Daumier (Domje'). Konsiderata kiel unu el la plej vervaj karikaturistoj de sia epoko, li estis arestita kaj kondamnita je sesmonata arestado en malliberejo pro sia publikigo, la 16an de decembro 1831 en la gazeto *La Caricature*, de desegno montranta



Honore Daumier: Gargantueca reĝo voranta la impostojn

la reĝon Ludoviko-Filipo sub la trajtoj de Gargantuo [2], voranta impostojn.

De tiam la desegnoj ne plu fronte atakas sed insinuas. Samtempe ili turniĝas pli ĝenerale al karikaturo de la moroj, kaj la kreado de popolaj personaĵoj. Ili pli larĝe kritikas la socion kaj ne plu la misojn de nur unu homo. Ili kreas rolulojn, reprezentantojn de la diversaj sociaj tavoloj de la 19a jarcento. Nur dank'al abolo de la leĝoj rilate la presadon en Francio, la 29an de julio 1881, la presdesegnistoj finfine povos tie, tute libere, esprimi sian arton.

Fronte al cenzuro

La 20a jarcento kaj ĝiaj militoj kunigas la karikaturistojn. De 1919 ĝis 1939, la postmilita amara stato, la modo, la politikaj krizoj, la internaciaj aferoj, la Popola Fronto ebligas al la karikaturistoj grupiĝi en similaj bataloj. Post la dua mondmilito, multaj engaĝitaj aŭ radikalaj gazetoj iom post iom malaperas. Paralele stariĝas vere ĝeneralema gazetaro. Tiam la presdesegnistoj mem limigos sin. Kaj la polemikoj rilate la karikaturajn publikigitajn en *Charlie Hebdo* komence de la 21a jarcento pruvas, ke la presdesegnistoj konservis esprimliberon nur tre relativan.

1. Hodiaŭa situacio

De la 6a ĝis la 8a de novembro 2019 okazis en Strasburgo la 8a *Forum mondial de la démocratie* (Monda Forumo por Demokratio) kun ĉi-jara temo: la presdesegnarto. Pri tio raportis la televida tagĵurnalo, elsendo de la franc-germana ARTE-TV [3]. Kvardeko da presdesegnistoj el la tuta mondo estis tie invititaj por paroli pri sia profesio kaj ĉefe defendi la rajton karikaturi, pli kaj pli mistraktata en la mondo. Cenzuro restas ĉiutaga defio por multaj el tiuj profesiuloj, subtenitaj de la asocio *Cartooning for Peace* [4] kreita de Plantu [5] antaŭ proksimume dek jaroj.

Efektive, 2019 restos kiel malhela jaro por la presdesegnistoj en la tuta mondo: abundis cenzuroj, arestadoj, policaj juĝoj en la plej aŭtoritataj landoj, sed al tio nepras nun aldoni la perforton de la sociaj retoj, kaj la memcenzuro, kiu severas en niaj demokratiaj landoj. La svisa desegnisto Chapatte viktimas pro tio: la pasintan unuan de julio la gazeto *New York Times* decidis forviŝi ĉiujn presdesegnojn el siaj paĝoj, post publikigo de alies karikaturo, kiu vekis polemikon. Tial la laborkontrakto de Chapatte estis interrompita post dudek jaroj da bonaj kaj fidelaj servoj.

Chapatte mem komentas: «La decido de NYT fakte ekvivalentis elimini ĉiujn mesaĝistojn, presdesegnistojn, ĉar unu mesaĝo, unu presdesegno misevoluis. Jen turniĝo al la preventa memcenzuro. Tio estas malkvietiga. Se ni preventive memcenzuras nin, por resti politike akceptebla, aŭ pro la sociaj retoj, ni riskas morgaŭ vekiĝi en mondo sen humuro.»

Kiel fronti al tiuj insidaj malamikoj, kiuj mondscale verŝadas fimisaĵojn per la sociaj retoj? Jen unu el la temoj pritaktitaj dum la renkontoj okaze de la forumo organizita far *Cartooning for peace*, dum kiu, ĉiu povis esprimi siajn alfrontitajn malfacilaĵojn. La usona ĵurnalistino Ann Telnaes estis en 2016 celo de intrigo per Tvitero, ĉar ŝi karikaturis usonan senatanon.

Ann Telnaes raportas: «Mi memoras, mi sidis antaŭ mia komputilo, kaj mi rigardis mian Tviteran mesaĝaron, kiu furore sinsekvis kiel valoroj sur ekrano de monmaŝino, kaj elverŝas hatajn mesaĝojn. Tiam ĉar temis pri nova fenomeno, mi nenion respondis, mi restis silenta sur la sociaj retoj. Sed hodiaŭ mi alimaniere vidas la aferon. Kiam mi ricevas minacon, sub formo de tvitpepoj aŭ retmesaĝoj, mi tuj publikigas ĝin.»



Bildo longe aplaŭdata dum la koncerto de La Kompanoj por la 100a UK de UEA en Lillo la 27an de julio 2015.

Ofte la kritikojn alfrontas la presdesegnistoj solaj. *Cartooning for Peace* ankaŭ celas krei ligojn inter ili. Kaj ili celas kiel venontan etapon: agnoskigi la presdesegnarton, kiel fundamentan rajton ĉe Unesko.

Kompreneble ĉio tio estas despli reliefigita pro la amasmurdado, kiu trafis la artistojn de la gazeto *Charlie Hebdo* en Parizo la 7an de januaro 2015. Ĉu do tiuj karikaturistoj uzis siajn desegnojn kiel vere danĝerajn perversigilojn? Tiu evento generis lavangon da sentoj. Tra Parizo, tra la mondo, kunsentiĝis grava emocio, kiu komprenigis, ke tiu tuŝo al liberesprimo, kaj sekve al libero mem, ĉie ajn trafis multajn homojn intime. Do tiel profunde, ke ĝia esploro estas valora.

2. Je suis Charlie – ‘stas mi Charlie

La eldonejo *Livre de Poche* eldonis, kelkajn tagojn post la masakro en la redakitejo de *Charlie Hebdo*, libron profite al ties kaso. *Nous sommes Charlie* (Ni estas Charlie) konsistas en kolekto de tujaj reagoj de 60 verkistoj, kiuj ĉiuj siamaniere alportas sian opinion favore al la esprimlibero.

Sur la paĝoj 105a ĝis 109a, Gérard Mordillat (Gerardo Mordija’), argumentas en sia teksto:

Kontraŭ Dio

Estu klare: Charb (pr. Ŝarb), Honoré (Onore’), Wolinski (Volenski’), Cabu (Kabu’), Tignous (Tinjus’), murditaj en la redakitejo de Charlie Hebdo, estis amikoj miaj. Ni kune laboris, kune eldonis, kune aktivis, kune manĝis, kune petolis dum multaj jaroj...

Mi do neniel povas pretendi ajnan neŭtralecon.

Ĉar mi estas verkisto kaj kinisto mi volas fokusiĝi sur vortoj kaj bildoj.

La unua vorto, sur kiu mi unue fokusiĝu estas la vorto «atenco», kiun de lasta merkredo amaskomunikiloj tro elgargaris. Mi taksas tiun vorton neoportuna. Terorismo estas blinda kaj bombeksplodantoj murdas, ĉar ili volas murdi sen zorgi pri identeco de la viktimoj, nur ties nombro valoras por ili. La ĵurnalistoj kaj desegnistoj de Charlie ne estis viktimoj de atenco sed nome ekzekutitaj. Temas pri vera ekzekutado, ja politika ekzekutado komparebla, se vole, al tiu de Jaurès (Ĵores’), ankaŭ li ĵurnalista, ankaŭ li direktoro de gazeto. Jen faŝistaj metodoj, por kiuj la religia aŭ naciista diskurso estas nur trompa masko. Endas tion laŭtege diri, la ĵurnalistoj de Charlie estis ekzekutitaj nek far muzulmanoj, nek far islamanoj, sed far

faŝistoj. Niaj malamikoj estas nek la muzulmanoj, nek la islamanoj, sed la faŝistoj.

Ni nun prenu bildon [6]: tiun de Mohamedo, kiu verŝigis tiom da inko. Nur memorige, komence estis desegnoj publikigitaj en Danio, kaj modifitaj de integristaj imamoj, kiuj larĝe sendis ilin tra la muzulmana medio, tiel ekbruliginte la meĉon. Ilin publikigante kaj publikigante siajn proprajn desegnojn Charlie Hebdo atestis sian solidarecon kun la danaj desegnistoj... Jen la startpunkto. Fine, du faŝistaj murdistoj sin mem starigas kiel juĝistojn kaj ekzekutistojn, prektekstante «venĝi la profeton». Sed kiun venĝi? kaj pro kio?

Mi ne dubas, ke en la 7a jarcento estis en Arabio profeto. Ĉu li nomiĝis Mohamedo, jen alia afero. Laŭ parolo de Jaqueline Chabbi (Ĵaklin' Ŝabi), fama islamologino: «Estas tro bele, por esti vere!». Mohamedo signifas la «laŭdato», la «incensato», ĝi estas do kromnomo, ne nomo. Ĉu eblas insulti kromnomon?

Ni ne scias, kiam naskiĝis Mohamedo, nek kiam li mortis. Tradicio konsideras, ke tio okazis en 632, sed tiu hagio-biografio estis verkita preskaŭ du jarcentojn post la morto de Mohamedo. Tio signifas, ke fakte, historie, ni nenion aŭ kvazaŭ nenion scias pri la viro Mohamedo: kaj absolute nenion pri lia fizika aspekto. Legenda Mohamedo, vestita de ĉiuj gracioj kaj ĉiuj virtoj, naskiĝos pli ol duonjarcenton post lia morto sub la egido de la kalifo Abd Al-Malik, kiu iel igos lin sia proparolanto.

Kiel skizi karikaturon de viro, pri kiu oni nenion scias?

La desegnoj publikigitaj en la gazeto Charlie Hebdo ne estas karikaturaj sed imagaj portretoj, eble ŝarĝportretoj, tamen portretoj de la Profeto de l' Islamo; same imagaj kiel tiuj, kiuj abunde troveblas jam ekde la 15a jarcento en la otomana kaj persa tradicioj kaj ĝis nia nuno en la ŝijaisma tradicio. Parto de la muzulmanoj neniel ofendiĝas pro prezentaĵo de Mohamedo kiel sepjarcenta vivulo. La sakraligo de lia figuro estas nur Fundamentisma diktaĵo, veninta en la 19a jarcento el la Vahabismo, kaj ĉu tiu legenda figuro postulus «venĝon»? Ni estu seriozaj.

Urĝas kaj necesas, ke la ekleziaj aŭtoritatoj de l' Islamo rememorigu, ke en Respubliko estas laŭleĝe eble karikaturi Mohamedon, samkiel oni karikaturas Jesuon, la papon, Jehovon, la politikistojn, vin, min ktp. Tio nomiĝas esprimlibero kaj tio estas unu el la fundamentoj de demokratio.

Estus laŭleĝe ebla karikaturi Mohamedon, sed estus «ofende». La vorto «ofendo» ofte aŭdiĝas el buŝoj, por riproĉi la desegnistojn de Charlie, ĉar ili faris, kion ili faris. Tiu «kulturo de l' ofendo» ekpropagiĝas kiel metastazoj de tumor. De nun, iu ofendiĝas pro io ajn. La integristaj kristanoj ofendiĝas pro teatraĵo, kiu rolludigas Jesuon; samkvalitaj judoj ofendiĝas pro ĉiu kritiko kontraŭ la israela estraro, gangrena pro ekstremdekstraj religiuloj; la muzulmanoj ofendiĝas vidi sian Profeton frontpaĝe de satira gazeto... Ĉiuj tiuj belaj animoj postulas cenzuron kaj trudon de silento al la ofendantoj. Sed kiu trudos silenton al ili, kiuj ĉiutage ofendas mian ateismon, tedegante min per siaj superstiĉaj absurdaĵoj, kaj kiuj pretendas estri mian vivon nome de ĥimero?

Karikaturinte Mohamedon, Charb, Cabu kaj ceteruloj kulpas delikton pro «blasfemo». Kiom da fojoj necesas ripeti, ke povas temi pri blasfemo nur en teokratio? En Respubliko, tute eblas verki, krei, proklami, ke oni fekas sur Dion, Jehovon, Alahon, Nanabozon la Granda Kuniklo, Budhon, Sanktan Nikolaon, Mikemuson, Hari-Poteron kaj ĉiujn diojn inventitajn por deturni timon antaŭ morto.

Sur la amaskomunikiloj, sed ankaŭ surstrate, aŭdeblas tri akuzoj kontraŭ Charlie: La gazeto estus islamofobia, monavida kaj provokema.

Charlie estus islamofobia... ĉar ĝi mokas la muzulmanajn integristojn kaj fundamentistojn. Tiukaze ĝi estus ankaŭ kristanofobia, ĉar ĝi mokas la bigotulinojn kaj fifariseojn, Jesuon, la papon kaj la tutan kristanan diadoran klikaĉon. Ni aldonu, ke tre verŝajne ĝi estas ankaŭ judofobia, ĉar ĝi fajfas pri Moseo kaj la profetoj. Kaj por plaĉe aspekti, sendube antisemita, ĉar ĝi kritikas la politikon de la israela estraro, masakranta civilajn palestinajn popolanojn, kiuj laŭdire miskvalitis sur la «sanktega tero»... Ĉio tio estas nur misjuĝado. Charlie estas tutsimple, kaj sanige, kontraŭklerikala. Per humoro, satiro, ironio, ĝi luktas kontraŭ ĉiuj eklezioj; kristanaj, muzulmanaj, judaj, budhismaj, ŝintoaj, zoroastraj, raelaj, kaj mi preterlasas aliajn plej bonajn. Kaj se ni rigardus, kion publikigis la franca gazetararo en tempo de la disigo de la Eklezio disde la Ŝtato en 1905, ni konstatus, ke niaj karikaturistoj ŝajnas timemaj kompare al la tiamaj... la nura respekto, kiun ni ŝuldas al la religioj, estas la respekto laŭ la etimologia signifo: teni je distanco.

Charlie publikigus siajn desegnojn nur por logi pasantojn pro absoluta monglutemo, regata de fiksa ideo pliriĉiĝi, ĉiam pli. Ne necesas substreki la groteskecon de tiu akuzo, kiam oni rigardas la financon situacion de la gazeto kaj tiun de la ĵurnalistoj. La saĝeco de la nacioj tion diris sentence: «Por hundon dronigi oni nomas ĝin rabia.»

Fine, Charlie estus provokema, senrespondeca, sume krima, kaj tial rikoltus, kion ĝi semus. Jen la plej abomena el la lingvaĵaj sencoŝanĝoj; aŭ estas laŭ naturo provokeme diri la realon, ĝin alfronti, ĝin lumigi. Siatempo, ankaŭ Spinozo por la judismo, Richard Simon, Ernest Renan, Alfred Loisy por la kristanismo kaj multnombraj muzulmanaj aŭtoroj el la unuaj jarcentoj, Abu Naŭas, al-Hallaj, al-Razi, estis same akuzitaj kiel provokemuloj kaj ostracisme kondamnitaj. Siaskale, la ĵurnalistoj de Charlie Hebdo sekvas ilian sulkon... tiu de la kritika racio, de la inteligenteco kontraŭ la obskurantismo.

Monoteismo estas prezentata kiel progreso kompare al politeismo; ni esperu, ke post monoteismo kun ĝia unika dio, alia progreso kondukos nin al ateismo. Ne sufiĉas definitive forlasi «la Juĝo-n de Dio», kiel rekomendis Antonin Artaud, necesas definitive forlasi la ideon pri dio kaj ties sekvanta sangofluego. Plie kaj plue, la pastro Meslier: «La homo estos libera, kiam la lasta el la reĝoj estos strangolata per la intestoj de la lasta pastro.»

Kiel aneksoj al ĉi tiu artikolo, legeblas en estontaj numeroj de Sennaciulo kelkaj ceteraj atestoj tradukitaj el la sama libro.

Charb, la ĉefredaktoro de Charlie Hebdo, asertis voli unue ridi kaj ridigi, kaj ke li ne plu volus vivi en lando, kie li ne plu rajtus krei kaj libere esprimi sin. Li deklaris jam en 2012, ke li preferus stare morti ol juĝe vivi [7]. Kaj lia desegno frontpaĝe de la gazeto de la numero aperinta la 7an de januaro, kvazaŭ antaŭsciiga, estis la lasta. Multaj presdesegnistoj tra la mondo reage bildigis siajn emociojn tuj post la dissendo de la novaĵo pri la murdado en la redakitejo. Tiuj desegnoj estis larĝe publikigitaj kaj surpapere kaj perrete. Sed kiel statas la Esperanto-movado rilate ne nur tiun tragikan eventon sed rilate la presdesegnarton kaj karikaturon ĝenerale?

3. Kaj en Esperantio ?

Konsterna povas esti la senpera konstato, ke grave mankas bonaj presdesegnoj en Esperantio. Kaj nombre kaj kvalite, kritikaj humuraĵoj devus abundi en gazetararo

verkita en lingvo aparte uzata kun/por humanaj celoj, kaj ankoraŭ pli en presorganoj de asocioj, kiuj sin difinas kiel kulturaj kaj socikritikaj. Kie do kuŝas la kaŭzoj de tiu manko? Kiujn kulpigi pro tio? Paralela komparo kun la muzika kaj kantista artistaro ankoraŭ malpli komfortigas tiun kvazaŭ vakuan impreson. Ja ne verdas la panoramo, kiun provas nuanciĝi nur tro malmultaj esceptoj.

Kvankam ŝajne tio bone komenciĝis per karikaturoj...



Théophile Cart en la spegulo de karikaturisto [Jean-Robert](#), ĉ. 1912

Jam en 1911, por la unua franca kongreso en Liono, estis kreita kaj eldonita serio da tridek ses bildkartoj [8] kun karikaturoj de la tiamaj movadaj famuloj: Archdeacon, Boirac, Bourlet, Cart, Hodler, Michaux, Privat, ktp. Tamen ne Zamenhof. Kial do mankas la «Majstro»? En la tiuepokaj stilo kaj sprito, tiujn valorajn kreaĵojn desegnis iu Jean Robert. Bedaŭrinde neniu informo pri tiu artisto atingis nin hodiaŭ. Verŝajne ĉar li ne estis esperantisto sed simple respondis al mendo de Alice-Leontine Farges [9], estrino de la tiam liona E-oficejo. Ŝi supozeble pagis, li verkis laŭ indikoj. Tiel (aŭ tial) ŝia propra karikaturo kompletigas la serion. Kaj la kartaron ŝi vendadis propagande sur budo ĉe la Foire de Liono. En 1922 la koloran ensemblon proponis anonco kontraŭ kvin francaj frankoj. Ĝi tekstis: «Karikaturante laŭ Paris'a sprito kelkajn famajn Esperantistojn, inter kiuj pluraj bedaŭrinde nun mortis, la desegnisto tute ne intencis iun ofendi.»

Estu do klare, ke ankaŭ esperantistaj karikaturoj ne celas iun ajn ofendi, sed reliefigas la intencon de ĝia aŭtoro ridigi. Ridigi la karikaturitojn samkiel la aliajn. Ĉu do al Zaza mankis humuro? Nu, la respondo al tiu demando

restas konfirmota...

Longa tempo sen karikaturoj

Kio rimarkeblas trafolumante la fruajn gazetojn presitajn jam fine de la deknaŭa aŭ komence de la dudeka jarcentoj, troveblajn en la arkivoj de Esperanto-Gironde apud Bordojo, kiaj *L'Espérantiste* (1898-1906), *Lingvo Internacia* (1903-1908), *The Esperantist* kaj *Germana Esperantisto* (1904-1908), *La Revuo* (1906-1912)? Tre maloftas ilustraĵoj; aperas nur tre sporade izolita foto, portreto de eminenta esperantisto, sed preskaŭ neniam desegno! Sur miloj da paĝoj, vere neniu karikaturo! Nur en *Tra la mondo* (1907-1908) du rubrikotitolojn ornamas desegnoj subskribitaj C. Oxenford [10]. «Fraŭlino Caro Oxenford estas portreto de ŝia tempo». Sed desegno, eĉ se presita en gazeto, ne tiel simple fariĝas presdesegno.

Kiel do interpreti tiun gravan silenton? Ĉu por montri nepran seriozecon de la Afero? Ne pro manko da humuro, ĉar ne mankas la rubrikoj kun ŝercaj rakontetoj.

En la revuo *Esperanto*, la oficiala organo de UEA, el la jaroj 1925-1927 konstateblas evoluo de la ilustraĵoj. Ili pli abundas. Ĉefe fotoj. La kelkaj publikigitaj desegnoj estas anonimaj, do eble verkoj de neesperantistoj, kaj sensprite ilustras la artikolojn.

La pioniroj de la jaroj 1932-1936

Komence de la tridekaj jaroj de la dudeka jarcento skurĝas tiun flankenlason du revuoj, nome *La Praktiko* [11] kaj *La Pirato*.

En sia unua periodo *La Praktiko*, kreita de Andreo Cseh kiel «gazeto kiu instruas kaj amuzas», enŝovas multajn desegnojn en siaj paĝoj. En la unuaj numeroj, ĉiuj anonimaj.



Du karikaturaj de D. Wranka el *La Praktiko*

Sed rapide aperas subskribo de desegnisto, kiu fidele tenos sian rolon de presdesegnisto ĝis meze de la kvindekaj jaroj. Tiu gazeto el la Centra Oficejo de la Universala Ligo en Hago, kapablos eldoni gazetojn ĝis 1941 kaj reekos jam en 1946. Veraj karikaturaj mokante eminentajn esperantistojn (tamen daŭre ne la ŝajne netuŝeblan Dr-on Zamenhof), la personaĵoj ankaŭ surscenigas kritikan rigardon ekster la movado, kaj tiu novemas, al internaciaj organizaĵoj, kiel UNO, Unesko, Eŭropo...

Post la milita interrompo, *La Praktiko* reeldoniĝas kaj provas retrovi sian spiriton. Do desegnoj retrovas sian lokon tie. En 1946, jen Oĉjo Sam, kiu stirante trenkamioneton, tiras okcidenten al riparejo germanan armean aŭton frakasitan, kiel ĝia ŝoforo. La saman jaron, jen karikaturaj de Molotov, Bevin kaj Byrnes, por denunci la traktadojn de la Moskva Konferenco. Ilin subskribis nekonatoj, verŝajne ne esperantistaj sed tradukitaj. Tiuj desegnoj vere markas politikan kritikon per ŝerca primoko.

Tamen baldaŭ post la milita interrompo, la redakto ŝanĝiĝas kaj fotoj pli kaj pli anstataŭas la presdesegnojn. Tiuj plej spritaj de Dragutin Wranka malaperas fine de 1954. La neŭtraleco eble venkis per la malapero de la presdesegnoj de Wranka. Kaj *La Praktiko* fine mem malaperas en 1970, malgraŭ ŝanĝo de formato kaj abundo de fotoj.

Dragutin Wranka, kroato elmigrinta en Argentinon, kie li mortis en 1980, publikiginte siajn presdesegnojn en *La Praktiko* sed ankaŭ i.a. en *Heroldo*, estu konsiderata kiel pioniro de la esperantistaj karikaturistoj. Tiu arto internacie famigis lin. Eble li la unua karikaturis Oĉjo Zaza videbla en kadro sur muro.

Alia revuo produktas amuzajn aŭ/kaj tiklajn karikaturajn, mokante la sociajn kaj movadajn morojn komence de la tridekaj jaroj: *La Pirato*, en Parizo. Ankaŭ en tiuj kajeroj sian desegnojn publikigas Dragutin Wranka. Tamen tie ne sole. Tuta bando da desegnistoj ilustras la ofte mokajn rubrikojn kaj artikolojn. Ilin subskribas Ludovic Rodo Pissaro, Hermann Linseisen, uTo, Jorik, Clelia Guglielminetti... Sed ne estas facile certe identigi la kontribuintojn, ĉar multaj el ili uzis pseŭdonimojn...

En siatempa *Sennacieca Revuo*, Raymond Schwartz (Rajmundo Ŝvarc) redaktis rubrikon *Laŭ mia rid-punkto*. De 1933 ĝis 1936 li estris la publikigon de la monata satira revuo *La Pirato*. En ties redaktoskipo karikaturis Raymond Laval [12], poste konata kiel Valo. La gravaj kontribuajoj de Valo celis ne nur esperantistojn sed ankaŭ de tempo al tempo la sociajn kaj politikajn situaciojn de la tiam bolanta mondo. Kaj plaĉe estas konsideri, ke li ne hezitis karikaturi Ŝvarcon, la ŝipestron, kaj ankaŭ Zamenhofon mem. Ĉu finfine la unua karikaturisto [13] de la majstro? Ne certe, ĉar ne publikigita en la revuo, tamen... Bedaŭrinde la revuo nur dum tri jaroj «kaperis».

"Kiu ridi ne scias, seriozi ne povas." Jen adoptenda moto de Schwartz, kiu ankaŭ konsideris ke «Popolo, kiu ne kuraĝas moki pri si mem, ne estas matura».

Krom tio? Nenio! Mizera gazetaro!

Dragutin Wranka kaj Raymond Laval kun la bando de *La Pirato* restas esceptoj. Post la dua mondmilito, samkiel post la unua, neniu alia artisto sin prezentas por pli vastigi la presdesegkarton.

Kaj post la jaro 1968, post la provoj pri liberesprimado de la junularo diversloke sur la tero, ĉu krajonuloj trovis inspirojn por inundi la verdan gazetaron per ilustraĵoj?

Tra la paĝoj de la tiamaj kaj hodiaŭ plu plej gravaj, movadaj gazetoj, kiaj *Esperanto*, *Monato*, *Literatura Foiro*, *Heroldo*, *Fonto*, *La Ondo de Esperanto* [14], samaj rimarkoj: kiam aperas karikaturo temas pri nur izolita, sporada, kvazaŭ hazarda ilustraĵo. Tre malofta. Bedaŭrinde sama vakuo okulfrapas en la lokaj ligiloj de Esperanto-grupoj. Kaj same en la SATecaj gazetoj aŭ revuoj: en la tiama fervora *La Juna Penso* ekskluzive gravis la tekstoj; en *Sennaciulo*, kvankam ĝia ĉefredaktoro plurfoje ŝanĝiĝis, ne troviĝas perdesegna kritiko; en *Sennacieca Revuo*, ankaŭ ne.

Almenaŭ tiuj du!

Ĉu do fine la gazetoj *SAT-Amikaro/La Sago* kaj *La KancerKliniko* [15] estas la nuraj esceptoj, kiuj konfirmas tiun tro facilan ĝeneraligon? Eblas timi, ke jes. Ĉar tiuj du laste nomitaj, larĝe malfermas siajn kolumnojn al presdesegnoj. La revuo *SAT-Amikaro*, iĝinte *La Sago*, eĉ ankoraŭ pli ol antaŭe. Sed kvankam la aperritmo estas ĉiunumere regula, la etoso de la desegnoj restas tie «politike akceptebla» kiel ekzemple la bildrakontoj *Ĉe la lago*.

Sed la rekorde mencienda Esperanto-periodaĵo, kiu jam de sia kreigo plej abunde publikigadas karikaturojn kaj presdesegnojn estas la elstara *La KancerKliniko*, kies ĉefredaktoro estas Ĵak Le Pŭil, de ĝia numero 0 en 1976 kaj plu por ĝia venanta oktobra-decembra n-ro 172. LKK dispuŝis la kutimaĵojn! Ĉu pro instiga influo de la franclingvaj ĉiusemajnaj *Le Canard Enchaîné* (La Katenita Anaso) kaj *Hara Kiri*, kiu iĝos *Charlie Hebdo*? Sindiranta «politika, kultura, skandalema, ajnista», LKK neniam hezitis antaŭ karikaturo aŭ presdesegno, kaj sen plia demando antaŭdecidis ion ajn publikigi. Kaj tute neniel timis, eĉ publikiginte tre polemikajn *Charlie*-ecajn desegnojn. Ekzemple *Fia kaco, kia paco?*, presdesegno de Marcelo Redulez, kiu montras meze de muzulmanoj grupe preĝantaj en moskeo, dika kaco ĉirkaŭzonita de eksplodiloj en sama preĝa pozo.

Ĉu hodiaŭ plu severas la cenzuro en la hodiaŭaj esperantaj redakstejoj?

Fakte la plej vera kaŭzo de nepublikigo de presdesegnoj en la esperanta gazetaro estas tre simpla: mankas desegnistoj! Kiu nomo famiĝis pro siaj ilustraĵoj aŭ karikaturaj dum la unua jarcento de Esperanto? El la fruaj jaroj, laŭscie, neniu! Kaj la nomon Wranka



La 1000-a paĝo de LKK. De dekstre maldekstren: Hera Elik, Armela LeQuint, Ĵak LePuil, Georgo Lagrange, Laŭrenco Septier, Serge Sire. Statue staras sur la meblo, JoPetro Danvy. En la kadro, Zorhof.

baldaŭ ĉiuj forgesos. Konsterniĝe. Male al muziko, arto dank' al kiu multaj homoj famiĝis en Esperantio, jam de Menu de Ménil [16], meritinte sian lionan karikaturon en 1906, al Ramona van Dalsen kaj ŝiaj flekseblaj plastaj diskoj, al Marĉela kaj Ĝianfranko Molle kun ilia roma skolo, ĝis multaj bandanoj de Vinilkosmo [17]: Jomo, Kajto, Flavio Fonseca, Amplifiki, La Kompanoj ktp.

Supozeble multaj redaktoroj tre ŝatus vidi presdesegnojn en siaj publikaĵoj, kaj la plejmulto de redaktoskipanoj de *Sennaciulo* favorus la proponon de talenta, profesia presdesegnisto, kiu pretus provizi *Sennaciulon* per unu aŭ du spite spritaj desegnoj ĉiunumere, sub la nura sed nepra kondiĉo, ke li estu sencenzure libera kaj ke se la redaktoskipo rajtus nur antaŭkomenti la proponojn (kiel por artikoloj), la desegnisto ĉiam fine decidus pri la aperigenda bildo. Tamen el la geredaktantoj unu ne rimarkis la maleston de tiuj desegnoj en *Sennaciulo*, kaj inter la legantoj tri respondis, ke ili rimarkis sed ke tio ne ĝenas ilin. (Unu el tiuj tri cetere publikigus nur kondiĉe ke la redaktoskipo kontrolu la enhavon de la desegnoj, tiel ke ili estu koheraj kun la principoj de SAT.) Tamen bedaŭrinde nenies tia propono spontanee venis ĝis nun. Aliaj solvoj proponas Gary Mickle, el la redaktoskipo de *Sennaciulo*:

“Valorus prezenti verkojn de diversaj artistoj, diverslandaj, diverstendencaj kaj kun diversaj stiloj. Ebla maniero por akiri desegnojn, estus transpreni taŭgajn desegnojn el alilingvaj gazetoj kaj esperantigi ilin. Kompreneble necesas peti permeson de la rajtohavantoj, sed kiam mi en la pasinteco petis permeson de gazetoj aŭ aŭtoroj por aperigi artikoltradukojn, ili ĉiam afable donis, do ankaŭ ĉe desegnoj povus funkcii. Teknike ne estas malfacile anstataŭigi alilingvajn parolvezikojn per Esperantaj, uzante grafikan programon, sed foje ankaŭ la metodo printi kaj superglui povas sufiĉe bone funkcii. Antaŭ jaroj mi uzis tiun metodon por produkti desegnojn por la *LEA/G-Magazino* [18]. Volo (Will Firth) akiris desegnojn de amika aŭstralia desegnisto kaj mi esperantigis ilin kaj surgluis la esperantigojn. (...) Eblus alvoki la legantojn sendi tiajn desegnojn, kaj konstati, kiu reagas.»

Ja indus, aŭ eĉ endus, instiga esploro, ĉu ne? Ĉar ja tro maloftaj, nur kelkaj esperantistoj pli malpli regule provizas satecajn gazetojn per originalaj desegnoj. Temas pri la fidela Jean Selle [19] (Johano Sel'), la elstara Serge Sire (Sergo Sir'), la komiksema Arnau [20] kaj la pentrista Kavlan [21].



Sel-humoraĵo de Jean Selle el La Sago

El la SATeca medio: Jean Selle kaj Serge Sire

Ekde la sepdekaj jaroj de la dudeka jarcento en la revuo *SAT-Amikaro* kamarado Jean Selle regule, preskaŭ ĉiunumere, publikigas po du aŭ tri presdesegnojn. Foje aŭdiĝis kritikoj pri la nebeleco de tiuj bildoj, pro tro videble amatora stilo de la aŭtoro. Ja la karikatureojn, la personaĵojn kelkiuj vidis senartaj, nelerte strekitaj, kaj la temoj nek ĉiam interesaj, nek bone traktitaj. Sed ĉu ne ĝuste tio ankaŭ aŭdeblas pri la profesiaj presdesegnoj de *Charlie Hebdo*? Ĉar tamen la *Sel-Humuraĵoj* klare esprimas SATecajn ideojn, kiuj nedubeble klasifikigas ilin presdesegnoj, laŭ la difino de la unua paragrafo de tiu ĉi artikolo. Kaj se Jean Selle [22] iel kuraĝas malgraŭ tiuj kritikoj plu provizi la gazeton, li ja pravas, ĉar el la kritikintoj, neniu alia faris tion, nek pli bele, nek pli sprite, nek pli celtrafe!



atendas komentojn de sia edzino, aŭ/kaj mendojn de Ĵak Le Pŭil, por produkti presigotan bildon. Tial ne tro abundas liaj karikaturaj de politikistoj aŭ famuloj. Tamen inter la multaj personaĵoj de li kreitaj elstaras Zorhof. Rigardu la kovrilpaĝon: ĉu vi do rekonas la maskitan mondosavanton? Ja la majstro ne plu timas ofendojn, sed ĉu tiu personaĵo ŝokas kelkajn puristojn? Certe la virinoj, ofte preskaŭ nudaj sur la bildoj de Serge Sire, levis polemikojn eĉ foje viglaj inter esperantistoj kaj esperantistinoj. Ankaŭ la frontpaĝo, kiun li verkis por la *Traktaĵo pri ateologio* [23] de Michel Onfray, ne plaĉis al ĉiuj. Ĝi estas represita en supra angulo de la *Bilda deliraĵo far Sir': Por Ĉarli' help', do!*. Provokema, ja Serge Sire diras sin. Tute prave, tia li estas. Tial li estas jen tre ŝatata, jen malpli. Same liaj desegnoj.

Kaj cetere: SuperZam, moderna heroo!

Aliaj humoristoj karikaturis Ludovikon donante al sia heroo la sa Karikaturon de Bakunine far Sir': li pruntedonis siajn trajtojn al Logo, la malica duon-dio, en la albumo «La Rejnoro» de Rikardo Vagner, tradukita de G. Lagrange. man nomon SuperZam [24]: en Britio Ian Carter kaj en Italio Daniele Binaghi kun Andrea Rossetto.



Afiŝo kun Rat-Man kaj SuperZam, de Daniele Binaghi kaj Andrea Rossetto

Ian Carter donis al si la esperantan nomon Jano. En 1975, li deĵoris kiel prezidanto de JEB (Junularo Esperantista Brita) kaj redaktis ties ĵurnalon *Kial Ne?* Unu el la plej allogaj enhavaĵoj estis la aventuroj de SuperZam. Li aparte internacie konatiĝis pro invento de tiu bildrakonta personaĵo.

Novembre 2007, la komikslibreto *Rat-Man en Esperanto* estis oficiale prezentita dum la foiro *Lucca Comics & Games*, en Lucca (Italio); por la reklamaj afiŝoj, Daniele Binaghi, projektestro de la tradukadprojekto *RoMEo*, kune kun Andrea Rossetto, komiksisto, decidis kunmeti Rat-Man kaj alian superheroon, ĉi-foje L. L. Zamenhof; do, tute nesciante pri la unua rolulo de Jano, estis denove kreita SuperZam.

Decembre 2007, Jano permesis uzon de la nomo de sia kreaĵo ankaŭ por la nova, eĉ taksante ĝin «tre ŝatinda».

Siaflanke, Arnau, oficiale Arnau Torras i Tutusaus, el Katalunio, kreis Doktoron Senesperanto. Tiu personaĵo estas miksaĵo de Zamenhof kaj memportreto. En tre malprudegaj kaj ironiaj komiksoj, la karikaturon celas la «Bonan Etoson», ĉie kie li estas. Kaj tiam sekso ĉefrolas.



Karikaturo de Bakunine far Sir': li pruntedonis siajn trajtojn al Logo, la malica duon-dio, en la albumo «La Rejnoro» de Rikardo Vagner, tradukita de G. Lagrange.

En la vere tro efemera *RokGazet'* Niko Vološin esprimis sin per karikaturaj. Li ankaŭ desegnis por afiŝoj kaj kongreslibro de la SAT-Amikara Kongreso 1992 en Bordojo, sur kiu videblas Zamenhof, frake vestita, inter Mozarto kaj Rokulo.

Tiu prezento de la kelkaj troveblaj nomoj de esperantistaj karikaturistoj ne pretendas esti ĝisfunda. Ja grave mankas esploroj ekzemple tra *Heroldo*. Tamen ĝi montras la vakuon rilate presdesegnojn en la esperantista gazetaro pro duobla fakto: manko da kompetentaj artistoj kaj memcenzuro de la redaktantaroj ofte sub la protekta preteksto de neŭtraleco.

Novaj teknikoj malkaŝas retajn juvelojn...

Montriĝas, ke novaj humoristoj, pli junaj, rekte uzas interreton por publikigi siajn artaĵojn. La teknikaj evoluoj kaj la ekologia paperŝparado estas nur parto de la elementoj, kiuj konvinkis por tiu decido. Vito Markovo ekzemple rekomendas viziton de la franclingva retejo *Urtikan* [25], kiu bildigas ĉiutage unu presdesegnon. Tie dudeko da profesiaj artistoj (bedaŭrinde neniu esperantista) prezentas siajn reagojn al la aktualaĵoj. Plej multaj el tiuj presdesegnistoj ankaŭ laboras por *Charlie Hebdo*. Tiu «satira, libera kaj sendependa retejo» estas vere subtenenda.

...kaj sur la sociaj retoj, esperantistajn presdesegnojn de Robin Guinin

Engaĝita junulo estas Robin Guinin. Jam de pli ol dek jaroj fervora esperantisto, liaj ilustraĵoj modernigas la kalendaretojn de *Esperanto-Jeunes*, la libreton *Pasporta Servo* de TEJO, samkiel la afiŝojn de EDE [26] por la Eŭropaj balotoj. Koninda homo, Robin Guinin alportas finfine tutprofesian desegnarion en la movadon. En oktobro 2016 li respondis al demandoj de artkritikistino Adele Tilouine. Sekvas tradukitaj ekstraktoj de tiu intervjuo [27].

“Robin: (...) Miavidepunkte ilustrado estas unu el la plej efikaj rimedoj por komuniki mesaĝon. Mia unua deziro estas konscienci pri la problemoj ligitaj al ekologio, samkiel al socia malegaleco. Kaj la ligojn inter tiuj du paradigmoj povas riveli ilustraĵo, dank’ al ĝia spontana, rekta formato kaj ĝia kapablo uzi la tekston kaj la enscenigon.

(...) Ekzemple min forte logas la temo de la protektado de la amazona arbarego kaj min fascinas la tie loĝantaj indiĝenaj popoloj, vivantaj en kompleta harmonio kun sia natura medio. Pluraj el ili estas engaĝitaj en luktado kontraŭ ekspluatado de la arbaro far industrioj. Tiu batalo elvokas tiun de Davido kontraŭ Goljato kaj aparte tuŝas min. Tial mi desegnis, laŭ sugesto de Gert-Peter Bruch, prezidanto de la asocio *Planète Amazone*, ilustraĵon, kiu montras la ĉefon de la tribo Kayapo, la kaciko Raoni, eminenta figuro de la movado luktanta kontraŭ la senarbarigo en Brazilo jam de la 1970aj jaroj.

(...) Laŭ mi kritiko evoluas plurnivele. Ĝi komenciĝas per ekkonscio pri la neegala strukturo de la sistemo kaj ties forĵeto. Tiu naŭzo poste lasas lokon por pli konstrua sento de la rolo ludenda por evoluigi la sistemon; ĉar ĉiu individuo estas integra parto de socia sistemo kaj mem elektas la manieron, per kiu li/ŝi partoprenas en ĝi. Miaflanke, mi elektis ilustradon kaj mi turnis min al pozitiva kaj reva mondo, kiu invitas al ŝanĝo. Efektive ŝajnas al mi grave engaĝigi individuojn por socia ŝanĝo je struktura nivelo, emfazante kunsenton kaj poezion, kaj sopirigante ilin al pli bona mondo, ol voli devigi ilin ŝanĝi, vekante en ili misan konsciencan per ŝokaj aŭ perfortaj bildoj. Insulti aŭ kulpigi individuon estas, miaopinie, kontraŭefika. Tio obstinigas lin/ŝin kaj

instigas lin/ŝin persisti kun samaj opinioj, do rezultiĝas efiko kontraŭa al la dezirata! Tamen ilustraĵo havas proprajn limojn. Ĝi implikas simpligon de la mesaĝo kaj forviŝas nuancojn. Krome ĝi ebligas plurnivelajn interpretadojn, kaj homo, kiu vidas la bildon, sen koni ĝian enhavan intencon, povas tute libere interpreti ĝin. Laŭ propra plaĉo. (...))»




Desegno farita de Robin Guinin

La blogo aŭ fejsbuka paĝo [28] de Robin Guinin estas esplorindaj. Karikaturaj de Bolsonaro aŭ Macron atestas pri la idearo de tiu profesiulo, kiu ne hezitas uzi sian arton por sia idealo. La esperantista movado ne rajtas neglekti tiun talentulon. Ĉar, se lastatempe lin superŝutis troa laboro, li pretas akcepti proponon, regule aŭ de tempo al tempo, publikigi desegnojn en esperanta(j) gazeto(j). Robin Guinin eklernis Esperanton jarfine de 2007. Du jarojn poste li desegnis por la 150a naskiĝtago [29] de L.L. Zamenhof. Li publikigis ĝin en sia retpaĝaro (*Le Robinoscope*). Du jarojn poste, li donacis la desegnon al *Espéranto-France*. La asocio uzis ĝin por illustri la kalendareton de la jaro 2012. Post tio, la teamo de la asocio multfoje vokis lin por kunlabori (ilustri aliajn kalendaretojn aŭ librojn). Tiel Robin Guinin trovis sufiĉe facile lokon en la movado. Laŭ li, la E-movado estas granda kaj diversa movado, kaj tial li ne povas paroli pri la tuto. Plie, li ne

konas multe da aliaj esperantistaj artistoj (almenaŭ proksime de li en Francio), kaj tial ne povas paroli ilianome. Sed laŭ lia sperto, *Espéranto-France* vokis lin plurfoje por kunlaboro, kaj ŝatas liajn desegnajn kreaĵojn. Ankaŭ la partio EDE (Eŭropo Demokratio Esperanto) freŝdate vokis lin por kunlaboro. Tio jam signas agnoskon. Eble estus interesa ideo fari eksponon de ĉiuj desegnoj liaj pri Esperanto, estonte.

SR: Ĉu vi iam suferis cenzuron? Se jes, bonvolu rakonti. Se ne, ĉu vi mem foje cenzuris vin?

RG: Mi opinias, ke oni cenzuras sin mem ofte en la vivo, precize por antaŭgardi bonajn interrilatojn kun aliaj homoj. Ekzemple, kiam oni havas malbonajn pensojn pri iu, oni evitas diri al tiu ĉi tion, kion oni opinias (aŭ opiniis) pri li/ŝi. Ofte la pensoj pri iu (aŭ pri grupo de homoj) estas ligataj kun emocioj de la nuna momento, ne kun tio, kion oni vere opinias pri li/ŝi (aŭ ili), ankoraŭ malpli kun tio, kio li/ŝi (aŭ ili) estas reale. Estas same pri la desegnoj, mi ne desegnas ĉion, kion mi havas mense, unue ĉar mi ne havas sufiĉe da tempo por tion fari, poste ĉar mi pripensas la konsekvencojn, kiujn la desegnoj naskos publike: ĉu ni ne agu por provi plibonigi la mondon kaj la homajn interrilatojn? Tio ne signifas neniam preni riskojn. Fojfoje necesas ŝoki la kutimajn pensojn de la homoj por ŝanĝigi kaj plibonigi ilian vivon, eĉ se ili ne konscias pri tio. Sed eble, eĉ certe, mi eraras fojfoje proponi desegnon, kies konsekvencoj de la publikigo estas ne ĉiuj pli pozitivaj ol negativaj por aliuloj. Tiukaze mi pli bone agus ne publikiginte tion kaj min cenzuri! Sed plejofte oni nescias la verajn konsekvencojn de siaj agoj. Kio estas agi bone? Ĉu tio estas nur subjektiva afero? Aŭ universala realeco? Tiuj estas filozofaj demandoj, mi ne pretendas koni la ekzaktajn respondojn. Pri la cenzuro de aliaj personoj, mi povas rakonti tion, kio okazis freŝdate. Dum la Eŭropa voĉdonado, la teamo de EDE ne akceptis mian unuan desegnan proponon por sia afiŝo [30], ĉar ili timis cenzuron de la voĉdona administrado, pro eblaj kontraŭleĝaj elementoj de la desegno, laŭ la regularo.



Bildo farita de Blaise Guinin pri la renkonto de Georges Brassens kaj la Morto

SR: Ĉu vi sukcesas perlabori iom da mono aŭ nur altruisme donas viajn desegnojn por la kalendaroj, afiŝoj, PS-libretoj, Metodo11 ktp?

RG: Kiel jam dirite, mi donacis (do senpage) la unuan desegnon faritan al *Espéranto-France*. Ĝin oni uzis por ilustri la kalendareton 2012. Poste, la asocio, kiu respektas mian artan laboron kaj scias, ke desegnisto estas mia profesio, proponis pagi min. Same kun EDE, ili eĉ pagis min pli ol la prezo, kiun mi proponis unue. Oni sciu, ke mi (tiel, kiel la plej granda parto de desegnistoj) perlaboras nek facile, nek multe da mono; do peti iom da mono, eĉ por subtenata ideo aŭ asocio, ne estas «pro avareco aŭ monavido». Se mi estus sufiĉe riĉa, mi senprobleme, altruisme donus senpagajn desegnojn por subteni Esperanton.

Kaj kion diri pri Blaise Guinin, la frato de Robin? Ankaŭ li estas desegnisto kaj li freŝdate eklernis Esperanton. Kaj la du fratoj verkis bildrakonton pri la renkonto de *Georges Brassens kaj la*

Morto. En la franca, ankoraŭ ne esperantigita...

4. Konklude

Liberesprimo estas neelĉerpebla temo. Eblus verkadi ankoraŭ multe pli pri ĝiaj nuntempaj suferoj. Limigi ĝian aliron tra la presdesegnarto ebligis iel kanalizati la esencon de tiu artikolo, kiu prezentas kompreneble kaj evidente nur parteton de la temo. Konsciante, ke en mi boladas kirliĝantaj pensoj, ideoj, sentoj kaj emocioj, relegante tiujn kelkajn paragrafojn, mi esperas, ke ankaŭ ĉe vi tiu artikolo levis intereson. Bonvolu ne heziti komenti.

Kaj nun ne dubeble, instigitaj, -ataj, -otaj, kelkaj gekamaradoj ekprenos siajn kraĵojn, penikojn aŭ komputilajn programojn por provizi la venontajn rubrikojn de SATaj revuoj per presdesegnoj. Ĉar evidente pluraj SATanoj jam pruvis sian talenton tiuteme. Do ek al publikigo. Ĉu ne, Serĝo, Ho Song, Xana, Paŭlino, Vito, Ŝtonĉjo, k.c.?

Kompilis, tradukis kaj aranĝis Marcelo Redulez (32846) kun grava helpo de dankindaj Serĝo Sir', Ĵak Le Pŭil, Marie-Thérèse Lloancy, Janine kaj Yannick Dumoulin, Henri Masson kaj Robin Guinin. Ankaŭ de same dankindaj geamikoj respondintaj al sondadeto, kiel legantoj aŭ redakto-skipanoj de *Sennaciulo*.

Notoj:

[1] *Join, or die*, de Benjamin Franklin, publikigita la 9an de majo 1754: https://philadelphiaencyclopedia.org/archive/cartoons-and-cartoonists/15961_ca_object_representations_media_105404_original-2/

[2] Honoré Daumier (1808-1879):

<http://expositions.bnf.fr/daumier/grand/012.htm>

<http://www.historien-anecdotique.fr/2012/11/louis-philippe-ier>.

[3] <https://www.arte.tv/fr/videos/085752-223-A/arte-journal/>

[4] <https://www.cartooningforpeace.org>

<https://www.cartooningforpeace.org/editos/cartooning-for-peace-deplore-la-disparition-du-dessin-de-presse-dans-le-ny-times/>

[5] Fama franca desegnisto, Plantu publikigas siajn desegnojn frontpaĝe en *Le Monde*.

[6] Plej simbola frontpaĝo de *Charlie Hebdo* en 2006 montrante Mohamedon tenante sian kapon kaj ploure bedaŭrante: «Malfacilas, esti adorata de stultaĉuloj». Plu videbla





Ĉi karikaturo de la verkinto de tiu artikolo dum la 87a SAT-kongreso en Dinano (2014) krajonis Stéphane Lemarchand, filo de Bernardette Lemarchand, OKKanino. Ankaŭ esploriga spuro, ĉu ne?



Presdesegno de Sêrĝo Sir' kun Buŝ, Gorbaĉev kaj Jelcin okaze de l' Aŭgusta puĉo (1991)



Desegno de R. Laval: Kies kapo tie apud tiu de Ŝvarc? Ĉu ne pipumanta Zaza

- ĉe: https://www.huffingtonpost.fr/2015/01/07/cabu-goerges-wolinski-mort-charlie-hebdo-attaque-terroriste_n_6428912.html
- [7] Artikolo el la franca gazeto *Le Monde*: https://www.lemonde.fr/actualite-medias/article/2015/01/07/charb-je-prefere-mourir-debout-que-vivre-a-genoux_4550759_3236.html
- [8] Ĉiuj 36 kartoj rete videblaj: https://eo.wikipedia.org/wiki/Karikaturaj_bildkartoj_de_desegnisto_Jean-Robert
- [9] https://eo.wikipedia.org/wiki/Alice-Leontine_Farges
- [10] Fraŭlino Caro Oxenford verkis *La historio de la esperantista vagabonda klubo*, kiun ŝi fondis: <https://arkivo.esperanto-france.org/divers/oxenford/vagabond.htm>
- [11] https://eo.wikipedia.org/wiki/La_Praktiko
- [12] <https://kabareto.esperanto.cc/valo.htm>. Valo publikigis plurajn broŝurojn eldonitajn de SAT, inter kiuj *Individuismo en aktiveco* de Han Riner kaj *70 jaroj sub la verda stelo*.
- [13] <https://kabareto.esperanto.cc/verkoj.htm>
- [14] *Esperanto-gazetaro: historio, nuntempo kaj perspektivoj*, artikolo de Jukka Pietiläinen en *La Ondo de Esperanto*, 2007, n-ro 4 (150): <http://esperanto-ondo.ru/Novaj/Nov07-11.htm>
- [15] *La KancerKliniko* (mallongige LKK) estas humura satira gazeto trimonata (retadreso: lk@free.fr).
- [16] Félicien Menu de Ménil, komponisto de la himno *La Espero*: https://eo.wikipedia.org/wiki/Félicien_Menu_de_Ménil
- [17] Vinilkosmo, muzikeldonejo prizorgata de Floreal Martorell: <https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/>
- [18] *LEA/G Magazino* estis organo de la Germana Laborista Esperanto-Asocio.
- [19] https://eo.wikipedia.org/wiki/Jean_Selle
- [20] https://eo.wikipedia.org/wiki/Arnau_Torras
- [21] <http://www.yanpetro-kavlan.fr>
- [22] Verkinte tiun paragrafon ni eksciis pri la forpaso de Jean Selle fine de novembro 2019. Korpreme.
- [23] Ĉe EldonFako de SAT: <http://satesperanto.org/spip.php?article1776>
- [24] SuperZam videblas: <https://eo.wikipedia.org/wiki/SuperZam>
- [25] <http://www.urtikan.net>
- [26] Europe Démocratie Esperanto: <http://e-d-e.fr>
- [27] <https://innovisuel.blogspot.com/2016/10/les-illustrations-engagees-de-robin.html>
- [28] <https://fr-fr.facebook.com/LE.ROBINOSCOPE/>
- [29] La desegno por la 150a datreveno de Zamenhof: <http://lerobinoscope.canalblog.com/archives/2009/12/15/16166030.html>
- [30] Bildfilmeto de Robin Guinin pri la rezulto de EDE ĉe la Eŭropaj balotoj de majo 2019: <https://www.facebook.com/LE.ROBINOSCOPE/videos/vb.590860637591928/376895542921635/?type=2&theater>



Zamenhof rokemus far Niko Voloŝin



Bildrakonto kun SuperZam, de Ian Carter

Vatto

Mono por Interŝanĝo en Loka Komunumo – Kiel uzi ?

Huzimaki Ken'iti

1. Kio estas «mono» ?

Mono, per kiu ni faras aĉeton en vendejoj, estas peranto de nia interŝanĝo. Estas facile komprenebla fakto, ke interŝanĝo pere de mono multe pli oportunas ol rekta interŝanĝo de varo al varo. Ni ne bezonas porti al bazaro korbon da fiŝoj por akiri rafanojn; nek sakon da karotoj por akiri kilogramojn da viando.

Per la uzo de mon-bileto (presita paperfolio) kaj monero (ronda metalpeco), kiel atestiloj de nia komercado, ni liberiĝis de ĉiufoja portado de pezaj aĵoj. Per mono, kiun mi akiris de s-ro A interŝanĝe kun fiŝoj, mi povas aĉeti freŝan legomon de s-ino B. Tiamaniere, ne nur inter du homoj, sed eblas ankaŭ interŝanĝo inter pluraj homoj. Krudan fiŝon kaj freŝan legomon ni ne povas konservi longe, sed monon ni povas ŝpari por la neceso en estonteco. Se oni havas interkonsenton, oni povas kolekti monon, kaj per la sumo konstrui ponton, vojon, kunvenejon kaj tiajn sociajn necesajn, kiujn efektivigi ne eblas al unuopulo. Ricevi monon de iu homo signifas, ke ni fidas kaj akceptas lin en nian komunumon. Oni diras, ke mono estis ŝtonero aŭ konkajo en antikva tempo. Ĉiuokaze mi kredas, ke «mono» estas genia eltrovaĵo aŭ inventaĵo de la homaro, same kiel «lingvo» kaj «fajro».

2. Sed, atendu momenton...

Mono, mono, mono... Ĉu vi ne sentas, ke tiu ĉi oportuna ilo tamen nun tirane regas nin? Ĉu estas nur mi sola, kiu sentas ke homo estas nun sklave manipolata de mono? Mi supozas, ke ankaŭ vi, kiu nun legas tiun ĉi artikolon, estas iam turmentita aŭ nun turmentata de mono. Se ne, vi jam ne bezonas legi plu.

Duoblon, eĉ trioblon de la sumo ni devas redoni al la banko, se ni pruntas monon kun alta kunmetita interezo, por konstrui loĝ-domon. En Japanio eĉ troviĝas homoj, kiuj mortigas sin, por eviti la interezan inferon, kiu senĉese pelas ilin al maltrankvilo, ĉagreno kaj timo. Iu greka filozofo diris: «Ŝanĝiĝas ĉio en la universo.» Vere, ĉio maljuniĝas, perdiĝas, kadukiĝas, putras, kaj difektiĝas. La domo nove konstruita fariĝos kaduka domaĉo post kelkdekoj da jaroj. Kial tamen la interezo de la pruntita mono kreskas senĉese, kaj multobligas sin senfine kiel kancer-ĉeloj?



Mi kredas ke la celo de homa ekonomia agado estas feliĉo por ĉiuj. Sed nun homoj estas traktataj kiel materialoj similaj al nafto, fero, aluminio ktp. Kiam ni maljuniĝas, kaj kiam la industrio juĝas nin superflujaj, ni estas facile forĵetitaj kiel ne-necesaj ruboj. Daŭre turmentas nin la timo, ĉu la kompanio maldungos nin, kaj ĉu ni perdos la enspezon.

La bankoj prunteprenas monon de ni kun minimuma interezo, kaj pruntedonas al ni kun interezo maksimuma. Droni en troa ŝuldo, bankroti, forfuĝi kaj fariĝi senhejmulo jam estas oftaj fenomenoj en la nuna Japanio. Interza sistemo grasigas homojn jam sufiĉe riĉajn; forprenas la lastan moneron el la poŝo de malriĉuloj, kaj tiel la valo inter la du grupoj riĉa kaj malriĉa multe pli vastiĝas

kaj profundigās. Japana proverbo diras: «Mono rondoiras de poŝo al poŝo.» Sed ĝi ne rondoiras; ĝi evitas la poŝon de malriĉuloj, kaj amase koncentrigās en la poŝo de riĉuloj, kaj tiel tagon post tago kreskas granda malegaleco.



La kolosa monsumo, kolektita pere de bankoj kaj poŝtaj ŝparkontoj, estas uzata por konstrui atomcentralon, aer-havenon, digon ktp, kiuj estas ne necesaj; kiuj eĉ detruas nian naturan medion. Akcentindas eĉ pli, ke la sumo estas uzata por inventi terurajn armilojn, kiuj kapablas mortigi amasegon da homoj en unu spiro da tempo; kaj ankaŭ por provizi armeon per primitivaj tamen kruelaj armiloj, kiel minoj, kugloj ktp. Nenio estas pli granda medi-detruado ol milito. Registoj kolektas monon el nia poŝo; aĉetas pafilojn per ĝi; trude trenas nin al batalkampoj; kaj devigas nin mortigi homon per la pafiloj! En la nomo de ODA (Official Development Assistance / Oficiala Asistado por Disvolviĝo), riĉaj ŝtatoj pruntedonas monon

kun interezo al progresantaj ŝtatoj. Sed tre dubinde estas, ĉu la pruntita mono estas uzata vere por la bono de la loĝantaro en la koncernaj ŝtatoj? Ĉu ĝi ne iras nur en la poŝojn de la politikistoj kaj potenculoj?

Komerco monon per mono por gajni aĝion profitante kurzan malstabilecon; aĉeti kaj vendi akciojn cele al tuja profito; nominale komerco grajnon aŭ kafo-fabon ankoraŭ ne rikoltitajn. Tiuj falsaj, iluziaj kaj surpaperaj ekonomiaj agadoj konfuzas kaj eĉ difektas nian ĉiutagan realan ekonomion.

Lu greka filozofo diris: «Homo estas mezurilo por ĉio.» Sed nun, ŝajne ĉies mezurilo estas «mono». Oni mezuras la valoron de homo per la sumo de lia salajro. Krome, homoj, kies laboro estas akcesora, ne nepre, ekzemple profesiaj sportistoj kaj furoraj kantistoj ktp, gajnas miloble pli grandan sumon ol farmistoj, fiŝkaptistoj kaj industriaj laboristoj, purigistoj, sen kies laboro nia socio neniam funkcias. Kia stranga inversiĝo! Mono putrigas homan interrilaton. Ĝi malebligas al ni juĝi agon de najbaroj, ĉu sincera aŭ profit-cela. Verŝajne la gaja salutvorto de la vendistino en magazeno estas adresita ne al vi, sed al via monujo. Por enmanigi bagatelan sumon, homo prirabas homon; homo fraŭdas homon; homo eĉ ĉasas homon... Kia malfeliĉo, ke ni ne povas fidi homon, kiu apartenas al la sama specio! Nian vivon ebligas akvo, aero, sun-radioj, tero, plantoj, bestoj, kaj precipe homoj! Nun tamen regas nin la iluzio, ke ĉion ebligas mono...

Malegaleco naskas diskriminacion, kaj diskriminacio estigas malpacon, kaj malpaco rezultigas militon. Ĉu la kreskanta ekonomia malegaleco inter la ŝtatoj nordaj kaj sudaj kondukos nin al la tria mondo-milito, mi timas. Nove eltrovita moderna teknologio, kiu ŝajne garantias al ni brilan estontecon, tamen nepre estas utiligata kiel nova turmentilo al malriĉaj homoj.



Mono estas nur paper-folio aŭ metal-peco, kiu ne uzeblas kiel slipo nek kiel pez-ŝtono. Ĝi estas eĉ vico da ciferoj sur bankkajero, aŭ sur komputila ekrano. Mono, kiu estas ilo elpensita de homo, nun staras alte super homo. Ĝi sklavigas kaj ekspluatas homon; kondutas kvazaŭ Dio en la moderna erao.

Ĉu ni ne povas krei novan monon; kiun ni povas regi; kiu estas ilo por nia ĉiutaga reala ekonomio; kaj kiu estas simpla peranto de nia interŝanĝo? Ĉu ni ne povas denove havi

monon, kiu kamaradece ligas homojn kaj ampleksigas reciprokan fidon inter ni? Ĉu ni ne povas reakiri monon, kiu normaligas nian renversitan mondo-koncepton?

3. Loka Mono

... estas unu el la provoj por solvi la problemojn. Ĝi estas nun praktikata en diversaj mondopartoj, laŭ diversaj konceptoj, en diversaj formatoj.

4. Vatto-sistemo *

... estas unu el la lokaj monoj naskitaj en Japanio. «Vatto-sistemo» estas facile enkondukebla. Por utiligi la sistemon vi ne bezonas registri vin en iun organizon. Vi bezonas nur amikojn, kiuj akceptas «ŝuld-atestilo»-n de vatto, kies specimenon vi trovas en tiu ĉi paĝo.

Supozu, ke vi nun volas aĉeti de s-ro A akvomelonon, kiu kostas 10 eŭrojn, kaj ke vi volas pagi la koston parte per ŝuld-atestilo de vatto (mallonge: «vatto-atestilo», aŭ «vatto»).

La unua paŝo:

Vi devas certigi, ĉu s-ro A akceptos vatto-atestilon aŭ ne. Kompreneble, vi ne povas uzi vatton kiel pagilon, se s-ro A rifuzis. Supozu, ke s-ro A konsentis akcepti vian vatton.

- Homo, kiu akceptas aŭ uzas vatto-atestilon, estas «membro de vatto-amikaro.» Sed la membreco ne postulas de vi registriĝi en iu organizo, nek pagi kotizon.
- Trovi membrojn de «vatto-amikaro» en via proksimo estas tre malfacile, almenaŭ en la nuna momento. Do, vi kreu membrojn de vatto-amikaro en via amika rondo.
- Se vi havas komputilon, kaj ĝi estas ligita al Interreto, vizitu la paĝon: <https://watsystems.net/index.html>. Tie vi trovos koncizan klarigon de vatto-sistemo ankaŭ en la angla kaj germana lingvoj.

La dua paŝo:

Demandu s-ron A, kiom da procentoj de la pago li akceptos per vatto-atestilo. Supozu, ke S-ro A akceptos 20 procentojn. Do vi preparu 80 procentojn per nacia mono, ekzemple per eŭro, dolaro aŭ eno; kaj 20 procentojn per vatto.

- Por kulturi la akvomelonon s-ro A aĉetis semojn, sterkon kaj aliajn agrikulturajn materialojn per nacia mono. Tial vi ne rajtas peti s-ron A akcepti vattojn cent-procente. La akceptita proporcio de 20 procentoj estas sufiĉe granda, do ni povas diri, ke s-ro A estas tre malavara homo.
- La valoro de «unu vatto» samas al la kosto por produkti unu vatton da elektra energio per ventumiloj aŭ aliaj metodoj, kiuj ne tre difektas la medion. «Vatto» havas nenian rilaton kun naciaj mon-unuoj «eŭro», nek «dolaro», nek «eno.» Sed laŭ la nuna kalkulo, la valoro de 10 vattoj proksimume similas al la salajro por unu-hora laborado.
- Por aĉeti la akvomelonon de nia bonkora vatto-amiko s-ro A, vi preparos 8

ŝuld-atestilo (B) Indiku al (A) la indikita nomon de vattoj. Se la nombro de vatto-amikaroj kontroli (B) atestilon kaj peti repaĝon, (A) devas plenumi la peton per interkonsentoj vatre al servoj. Tio ĉi estas la valoro de la loka mono, kiu estas de vatto-amikaro. La nombro de vatto-amikaro devas kontroli monon kiel monon inter homoj kaj naturo. (A) ali _____ jaro / monato / dato (B) dec _____ subskribo <table border="1"> <tr> <td>jaro</td> <td>monato</td> <td>tago</td> <td>de (pagita)</td> <td>al (ricevinto)</td> </tr> <tr> <td> </td> <td> </td> <td> </td> <td> </td> <td> </td> </tr> </table> Se spaco mankas, aligu papereton kun via subskribo.		jaro	monato	tago	de (pagita)	al (ricevinto)						Vatto(j) La interŝanĝo de vatto-luĝas per energio produktita per naturaj fortoj. La valoro de 10 vattoj proksimume egalas al tio de unu-hora laborado.
jaro	monato	tago	de (pagita)	al (ricevinto)								

eŭrojn kaj 2 vattojn.

- En tiu ĉi ekzemplo mi provizore montris, ke s-ro A akceptos vatton je 20 procentoj de la tuta pago. Sed, se vi estas fidinda persono por s-ro A, ekzemple vi estas lia delonga konato, li povus akcepti 100 procentojn per vatto. La proporcio dependas de la situacio kaj reciproka fidiindeco.

La tria paŝo:

Ĉiuj ŝuld-atestiloj de vatto apartenas al unu el la du kategorioj: (1) nove kreita vatto, kiun vi mem naskas en la mondon; (2) rondoiranta vatto, kiun vi ricevis de alia membro de vatto-amikaro. Certigu, kiom da procentoj da nove kreita vatto s-ro A akceptos. Supozu, ke s-ro A akceptos 50 procentojn de la vattoj per nove kreita ŝuld-atestilo. Do vi preparos 1 rondoirantan vatton kaj 1 nove kreitan vatton.

- Se vi ne posedas rondoirantan vatton, bedaŭrinde tiu ĉi negoco devas esti nuligita. La rondoiranta vatto en via mano garantias, ke vi jam faris komercon per vatto antaŭ tiu ĉi negoco, kaj ke vi estas fidinda membro de vatto-amikaro.
- Se vi tamen volas uzi vatton, provu proponi al s-ro A, ke vi pagu 90 procentojn per nacia mono, kaj 10 procentojn per nove kreita vatto-atestilo.

La kvara paŝo:

Skribu informojn per malgrandaj literoj en la suba rektangulo de rondoiranta vatto-atestilo: *jaro, monato, tago*; vian nomon al: *de (paginto)*; la nomon de s-ro A al: *al (ricevinto)*. Ŝparu la spacon por plua rondoirado de la atestilo.

- Via vatto-atestilo iras al s-ro A; kaj de s-ro A al s-ino B; de s-ino B al doktoro C... Tiamaniere klare restas la spuro, sur kiu la atestilo rondoiris de amiko al amiko.

La kvina paŝo:

Pretigu nove kreitan vatto-atestilon. Fotokopiu la ŝuld-atestilon sur la dorsa flanko de tiu ĉi faldfolio, kaj eltondu. Skribu grandan ciferon «1» en la rektangulo de «*Vatto(j)*». Skribu la nomon de s-ro A al: *(A) al*; la vian al: *(B) de*; kaj skribu hodiaŭan daton al: *jaro/monato/dato*. Ne forgesu subskribi. Notu la samon ankaŭ sur la talonon, kiu troviĝas en la maldekstra parto de la atestilo. Tonu kaj konservu ĝin ĉe vi. Jen vi naskis novan kaj veran vatto-atestilon!

- Ĉiu ajn rajtas krei novan ŝuld-atestilon de vatto. La sumo de kreita vatto estas via ŝuldo, kiun vi devas iam nuligi. Sed ne tro timu, ĉar vatto ne grandiĝos per interezo; ĝi restos sama en la grandeco, kiun vi naskis. Ĝi ne havas limdaton por repago. Vi povos iam nuligi la ŝuldon al vatto-amikaro, per via servo kaj varo, kiujn vi disponas.
- Mi kredas, ke vi havas brilan talenton, per kiu vi povas fari viajn najbarojn feliĉaj. Fidu kaj respektu vin mem, kiu estas unu sola estaĵo en la tuta universo. Trovu vian kaŝitan talenton en via interno, kaj utiligu ĝin por viaj vatto-amikoj. Ekzemple, vi povus proponi helpon al s-ro C, kiu natur-maniere agrikulturas sen kemia sterko, sen veneno al insektoj. Vi povus reklami per via buŝo la bonkvalitan kukurbon, kiun s-ino F kulturas. S-ro C kaj s-ino F pagus al vi vatton por tiu servo. Ilojn, kiuj longe dormas en via stokejo, vi povas vendi per vatto al s-ro X, kiu nun preparas sin por formi familion.
- La nove naskita vatto-atestilo iros al s-ro A; de s-ro A al s-ino B; de s-ino B al doktoro C, kaj fine iam ĝi revenos en vian manon. Kiam la vatto-atestilo atingos vin post la ronda vojaĝo, tiam ĝi fariĝos senvalida kaj nuliĝos kun via ŝuldo. Multe pli

humanece, ol naciaj mon-unuoj, kiuj groteske kreskas dum ili iras de mano al mano!

La sesa paŝo :

Al s-ro A vi pagos 8 eŭrojn, 1 rondoirantan vatton, kaj 1 nove naskitan vatton. Kaj vi kun danko ricevos la akvomelonon de s-ro A.

Kiam vi ricevos vatton kontraŭ via varo aŭ servo, metu vin en la starpunkton de s-ro A en tiu ĉi klarigo.

5. Aldone...

En Japanio, ekde la jaro 2000 dum kelkaj jaroj furoris diversaj provoj de Loka Mono, ĉefe pro tiama ekonomia malprospero. Preskaŭ ĉiuj el la provoj tamen jam ŝajne estingiĝis. Naskiĝis internacia elektronika mona sistemo, ekzemple BIT-coin kaj aliaj. Populariĝas pagmanieroj uzantaj kredit-karton kaj aliaj elektronikaj rimedoj. Sed la mono funkcia mondscale kaj la mono oficiale agnoskita de ŝtatoj pli grandigas ekonomian diferencon inter riĉaj kaj malriĉaj popoloj. Tiaj monoj akumuliĝas kaj iras nur al granda kapitalo, kaj al la manoj de malmultaj miliardoj.

La koncepto de Loka Mono sciigas al ni, ke mono ne estas io natur-devena, sed estas nura sistemo kreita de homoj mem. Ni ne servu al mono, sed kontraŭe, mono servu al ni.

Vatto, kreita kaj cirkulanta paperforme, estas utila inter homoj, kiuj rilatas kun la aliaj vizaĝ-al-vizaĝe en loka malgranda komunumo. Mi sugestas, ke ni povas utiligi Vatton kiel atestilon de interŝanĝo surbaze de reciproka konfido.

Cetere, la sistemoj funkciantaj per elektronika sistemo ne estas fortikaj. Ili facile haltigas sian funkcion, se ili perdos la provizon de elektro, ekzemple kiam okazos grandaj naturaj katastrofoj. Ŝtataj monoj falos en hiper-inflacion, se la ŝtatoj senbride eldonos monbiletojn kaj perdos fidon de la popoloj, ekzemple kiam okazos granda milito en la mondo, en kiu lastatempe ŝtataj interrilatoj fariĝas pli kaj pli streĉaj. En ĉia kaosa stato, ĉu natur-katastrofa aŭ ĉu milit-detrua, homoj vivos kaj devos vivi. Se malfeliĉe ni falus en tian staton, tiam vi rememoru la lokan monon «Vatto», kiu povus funkcii kiel homeca rimedo por interŝanĝo.

Huzimaki Ken'iti (32659)

Esperanto-Societo en Numazu

Noto :

[*] «Vatto-sistemo» estas iniciatita de japana ekonomikisto s-ro MORINO Eiiĉi.

Rusa inteligentularo – disfloroj, faloj kaj renaskiĝoj

Nikolao Gudskov

Ne ekzistas io pli banala dum lastaj 150 jaroj, ol meditoj de rusa inteligentulo pri la sorto de la rusa inteligentularo. Kaj mi tre riskumus fariĝi iom ridinda, se mi verkus tiun ĉi tekston en la rusa. Tamen, mi verkas por la internacia publiko, kiu ne troviĝas ene de la temo, do, espereble, la artikolo prezentos iom pli da komprenemo kaj intereso. Des pli ke kompreni la rusan kulturon sen kompreno de la nocio ne eblas – ĝi estas, verŝajne, unu el la centraj aferoj, kiuj determinis la historion de Rusio ekde la mezo de la 19-a ĝis komenco de la 21-a jc. Kaj, samtempe, ĝi estas termino, ne difinebla precize kaj diversmaniere aspektanta kaj perceptata, kiel Proteo!

1. Lingva aspekto

Komence pri la termino mem. PIV ja mencias la nocion, sed, unue, prenas ĝin en nacia formo «inteligencio» kaj, due, traktas ĝin, verŝajne, laŭ la vortaro « Larousse» kaj notas por ĝi du signifojn:

1. (historia) Klaso de la intelektuloj-reformistoj en la cara Rusio de la 19a jc.
2. Tiu parto de nacio, kiu strebas al sendependa libera penso. Sin. intelektularo.

Unue, la termino «inteligencio» ne sekvas tradicion de Esperanto por nomi sociajn grupojn: la nomoj de sociaj grupoj deriviĝas kutime de la nomo de ties reprezentanto kun sufikso –ar-: burĝo/burĝaro; proleto/proletaro, ktp. Ĉi-okaze estas male: devas esti inteligencio/inteligenciano, kio sekvas alian logikon de la vortderivado.

Krome, etimologie *inteligencio* ne tro konvenas pro socia grupo: ja la latina *intellegentia* signifas «kompreno, menso, ekkona eblo, kapablo percepti». Kvankam la rusa kaj pola lingvoj draste ŝanĝis tiun signifon, ne nepras fari la samon en Esperanto!

Due, mi kredas, ke ambaŭ difinoj suferas pro gravaj mankoj (la dua malpli, la unua pli). En la unua difino estas menciata «socia klaso», sed la neklasa (ekster-, super- ks.) naturo de la fenomeno estas grava aspekto, ni parolos poste pri tio detale. Krome, tiu difino rilatas ne nur al la cara periodo de la rusia historio, kaj kial ĝi limiĝas je tiuj historiaj kadroj, ne klaras. Kaj krom la rusa kultura tradicio, la vorto same apartenas al la pola! La dua difino estas pli bona, sed tro larĝa, kaj iom perdas la specifecon de la fenomeno. Do, tiun radikon el PIV nepre necesus forĵeti – kaj pro lingvaj, kaj pro enhavaj kaŭzoj, kaj enkonduki la derivaĵojn de «intelligent-» kun la sufiksoj –ul- kaj –ar-.

Nun pri la baza radiko. PIV donas la sekvan difinon:

- **intelligent'a.** Facile komprenanta k vikle pensanta: inteligenta infano, lernanto, servisto, mastro; mi cirkuligis ĝin inter negranda nombro da inteligentaj hebreoj (Zamenhof); la plimulto de la inteligenta mondo (Zamenhof); la inteligentaj homoj estas ĉiam malfavore rigardataj de la registaroj; (f) inteligentaj rigardoj, respondoj. Vd. prudenta, sagaca, saĝa, sprita.

Estas tute klare, ke inteligentulo, kiel homo «facile komprenanta kaj vigle pensanta» estas tute orda apliko de la vorto, sed jam en la zamenhofaj ekzemploj de uzo ĝi signifas ion alian: tiu pri «intelligentaj hebreoj» temas ne (simple) pri ilia elstara pensmaniero, sed ĉefe pri ilia aparteno al certa socia grupo; «inteligenta mondo» fakte signifas «intelligentularon», same kiel suspektemaj por registaroj estas ne homoj vigle pensantaj, sed pensantaj *kritike*, kio estas tute ne la samo! Ankaŭ en zamenhofaj ekzemploj en PIV pri la vortoj «neinteligenta, malinteligenta» ni vidas la samon: *la hebreo estis tre malinteligenta* (Zamenhof); *la bopatrino per malinteligenta babilado elvokas mokadon* (Zamenhof). Zamenhof, kiel homo edukita en la ruse-pola kultura tradicio, subkonscie metis en la radikon «intelligent-» la signifon, kiun li konstante uzis en tiuj lingvoj! Evidente, «inteligenta» havas en la uzado iun kroman signifon, kiu riveligas en koncernaj kunteksto.

Ankoraŭ unu rimarko. La vortoj «intelligentulo» kaj «intelligentularo» estas uzataj en du sencoj. La unua senco estas tio, pri kiu ni parolos, kaj kio estas la difino de certa soci-kultura fenomeno: *intelligentulo estas homo, kiu, pro alta klero kaj evoluiginta konscienco kritike rilatas al la ekzistanta socia ordo kaj serĉas la vojon por ĝin ŝanĝi; intelligentularo estas grupo de tiaj homoj, kiun karakterizas socia reflekcio kaj kiu strebas ellabori novajn sencojn por la nacia vivo*. La dua senco, ofte menciata kaj en oficialaj dokumentoj, kaj en ĉiutaga uzo, estas simple *socia tavolo de homoj, profesie okupiĝantaj pri la mensa, precipe komplika, laboro*; depende de la sfero de la okupiĝo oni distingas la scienc-teknikan, korean (artan), amasan (kuracistoj, instruistoj), eĉ militan ktp. intelligentularon. Ofte en oficialaj paperoj intelligentularo egalas simple al tuto de la homoj kun universitatnivela klero. Tiu kompreno ja rajtas je ekzisto, sed ĝi ne reflektas histori-kulturan aplikadon de la nocio.

Nur malgranda rimarko pri la klero: kvankam plejofte intelligentulo ja finas iun superan lernejon, en la 19-a jc. eblis esti intelligentulo kun koncerna mensa laboro post nur gimnazio; iuj grandaj intelligentuloj edukiĝis ĉefe mem, ne fininte iun universitaton – kiel Maksim Gorkij, Sergej Jesenin, Iosif Brodskij... Sekve, tiu kriterio estas tro formala.

Ni poste revenos al pli detala klarigo de la enhavo de la nocio, sed komence necesas skize sekvi la historion de la intelligentularo en Rusio.

2. Apero de la subjekto kaj de la vorto

Literaturo pri la rusa intelligentularo estas grandega, nur la plej pigra filozofo aŭ publicisto ne esprimis sin pri la temo. Sed, paradokse, plejparto de la almenaŭ iom valoraj verkoj venas de la kontraŭuloj de tiu socia grupo fare de reprezentantoj de la ŝtatestraj opinioj aŭ de la «eksaj intelligentuloj», kiuj klarigas, kial ili ne volas plu al ĝi aparteni. Sed ĝuste el tiu, grandparte negativa, priskribado de la entoj de la intelligentuloj kaj intelligentularo reale eblas ricevi la veran, kaj tute ne negativan, «portreton» de la fenomeno – aŭ, tio, kion la kritikantoj opinias la plej negativa, por posta objektiva opinio, aspektas kiel granda merito!

Ekzistas debatoj pri tio, kiam kaj kie la nocio aperis: ĉu unue en la rusa aŭ en la pola, kaj kiu de kiu ĝin pruntis. Siatempe la rusa verkisto kaj publicisto Piotr Boborikin (1836–1921, nun liaj verkoj estas praktike plene forgesitaj) fiere anoncis, ke li la unua uzis la vorton en la moderna senco en 1860-aj jaroj – sed ne ĉiuj al li kredas. Ĉiukaze, tiu

vorto aperis en la postreforma Rusio kaj Pollando, signifante la novan socian grupon. Sed la grupo mem aperis, evidente, iom pli frue.

Foje oni parolas, ke inteligentularo aperis fine de la 18-a jc., kiam sin montris alte klera tavolo de nobelaro, kun propraj imagoj pri la evoluo de la lando (relative progresema). Multaj el tiuj kleraj nobeloj estis membroj de framasonaj loĝioj. La plej elstaraj reprezentantoj estis verkisto Aleksandr Radisĉev (1749-1802) kaj klerigisto-eldonisto Nikolaj Novikov (1744-1818) – ambaŭ suferis persekutojn de Ekaterina la 2-a. Estis ankaŭ aliaj similaj kritike agorditaj nobelaj pensuloj. Tamen, ili ĉiuj devenis el aristokrataj rondoj, kaj estis posedantoj de grandaj bienoj kun servutuloj. Literatura kaj cetera mensa laboro estis por ilia materia stato nur akcesora okupo. La samo rilatas al radikalaj nobelaj reformemuloj kaj eĉ revoluciuloj de la 19-a jc., inkluzive decembrojstojn (organizintoj de la kontraŭcara kaj kontraŭservutisma ribelo 14.12.1825), eĉ se ili strebis al konstitucia aŭ respublika aranĝo de la rusia politika sistemo. Ĉiuokaze, ĉiuj, kiujn oni tiam nomis «kleraj klasoj», apartenis al nobelaro kaj klerikaro; apartaj reprezentantoj de subaj sociaj tavoloj, hazarde trafintaj en universitatojn, estis esceptoj.

La situacio ekŝanĝiĝis en 1830-aj–40-aj jaroj, kiam la evoluiĝanta socio ekbezonis ĉiam pli da kleraj homoj – oficistoj, kuracistoj, inĝenieroj, juristoj ktp. Nobeloj ne sufiĉis por akiri tiujn profesiojn, kaj ĝenerale ili tradicie inklinitis al oficiraj postenoj en gvardio, armeo kaj floto. Do, neeviteble universitatoj devis akcepti kaj ellasi en la socion ĉiam pli da filoj de malaltrangaj pastroj, negocistoj, eĉ etburĝoj... Tiuj homoj, ricevintaj kunigan nomon «diversranguloj», fariĝis la nova «kleraj klasoj», kiuj, kune kun senhaviĝintaj etnobeloj, kvante superis la tradiciajn nobelojn, kaj estis iom pli proksima al la popola vivo. La ĉefa enspezofonto por ili estis salajritaj postenoj kaj honorarioj. Ili ekokupis multajn ŝtatajn postenojn, kaj alportis al la socio novajn vivmanierojn, ankaŭ novajn vivprincipojn kaj idealojn. La universitata, kaj eĉ tiama gimnazia kleriĝo, instruis ilin pensi memstare, kaj tiu kutimo al memstara kaj kritika pensado agordis ilin kontraŭ konservativa absolutisma ordo. Demokratia deveno elvokis demokratiajn simpatiojn kaj ideojn. Do, al la fino de 1840-aj jaroj aperis la socia grupo, aŭ tavolo, kiu poste ricevis la nomon «inteligentuloj» [1].

Kiel la unuan veran inteligentulon, la «patron de rusa inteligentularo», oni ofte mencias Vissarionon Belinskij-on (1811-1848), kiu estis literatura kritikisto, filozofo kaj publicisto. Ĝuste liaj artikoloj pri la rusa literaturo formis pensmanieron de la unua generacio de la rusa inteligentularo de 1840-aj–50-aj jaroj. Kiel formiĝis pensmaniero kaj idealoj de tiu tavolo, videblas el la romanoj de la unua verkisto-inteligentulo Nikolaj Pomjalovskij (1835-1863) «Etburĝa feliĉo» kaj «Molotov». En 1850-aj jaroj formiĝas tuta aro da pensuloj-inteligentuloj, la ĉefaj ideoj gvidantoj de kiuj komence estis Nikolaj Dobrolubov (1836-1861) kaj Nikolaj Ĉerņiŝevskij (1828-1889). En la romano de la lasta «Kion fari?» la naskiĝanta socia grupo ricevis simplan nomon «novaj homoj». Pro kritika rilato al ĉio, reprezentanto de inteligentulaj valoroj, heroo de la romano de Ivan Turgenev «Patroj kaj filoj», Bazarov nomas sin «nihilisto» – de la latina *nihil* – nenio, t.e. «homo, kiu nenion senkontrole fidas», sed la vorto rezulte estis aplikata nur al la plej radikalaj pensuloj, kaj poiomete malaperis. Sed la vorto, ĉu enkondukita de P. Boborikin, ĉu pruntita de la samtempaj polaj publicistoj, ĉu «densiĝinta el la aero» pro reala bezono, meze de la 1860-aj jaroj disvastiĝis kaj ekvivis [2].

3. Socia aparteno de la inteligentularo

Aperinte en la fino de servutisma epoko pro kresko de burĝaj rilatoj en la socio, inteligentularo grave kontribuis – almenaŭ ideo – al la revoluciaj reformoj de la fino de 1850-aj kaj 1860-aj jaroj. La ĉefa, centra reformo estis abolo de la servutisma jura sistemo, tamen ĝin akompanis pluraj akompanaj liberalaj ŝanĝoj, kiuj ebligis rapidan evoluon de kapitalismo. Jes, la reformoj estis efektivigitaj «desupre», sed sen «desubaj» puŝoj ili nek komenciĝus, nek venus al certa logika fino. Tiuj desubaj puŝoj estis diversgrade radikalecaj – de tute moderaj ĝis revoluciemaj, sed ĉiukaze ĉiuj novaj sociaj ideoj kaj projektoj venis de la kleraj reprezentantoj de rusia loĝantaro, kiuj ja konsistigis la inteligentularon. La socia penso plej vigle funkciis antaŭ, dum kaj tuj post fino de la plej gravaj reformoj, kaj la homoj, kies pensmaniero formiĝis en tiu periodo – 1860-aj jaroj – ricevis la nomon «sesdekjaruloj». Por postaj generacioj de la inteligentularo ili ĉiam estis modelo pro kuraĝa konduto, libereco de sinesprimo kaj freŝeco de la portataj ideoj. En postaj jardekoj (1870-1900) novaj generacioj de inteligentuloj fariĝis plejparte iom pli moderaj, eĉ se la samaj jardekoj naskis aron da radikalaj revoluciuloj (inkluzive teroristojn). Ĉiukaze, apero de inteligentularo estis nepra rezulto de disvolviĝo de la kapitalismo, kiu ne eblas sen vasta tavolo de kleraj homoj. Tio, ke grandparte la inteligentuloj estas agorditaj kontraŭkapitalisme, estas neevitebla kontraŭdiro de la ekonomia evoluo en Rusio.

Inteligentuloj, kiel nova klera tavolo, radikale diferencis de la ĉefa antaŭa «klera klaso» – nobeloj-bienuloj. Ilia klereco ne estas ricevata kiel simpla heredaĵo, ne estas akcesoraĵo de la klasa aparteno, sed estas atingata per propraj fortoj. En multaj rilatoj ili aspektis kiel nobeloj kaj riĉaj negocistoj, do, kiel «sinjoroj», de la alia – laŭ la moroj kaj konduto draste diferencis de la nobeloj: kompreno pri tio, kio decas, pri homa digno ktp. estis tute alia. Por «diversrangulo» tia solvo de interhoma konflikto, kiel duelo, ne akcepteblis, virino estis konsiderata (eĉ se ne ĉiam sincere) kiel egala al la vira estaĵo, tial tia traktado de ŝi, kiel kisado de manoj (anstataŭ kiu aperis manpremoj!) ks. estis neakceptebla, kaj multaj similaj trajtetoj, kiujn oni deekstere ne bone vidis, sed kiuj tre okulfrapis kaj al ili mem, kaj al la sinjoroj.

Nun necesas klarigi, kial la inteligentuloj – ĉu ni prenas la terminon en la plej vasta, ĉu en speciala senco de la vorto – principe ne estas iu aparta socia klaso, sed nur tavolo, aŭ intertavolo. Unue, laŭ klasike marksisma starpunkto, ĉar ili ne ne havas apartajn rilatojn kun proprieto: inteligentuloj kutime ne posedas signifan proprieton, kaj ricevas vivrimedojn kiel salajruloj. En tiu senco ili proksimas al la laboristoj. Samtempe, relativa malmulteco da kleraj homoj, kaj karaktero de la mensa laboro, kiu starigas klerulojn al la gvidaj postenoj, devigas pagi al ili pli grandajn salajrojn, ol al la manlaboristoj. Tial vivmaniere ili proksimiĝas al la mastroj – burĝoj kaj nobeloj. En tiu rilato ili apartenas al la «meza klaso». Samtempe ili tre diferencis de sociaj grupoj kun similaj niveloj de enspezoj – etburĝoj, riĉaj kamparanoj, malaltrangaj nobeloj-oficiroj ktp. Socia deveno kaj karaktero de la laboro ankaŭ povas esti tre malsamaj (vilaĝa instruisto el kamparanoj kaj universitata profesoro el negocista familio laŭ neniun sociologia modelon apartenas al la sama klaso!). Do, ili estas iu meza intertavolo, supre de kiu troviĝas «mastroj», kaj malsupre – la «popolo». Neeviteblas, ke, malgraŭ propra sinkonscio, ofte pli forta ol la klasa, diversaj partoj kaj reprezentantoj de inteligentularo reale inklinis jen al tiuj, jen al aliaj klasaj interesoj. Tio estis, cetere, unu el la fontoj de malfido al inteligentularo kaj de la mastroj, kaj de la subaj sociaj tavoloj.

Estas interese, ke, kvankam oni atribuas difinon de la inteligentularo kiel socia «intertavolo» al marksistoj (foje eĉ al Lenin, kiu ja neniam ion tian diris), la aŭtoreco de la difino apartenas al la reakciega cara ministro pri internaj aferoj en la fino de la 19-a jc. V. Plev (poste murdita de socialistoj) en lia klarigo pri la inteligentularo al la ĉef-prokuroro de Sankta Sinodo K. Pobedonoscev: «Inteligentularo estas intertavolo inter la popolo kaj nobelaro, senigita de la bona gusto propra al la popolo» (notindas, ke inter monarkiistoj-reakciuloj ankaŭ ĉeestas certa «adoro» de la popolo!). Nu, poste vere en la sociaj difinoj de Stalin kaj postaj sovetiaj gvidantoj inteligentularo estis nomita ĝuste «socia intertavolo» aŭ «tavolo».

Kritikemo kaj, tial, eterna opoziciemo de la pensmaniero de inteligentuloj (kiu ĉiam minacis transiri al realaj agoj – kaj ja ofte transiradis) neeviteble elvokis suspektemon de la regantoj de la socio, en kiu ne ekzistis veraj politikaj liberecoj. Samtempe, sen kleraj homoj administri la ĉiam pli komplikitan ŝtatan sistemon ne eblas. De tio devenas la ambigua rilato de la reganta klaso al inteligentuloj: ili estas ja nepre bezonataj, sed samtempe ĉiam suspektindaj! La caraj registaroj ĉiam provis kvietigi la danĝerajn tendencojn de kleruloj, donante al la plej lojalaj promociojn kaj privilegiojn, la plej sukcesaj pro meritoj povis ricevi nobelecon (de persona ĝis hereda) – sed ĝenerale la tavolo neniam estis absolute lojala, eĉ se ĝiaj apartaj reprezentantoj fariĝadis fidelaj servantoj de la registaro. Ne hazarde jam en 1882 la caro Aleksandro la 3-a mem pro liberalaj apelacioj al lia mizerikordo de liberalaj gazetoj ne mortekzekuti revoluciulojn, donis al ili faman difinon «putra inteligentularo»... De tiu tempo en ĉiuj similaj okazoj reakciuloj kaj konservativuloj de ĉiuj specoj volonte uzis tiun difinon. Samtempe la «popolo», kiun senrezerve amis kaj al kiu plenanime strebis servi la intelektuloj – iufoje eĉ koste de sia libereco kaj vivo, ne tro distingis la inteligentulojn kaj nobelojn – por la kamparanoj kaj eĉ subaj tavoloj de urbanoj ili ĉiuj egale estis sinjoroj [3]. Do, fremduloj por ĉiuj...

Do, inteligentularo kontraŭstaris al la konservativa ŝtata povo, kiun esprimis unuavice la nobeloj, kaj al la «popolo», al kiu ili strebis servi. Sed estis ankoraŭ unu opozicio: etburĝaro, kiun kontraŭstaris inteligentuloj en ĉiuj periodoj de sia ekzisto. La plej forta akuzo por inteligentulo ĉiam estis tiu pri «etburĝeco» [4], etburĝa gusto kaj moroj estas simbolo pri ĉio malalta, malbona ktp. Kial? Nu, laŭ la enspeznivelo diversaj tavoloj de inteligentuloj kaj etburĝoj estis pli-malpli similaj, laŭ oficiala pozicio en la socio – ankaŭ. Sekve, laŭ pure sociaj, klasaj kriterioj ili estas mikseblaj. Sed la klereco, edukkaraktero, konformismo rilate al la ŝtato, pretendoj al la gvida rolo en la socio estis tiom malsamaj, ke nepre necesis emfazi sian drastan diferencon kun tiu abomena klaso. En rilato de inteligentuloj al la etburĝeco iom reflektiĝis la rilato de nobeloj, por kiuj tio estis iu «difektita» popolo – ja simpluloj, sed jam sen certa origina «pureco». Kun la nocio «etburĝeco» en la inteligentulara leksikono tre proksimis (sed ne sinonimis) la vorto «vulgareco» [5], ankaŭ ĝi estis io malallasebla por vera inteligentulo.

4. Inteligentuloj en la rusa kulturo de la 19-a jc.

En la 20-a jc. ĝuste inteligentuloj estis la ĉefaj kreantoj de la nacia kulturo – ekde literaturo kaj arto ĝis sciencaj malkovroj kaj teknikaj inventoj, kaj por ni nun tio ŝajnas natura. Tamen komence de la 19-a jc. la kulturajn valorojn kreis reprezentantoj de la nobela klaso aŭ speciale trejnitaj por tio servutuloj, plene dependintaj de siaj mastroj. (Paralele ekzistis folkloro, kies kreintoj estis ĉefe sennomaj kamparanoj). Sed la periodo

inter la apero de la inteligentularo kaj la rusaj revolucioj estis transira periodo, kiam la kreintoj de la kulturo ankoraŭ ne ĉiam estis inteligentuloj-diversranguloj, sed samtempe la nobeldevenaj kreantoj ĉiam pli fariĝadis esprimantoj de la demokratiaj ideoj kaj, tial, spiritaj gvidantoj de inteligentularo. Pro manko de libera presado en Rusio ideoj gvidantoj de inteligentularo fariĝis verkistoj kaj literaturaj kritikistoj, sed ne politikistoj kaj filozofoj.

De la ideo vidpunkto, inteligentuloj estis, en la rusaj terminoj, komence okcidentistoj kaj, poste, ankaŭ popolemuloj [6]. Laŭ la politikaj starpunktoj, ili estis socialistoj aŭ liberaluloj, filozofie materiistoj aŭ/kaj pozitivistoj [7], rilate religion estis aŭ ateistoj (ofte ardaj) aŭ, almenaŭ, kontraŭklerikuloj [8].

Kiel jam estis dirite, la unua ideo «patro» de inteligentularo estis V. Belinskij – mem tipa «diversrangulo», kvankam ankoraŭ kun etnobela deveno. Lia ideo evoluo iris de la germana ideismo (ĉefe Hegela) ĝis, fine de la vivo, historia materiismo (verŝajne, la unua en Rusio li legis kaj ĝuste komprenis fruajn verkojn de Markso). Li estis literatura kritikisto kaj ellaboris certajn demokratiajn estetikajn kriteriojn, sed, plej gravas, disvastigis ideojn pri socialismo kaj justeco. Malgraŭ frua morto, li restis unu el la ĉefaj instruistoj de la inteligentuloj por jardekoj. Similan rolon ludis alia literatura kritikisto – N. Dobrolubov, kies artikoloj enhavis sociajn ideojn, multe pli larĝajn ol simpla estetika pritakso de certaj literaturaĵoj. Ankaŭ treege gravis verkoj de N. Ĉerniŝevskij, kies disertaĵo «Estetika rilato de la arto al realo» fariĝis esprimilo de la ekreginta tiam paradigmo de la realisma arto. Por propagando de antropologia materiismo kaj socialismo gravan rolon ludis lia romano «Kion fari?». Ĝin li sukcesis aperigi laŭleĝe, malgraŭ ke li jam estis arestita pro revolucia proklamo. Poste li multajn jarojn pasigis en prizono kaj ekzilo, sed liaj ideoj restis efikaj dum pluraj jardekoj, lin opiniis «klasikulo» kaj «antaŭulo» kaj sovetiaj ideologoj, kaj postrevoluciaj rusaj elmigrintoj de la maldekstra speco. Kompreneble, snobecaj nobeloj ne toleris eĉ lian nomon mem: jam en 1938 V. Nabokov aperigis la romanon «Donaco», en kiu li kreis venenan parodion al la biografio de Ĉerniŝevskij por ke li por ĉiam estu senkreditigita.

Konstante influis la rusan pensadon el eksterlanda ekzilo Aleksandr Herzen (1812-1870), tre sagaca filozofo kaj publicisto, aŭtoro de la koncepto de la «rusa socialismo». Kvankam en la rusa pensa historio pli evidentis influo de aliaj ideologoj de popolemismo, en la 19-a jc. kaj poste sur la fono ĉiam ĉeestis verkoj de Herzen.

Inter inteligentuloj de 1860-aj jaroj estis grupo de «nihilistoj», aŭ, laŭ la propra sindifino, «pensantaj realistoj», kies ĉefa gvidanto estis Dmitrij Pisarev (1840-1868). Ili estis tre radikalaj, sed pli liberaluloj ol socialistoj; pli ĝuste, por ilia demokrateco tio momente ne gravis, sed gravis klerigo de la popolo en la spirito de materiismo kaj ateismo (aŭ agnostikismo), Pisarev, krome, distingiĝis per ekstrema kontraŭestikismo kaj «senmaskigo» de ĉiuj rusaj kulturaj adoraĵoj, inkluzive Puŝkin-on. Post lia morto tiu nihilismo ne tre riveliĝis.

Sed la ĉefaj inspirintoj de la inteligentulara popolema penso en 1860-aj jaroj fariĝis la poeto Nikolaj Nekrasov (1821-1877) kaj verkisto-satiristo Nikolaj Ŝŝedrin (vera nomo Miĥail Saltikov, 1826-1889). Ambaŭ ne estis mem inteligentuloj, devenis el nobelaj familioj kaj posedis bienojn, Saltikov estis ŝtat-oficisto (eĉ foje vicguberniestro), sed iliaj verkoj, plenaj je amaraj bildoj de la moderna vivo kaj akra satiro pri ĝi estis esprimilo de la pensoj, unuigantaj ĉiujn inteligentulojn sendepende de iliaj personaj

mondkonceptoj, de liberaluloj ĝis socialistoj kaj anarkiistoj. Eĉ pli gravis laboro de Nekrasov kiel ĉefredaktoro de literaturaj revuoj ("Samtempulo", «Patrolandaj notoj»). Ĝenerale, eblas diri, ke certaj literaturaj revuoj, pro manko de aliaj rimedoj en situacio kun tre limigitaj civitanaj liberecoj, ekde 1840-aj jaroj ĝis 1980-aj estis la ĉefaj unuigiloj kaj opiniesprimiloj por inteligentularo. Principe, la inteligentularo ĉiam estis literatura homgrupo.

Tamen, la plej influa ideologo de popolemismo, la ĉefa tendenco de la inteligentularo, en 1870-aj–1890-aj jaroj estis Nikolaj Miĥajlovskij (1842-1904), plej ofte elpaŝinta kiel literatura kritikisto. Li estis brila publicisto, sed unuavice interesa sociologo-pozitivist, aŭtoro de grava verko «Kio estas progreso», certa «Biblio» de la popolemuloj.

En 1890-aj jaroj la popolemismo komencas malofensivi pro penetra en la rusan penson de marksismo – unuavice pro tio, ke neevitebleco de kapitalisma evoluo de Rusio, kaj utopieco de kamparana-komunuma socialismo, fariĝis evidentaj. La ĉefa populariganto de marksismo – kaj batalantoj kontraŭ popolemula ideologio – fariĝis Georgij Pleĥanov (1856-1918), kies verkoj laŭ sia influo je inteligentuloj fariĝis nova signifa faktoro. Estas interese, ke al marksisma kompreno de la socio venis kaj radikalaj revoluciuloj el eksaj popolemuloj, kaj pluraj liberaluloj, por kiuj marksismo estis pruvo de progresemeco de la kapitalisma ekonomio kompare al la antaŭaj. Do, komence la plej sinsekvaj okcidentismaj demokratoj – liberalaj kaj socialismaj – agis kune, kontraŭstarinte la popolemon. Pro tio marksismaj ideoj disvastiĝis kaj en inteligentula, kaj en laborista medioj. Tamen baldaŭ la tendencoj disiris, kaj aktivaj marksistoj-liberaluloj kreis la liberalan partion de Konstituciaj Demokratoj, kaj la socialistoj – la Rusian Social-Demokratian Laboristan partion. Eksaj revoluciaj popolemuloj, kiuj finfine komencis trovi komprenon kaj subtenon en la medioj de kamparanoj, kreis partion de Socialistoj-Revoluciuloj. Tiel komence de la 20-a jc. diversaj tendencoj de la inteligentula penso formis la ĉefajn progresemajn politikajn partiojn, kiuj ludis ŝlosilan rolon en la unua kaj dua Rusiaj revolucioj.

La inteligentula medio, edukata unuavice en la universitatoj, en la ĉefa amaso ne disdividiĝis je partioj kaj ne estis radikale revoluciema, kaj ne aliĝis al iuj partioj kaj politikaj grupoj. Tia estis nur ĝia plej agema parto, kiu neniam konsistigis la plimulton de la socia tavolo. Tamen ĝi estis la centro, la magneto, kiu altiris la plimulton, kiu rezulte, malgraŭ ĉiuj diferencoj en la opinioj, havis komunajn principojn. Unue, tio estis malakcepto de la ekzistanta politika reĝimo, eĉ se inteligentuloj laboris ĝenerale en ĝiaj kadroj; tio inkludis ankaŭ religion, kiu priservis la reakcian registaron. Konservativulo, slavemulo ne povis aparteni al inteligentularo, ankaŭ bienuloj kaj grandaj burĝoj, eĉ se ili estis mem grandaj verkistoj, kiel Lev Tolstoj, aŭ mecenatoj subtenantaj artistojn, kiel Savva Mamontov. Due, tio estis kredo je socia progreso kaj demokratio. Trie, tio estis estis konscio pri la devo rilate al la popolo – malkleraj klasoj de laboruloj (komence ĉefe temis pri kamparanoj, poste – ankaŭ pri laboristoj). Psikologie tio estis bazita aŭ sur la propra deveno (mi, kun mia bonstato, ŝuldas al la naskinta min simpla popolo), aŭ, kaze de «pentantaj» nobeloj, je sento de historia ŝuldo al la popolo, pro ekspluatado de kiu la antaŭuloj «grasiĝis». Kvare, tio estis (krom apartaj nihilistoj) absoluta estimo al la kulturo ĝenerale, en ĉiuj ĝiaj riveliĝoj – rilato al kulturaj valoroj estis, eble, la sola religisimila «adoro» de la inteligentuloj. Tio, kompreneble, devenas el la alta takso de la propra klero, kiu estis atingita por plimulto da inteligentuloj per grandaj penoj, kaj kies valoron ili komprenis tre intime. Kvine, la homo devas esti senriproĉe honesta,

perlabori mem siajn vivrimedojn kaj neniam denunci. Homo, kiu ne havis tiujn trajtojn, aŭ grave rompis tiujn regulojn, aŭtomate ne povis esti konsiderata inteligentulo, kaj tial oni poste komparis la socian grupon kiel aron da iniciitoj, aŭ kavalira ordeno, aŭ eĉ kiel kvazaŭeklezion. Tiu, kiu rompis la regulojn, simple ne plu apartenis al la ordeno, kaj tio estis granda honto. Certe, ne eblas ĉiam sekvi ĉiujn postulojn, sed la grado de permeseblaj kompromisoj estas limigita.

Do, averaĝa inteligentulo tute ne estis radikalulo, revoluciulo aŭ politika konspiranto, li nur interne simpatiis al iu tendenco de tiaj homoj. Kiam oni priskribas la modelan ekzemplon de inteligentulo de la unua periodo, oni kutime mencias la verkiston Anton Ĉeĥov (1860-1904). Vere, lia avo estis servutulo, lia patro – etburĝo (butikisto), li mem sukcesis fini universitaton kaj fariĝi kuracisto antaŭ famiĝo kiel verkisto. Liaj verkoj ne havas radikalan politikan patoson, sed kritike (ofte – per humur-satiraj rimedoj) montras la realan socion kaj tion, kio en ĝi ne akcepteblas. Ankaŭ etburĝeco kaj vulgareco estas tio, kion Ĉeĥov plej abomenas, kaj kion li unuavice vipas en siaj verkoj. Certe, li simpatias al kamparanoj (kvankam sobre vidas iliajn malbonajn trajtojn), strebas plibonigi situacion de bagnuloj... Kaj tre gravas la aspekto! Mola rideto, nazumo... Do, mola, komprenema, kvankam samtempe plena de nerompeblaj principoj homo!

5. Zamenhof kaj esperantistoj kiel inteligentuloj

Mi diru, ke tre tipa reprezentanto de la rusa (aŭ rus-pola) inteligentularo estis nia majstro. Li devenis el la klera juda (aŭ, kiel li mem preferis diri, hebrea) medio. Hebreo, kiu elŝiriĝis el la tradicia konservativa medio (cetere, kiel ĉiu «diversrangulo»), neeviteble perdis kun ĝi mensan ligon, kaj devis trovi ĝin en iu alia – plej normale en tiu, en kiu kleriĝis. Tial la kleraj judoj en la kondiĉoj de Rusio neeviteble inkludiĝadis en la rusan inteligentularon, dividante ties ideojn, principojn kaj morojn [9]. Tio jam okazis al lia patro Mordko (Marko), des pli tio validas al li mem, kiu lernis en gimnazio en Varsovio, kaj poste en Moskva kaj Varsovia universitatoj [10]. Tie, en la centra farejo de inteligentuloj de la lando, lia socia aparteno definitive formiĝis. Kaj ideo de la internacia lingvo, kiu plibonigos la vivon de la mondo (kaj, ni rememoru Hilelismon, ankaŭ konkrete de la juda popolo!), estis tipa inteligentula socia projekto. Misiismo de la projekto «Esperanto» estas absolute tipa por la rusa inteligentularo, ĉi-okaze eĉ pli forta ol kutime, ĉar havis la tutmondan skalon. Ni ne enprofundiĝu nun en la demandon, kun kiuj inteligentulaj projektoj ĝi plej proksimas, sed socia aparteno de Zamenhof kaj liaj projektoj evidentas!

Kaj, kompreneble, tiuj, kiuj akceptis Esperanton kun ties interna ideo, kun principa opoziciemo al la reganta en la mondo lingvopolitiko, misiismo, «ordena» karaktero de la komunumo – nu, ni ĉiuj konas la medion, al kiu apartenas – konsistigis apartan taĉmenton de inteligentuloj. Ne rusan ĉi-foje, sed internacian. Kaj, tamen, ne hazarde el la unua milo da esperantistoj 900 loĝis en Rusia Imperio – ili tiutempe pli bone ol ĉiuj sciis esti inteligentuloj [11].

Esperantistaro povas konsisti el reprezentantoj de diversaj popoloj, klasoj, povas havi homojn kun diversa nivelo de ĝenerala klereco – sed ĉiuj tiuj trajtoj estas trajtoj de la inteligentularo. Kaj, sendube, ankaŭ nun aparteno al esperantistaro plu egalas al aparteno al specifa komunumo de inteligentuloj.

6. La 1-a Rusa revolucio kaj la unua krizo de inteligentularo

Kiam, puŝita de la rus-japana milito, en 1905 maturiĝis kaj komenciĝis revolucio, evidentiĝis, ke ĝiaj celoj estas formulitaj de la inteligentularo, kies reprezentantoj formis tri ĉefajn partiojn, esprimantajn interesojn de tri klasoj: socialistoj-revoluciuloj (el antaŭaj popolemuloj) reprezentantoj de kamparana revolucio, konstituciaj demokratoj (okcidentistoj-liberaluloj) – esprimantaj esperojn de la progresema tavolo de burĝaro, kaj social-demokratoj (marksistoj) – esprimantaj strebojn de laboristoj. Klasa esenco de la inteligentularo estas esprimi, eksplike formuli la implicajn tendencojn de strebantaj al sociaj ŝanĝoj klasoj. Tiuj intelektuloj, kiuj esprimadis interesojn de la konservativaj klasoj kaj tavoloj (bienuloj, klerikoj ks.), al inteligentularo ne apartenis laŭdifine.

Sed la 1-a Rusa revolucio ne venis ĝis la fino, atingis nur malgrandajn sukcesojn kompare al necesaj sociaj ŝanĝoj – minimumajn civitanajn liberecojn, reprezentan leĝodonan organon kun limigitaj eblecoj, al kiu la elektoj okazadis nek rekte, nek egale, nek eĉ sekrete... Kaj eĉ tiujn sukcesojn ŝanĝis reakcio kun novaj politikaj persekutoj kaj limigado de formale ekzistantaj liberecoj. Certe, ĉe amaso da inteligentuloj tio elvokis senreviĝon, pasivecon kaj eĉ tiajn fenomenojn, kiuj ne estis penseblaj en pli frua periodo, kiel intereso pri mistikismo kaj religio, certa foriro de principo pri nepra servo al la popolo...

Certaj talentaj reprezentantoj de inteligentularo rekte malkonfesis sian apartenon al la tavolo, kiu ne sukcesis atingi siajn celojn dum la revolucio, kaj malkaŝe proklamis sian aliĝon al konservativismo. La plej fama ekzemplo de tio estis apero en 1908 jaro de la artikolkolekto «Mejloŝtonoj», kiun partoprenis eksaj gvidantoj de liberala penso, iuj eĉ liberalaj marksistoj – N. Berdjaev, S. Bulgakov, P. Struve ka. Oni povas konsideri la libron kiel rezulton de kolektiva reflektado [12] de la inteligentularo, sed de la dekstra starpunkto, ĝenerale kondamnanta kaj materiismon, kaj pozitivismon, kaj alvokanta reveni al ideismo kaj religio. En la kritiko de inteligentularo en «Mejloŝtonoj» estis multaj trafaj kaj korektaj observoj, opinioj kaj konkludoj; ĝi ĝenerale la unuan fojon provis komplekse analizi la fenomenon de inteligentularo en la rusa socio, sed la ĝenerala pozicio de la aŭtoroj estis tute maljusta kaj neakceptebla por kiu ajn progresemo. Sed ĝi, evidente, markis la reale ekzistantan krizon de la ideaj bazoj de tiu socia tavolo, kiu produktis por la socio sencojn kaj la agadprogramojn.

Kaj estas la fakto, ke parto de liberaluloj ektimis revolucionan popolon, kia ĝi montris sin en la praktiko, kaj por kiu inteligentulo – precipe liberala – daŭre restis fremda sinjoro: «Kiaj ni estas, ni ne nur ne devas revii pri kunfandiĝo kun la popolo, – ni devas timi ĝin pli ol ĉiujn ekzekutojn far la povo kaj beni tiun povon, kiu sola per siaj bajonetoj kaj prizonoj dume ŝirmas nin de la popola furiozo», – konfesas unu el la aŭtoroj (kaj iniciinto) de «Mejloŝtonoj» M. Gerŝenzon.

7. Inteligentularo kaj la 2-a Rusia revolucio: la dua krizo

La nefiniteco de la 1-a Rusa revolucio naskis historian bezonon pri ĝia daŭrigo, kaj tial la inteligentularo kaj ĝia kerno, formiĝinta politike, devis plu labori. La revolucionajn eventojn akcelis fremda por la plimulto de la popolo mondmilito, komenciĝinta en 1914. Principe, la socialismaj revoj de inteligentularo ne devus efektiviĝi en proksima perspektivo, restante projekto por estonto, sed pro tio, ke la burĝaro kaj esprimantaj

ties ideologion liberalaj inteligentuloj la militon ja subtenis, ili plene senkreditigis, kaj la povon gajnis la plej maldekstraj radikaluloj el socialistoj-revoluciuloj kaj social-demokratoj (nome, bolŝevistoj). La lastaj baldaŭ en internaj interbataloj forprenis la tutan povon de ĉiuj politikaj konkurantoj, kaj sole ekgvidis la landon.

Venko de radikale socialisma partio en la 2-a Rusa revolucio estis absoluta venko de inteligentularo en sia 80-jara batalo: venkis ĝia ĉefa celo – socialisma revolucio, eĉ se realigita nur de unu el siaj grupoj. En tiu senco, inteligentularo, kiel socia fenomeno, elĉerpis sencon de sia ekzisto kaj devis eklabori ne kiel ideologoj, sed nur kiel fakuloj, servantaj al la amata popolo, libere ĝin klerigante, evoluigante kaj plibonigante ties vivon. Sed la aliaj inteligentulaj projektoj kun siaj portantoj nenien malaperis, kaj pretendis je sia pliboneco kompare al bolŝevistoj. Tial dum la intercivitana milito ni trovas diverstendencajn inteligentulojn ĉe diversaj flankoj de barikadoj, batalantaj jen sub propraj sloganoj, jen aliĝantaj al pli fortaj grupoj – foje eĉ pure reakciaj. Parto de ili – kaj ofte temas pri brilaj cerboj! – poste trafis el eksterlanda formigranta ekzistado, kaj ilia influo al la nacia vivo ĉesis, parto reale devis servi al la nova povo (kiu pretendis prezenti sin kiel la plej adekvata esprimilo de la popola volo), kaj ilia esprimebleco pri sociaj problemoj estis draste limigita. La nova povo – mem inteligentula laŭ la deveno – bone komprenis neceson de la fakuloj, sed ĉiujn, kiuj pretendis je propra politika voĉo, traktis sufiĉe severe. Do, pri ekzisto de inteligentularo kiel tavolo kun pli-malpli unueca socia vizaĝo, post la revolucio kaj definitiva venko de bolŝevistoj dum pluraj jaroj paroli ne eblas: estis nur iamaj ĝiaj reprezentantoj, kiuj povis konservi la antaŭajn ideojn, konduton kaj morojn, sed ne pli.

Tamen la taskoj, kiuj estis starigitaj de bolŝevistoj, postulis drastan pligrandiĝon de la kvanto de kleraj homoj, kapablaj transformi la ekonomion kaj efektivigi industriigon. Sen kultura revolucio, disvastigo de la ĝenerala kaj universitata edukado tio ne eblis. Universitatoj, teknologiaj, medicinaj, pedagogiaj kaj aliaj ĉiuspecaj specialaj kaj superaj lernejoj kreskadis rapidege, kaj tavolo de kleraj homoj fariĝis vere amasa. Ilin, cetere, preparadis la homoj el la antaŭrevolucia inteligentularo, kaj ili tiamaniere konscie kaj subkonscie heredadis multajn trajtojn de antaŭaj inteligentuloj, kvankam plejparto venis el familioj de plej simplaj laboristoj kaj vilaĝanoj. Pro rapideco de la klerigo foje iom falis nivelo kaj kvalito de la preparado, sed ĝin kompensis amaseco de la kleraj tavoloj, en kiu aperadis novaj elstaraj talentoj. Tio kreis la bazon por la nova generacio de inteligentularo, kiu parte estis heredanto de la malnovaj tradicioj, parte havis novajn ecojn. La oficiala ideologio tiam ekparolis pri ĉiuj kleraj homoj, kiel pri tavolo de inteligentuloj, kiu nun fariĝis «laborista-kampana», sed la afero tre baldaŭ ŝanĝiĝis sandirekten al la antaŭrevolucia epoko.

8. Sovetia inteligentularo

Kleraj homoj, aparte en profesioj, kiuj postulas kreadon – sciencistoj, inĝenieroj-konstrukiistoj, verkistoj, ktp. – kutimas memstare pensi, kaj tio estas esenco de ilia agado. Do, malgraŭ ĉiuj ĉirkaŭaj kondiĉoj, ili ne povas ne pritaksi kritike la socion. Limigita libero nenion ŝanĝas tiurilate. Tial en la nova klera tavolo, kaj sub influo de la malnovaj inteligentuloj, en Sovetio en 1930-aj jaroj poiome formiĝas la nova, sovetia inteligentularo. Ĝi denove troviĝis inter la supra kaj kritikenda ŝtata potenco kaj ne alte kleraj klasoj, Sociaj kondiĉoj denove formas ĝin kun la samaj sociaj funkcioj: pripenso pri la propra ekzisto kaj surbaze de tio – ellaboro de ideoj por plibonigi la socion kaj

ŝtaton, unuflanke, kaj peno klerigi la popolon akorde al la propra kompreno, duaflanke. Ne tuj ĝi kristaliĝis, tamen la 1930-aj jaroj estis periodo, kiam ĝi jam definitive aperis.

Por la povo, kiu komence de 1930-aj jaroj ricevis ĉiam pli totalismajn trajtojn, tio estis malagrabra surprizo: ĝi volis havi plene obeemajn fakulojn, sed tiuj ial, eĉ kontraŭ sia propra deziro, rivelis neallaseblan opoziciemon. Estis, kompreneble, multaj konformistoj, kiuj okupiĝis pri propra fako kaj strebis nenion kritikendan rimarki, estis servilaj verkistoj kaj artistoj, kiuj plene dediĉis sin al plenumo de la desupraj mendoj, sed nur el ili konsisti la klera tavolo ne povas. Ĉar la povo ne kapablis tion toleri, ĝia reago fariĝis histeria kaj paranoja. Tial la inteligentularo fariĝis unu el la ĉefaj viktimoj de la tragedia «granda purigo» de 1937–38-aj jaroj – apud la unua generacio de la bolŝevistaj ŝtatgvidantoj, tro memfidaj armeanoj ks. Ĝiaj perdoj tiutempe estis grandegaj, sed la inteligentularo estis bezonata por ekzisto de la ŝtato. Tial en amasaj formoj la fizikaj persekutoj ĉesis, kaj la reprezalioj transiris al formo de atakoj al selektitaj malfavorataj reprezentantoj – tiaspecaj ideologiaj vipadoj estis praktikataj dum lastaj jaroj de stalinismo. Estas mirinde, ke, malgraŭ tiom forta premo, inteligentularo, kiel libere pensanta tavolo, nur pli fortiĝis kaj reliefiĝis. Samtempe Stalin provis subaĉeti inteligentulojn per altaj salajroj, honoraj premioj ks. por ke ili pli fidele servu al li kaj la reĝimo, kaj parte tio sukcesis, sed ĝenerale la totala kontrolo precipe forpuŝis la kreemajn personojn al interna izoliĝo.

Post la morto de Stalin komenciĝis periodo de «degelo» kaj malfortigo (sed neniukaze forigo!) de ideologia kontrolo. Tamen granda plilarĝigo de la sfero de «permesitaĵoj» kaj «allaseblaĵoj», mem severa kritiko de la stalinaj reprezalioj far la superaj partiaj potenculoj rezultis certan fidon far la inteligentularo al la ŝtata povo kaj eĉ dialogon inter ili. Kompreneble, la dialogo povis akiradi krudajn formojn, stalinismaj recidivoj foje aperadis, sed inter 1956 kaj 1968 ĝenerala interkompreno kaj kompromisa kunlaboro de la ŝtato kaj inteligentularo ekzistis. Almenaŭ en la sfero de kulturo la inteligentularo ricevis necesan gluton da libereco por kreema impulso. Ekzemple, unu el demandoj, en kiuj inteligentuloj principe konsentis agi kun la oficialaj ideologoj, estis batalo por la monda paco – eĉ se konkretaj ĝiaj formoj estis diskutindaj; estis ankaŭ kelkaj aliaj punktoj, kie la kompromiso eblis. Krome, pro neceso disvolvi sciencdependan industrion, inkluzive la militan, necesis ĉiam pli da sciencistoj kaj inĝenieroj, kaj tiuj profesioj fariĝis amasaj. Do, ĉiam pli amasa fariĝis inteligentularo, al kiu la povo ne aŭdacis tro kontraŭstari. Certa kompromiso inter inteligentularo, kiu ricevis pli da libereco, kaj la ŝtata povo, kiu estis interesita pri pli aktiva laboro de inteligentuloj, estis elvokita de objektivaj ekonomiaj postuloj.

Necesas noti, ke, se temas pri la epoko de 1950-aj–70-aj jaroj, la paradigmo de la inteligentularo, malgraŭ tuta ĝis natura opoziciemo, ne estis nepre «kontraŭsovetia», direktita kontraŭ la bazaj principoj de socialismo. Oni volis ne renversi, sed reformi, humanismigi la ekzistantan sistemon, krei «demokratian socialismon» aŭ «socialismon kun homa vizaĝo», forigi ĉiujn spurojn de stalina heredaĵo [13]. Oni komparis la atingojn kaj avantaĝojn de la «okcidentaj» landoj kompare al tiuj de Sovetio, kaj volis havi avantaĝojn de ambaŭ sistemoj. La plej radikala starpunkto inter socialismemaj inteligentuloj estis teorio pri konverĝo de reala socialismo kaj liberala demokratio. Notindas, ke la plej fama adepto de tia konverĝo estis Andrej Saĥarov. Do, eblas diri, ke la plimulto da inteligentuloj estis adeptoj de siaspeca socialdemokratia projekto, sed ekzistis grupoj draste liberalaj (burĝe-demokratiaj) kaj eĉ konservativaj, vokantaj al reveno de la hela monarkia pasinteco.

Same, kiel en la 19-a jc., la vivo de sovetia inteligentularo cirkulis ĉirkaŭ literaturo, kaj certaj literaturaj revuoj fariĝis la ĉefa esprimilo de ĝiaj ideoj kaj tendencoj, kaj la redaktoroj de la revuoj – agnoskitaj gvidantoj. Fakte, la plej komuna revuo estis «Nova mondo», kiam ĝin redaktis la poeto Aleksandr Tvardovskij. Ĉiu inteligentulo aŭ abonis la revuon, aŭ almenaŭ regule legis ĝin en bibliotekoj aŭ ĉe konatoj. Ankaŭ gravis aliaj tiel nomataj «progresemaĵ» gazetoj – la revuo «Juneco» (ĉefredaktoro prozisto Boris Polevoj, poste poeto Andrej Dementjev), ĉiusemajna «Literatura gazeto» k.a.. Ilia estetika kaj socia pozicioj, certa plurismo de opinioj, kontraŭstaris la «konservativajn» eldonaĵojn, esprimintaj ortodokse sovetiecan (kaj, foje, eĉ stalinecan) pozicion – kiel «Oktobro» k.s.. Inteligentuloj, kiuj formiĝis kiel aktivaj partoprenantoj de la socia vivo en 1960-aj en tiu progresema medio aŭ sub ĝia influo, ricevis la nomon «sesdekjaruloj»: kompreneble, sub influo de la sama nocio de 1a 19-a jc. Do, en historio de la rusa inteligentularo estis du epokoj de «sesdekjaruloj» – kun proksimume sama socia rolo!

Por imagi la sumon de la ideologio de sovetia inteligentularo en epoko de ĝia disfloro, necesas konatiĝi kun verkaro de la fratoj Arkadij kaj Boris Strugackij [14]. Iliaj utopioj pri humaneca komunisma socio, kies anoj, kiel personecoj, estas produkto de Alta Edukado, reflektas revojn de tiamaj inteligentuloj; la antiutopiaj verkoj – ties timojn kaj abomenojn; ili montras diversdirektajn tendencojn en la ekzistanta socio kaj modelas rezultojn de diversaj evoludirektoj. Tre signifan lokon okupas en ilia verkado tre karakteriza por inteligentularo de ĉiuj epokoj malakcepto de la etburĝaj valoroj, konsumismo ktp. Ĉiuj inteligentuloj konis tiujn verkojn, kaj atendado kaj aperado de novaj verkoj far la fratoj Strugackij estis grava faktoro de la kultura vivo. Kompreneble, la inteligentulaj principoj, kaj trajtoj de la tavolo, reflektiĝis ankaŭ en verkoj de pluraj aliaj aŭtoroj.

La nesolveblaj kontraŭdiroj inter la inteligentularo kaj sovetia povo komenciĝis post la perforta frakaso de movado por demokratia socialismo en Ĉeĥoslovakio en 1968. Tio fermis la revojn pri ebleco daŭrigi la vojon al demokratio sub gvido de la ekzistantaj regantoj. Kvankam ĝenerala nivelo de libereco por la kreado ne principe malpliigis kompare al la formiĝintaj fine de la 1950-aj, ĝenerala senreviĝo kaj fremdiĝo de la inteligentularo kreskis. Kaj al la fino de 1970-aj en la inteligentularo kristaliĝis tri ĉefaj ideologiaj direktoj: apud la demokrati-socialisma tendenco (sub ĝenerala bela, sed ne korekta enhance slogano «revenu al la demokratiaj principoj de Lenin») plifortiĝis konservativa popolema aŭ grundisma tendenco, kiu opiniis portanton de la belaj etikaj kaj ceteraj valoroj la malaperantan kamparanaron, kaj draste okcidentisma liberala ideologio, alvokanta en ĉiuj rilatoj imiti la okcidentan (eĉ plej bone – usonan) vojon.

Notindas, ke en 1970-aj en la naciisma-grundisma grupo aperis fenomeno, poste riveliĝinta ankaŭ en la aliaj – religiemo, kio antaŭe estis por inteligentuloj absolute ne pensebla kaj kiu aŭtomate eligis koncernan personon el inteligentuloj (pro kontraŭdiro al la racio). Sed nun tiu fenomeno aperis kaj fariĝis tolerata. Io simila okazis siatempe dum la unua krizo, sed ĝi ĉesis post 1917.

9. Inteligentuloj kaj disidentoj

En la epoko sen civitanaj liberoj nepras strebo ilin akiri, kaj neeviteblas aktiva batalo por ili. Sed pri tio povas okupiĝi aparta speco de homoj, strebantaj al batalo. Kaj aperadis tiaj homoj ĉiam en sino de inteligentularo. En la 19-a jc. tiaj homoj fariĝis

revoluciuloj-konspirantoj, poste – anoj de politikaj partioj. En la 20-a jc. la politikaj konspiroj ne aperadis – ne pro efika laboro de la sekreta polico (ĝi ne povas plene preventi nek konspirojn, nek eĉ armitan opozicion), sed pro alia agordiĝo de la homoj. La batalemaj aktivuloj defendis la bazajn homajn rajtojn ĉiam, kiam havis almenaŭ iun esperon ion atingi. Ĉar la rajtojn rompis la ŝtataj instancoj, la ŝtato konsideris tiujn homojn siaj kontraŭuloj, sed ne povis ilian agadon plene ignori, des pli ke la opoziciuloj apelaciis al la oficiale proklamataj valoroj. «Sekvu vian propran Konstitucion!» – estis la ĉefa slogano de la movado. Tiaj homoj apartenis al diversaj ideaj tendencoj, sed estis malkaŝe opoziciaj al la ekzistanta povo, avana linio de inteligentularo: tio, pri kio ordinara inteligentulo nur flustris, ili laŭte proklamis. Laŭ difino de eksterlandaj komunikiloj ĉiujn malkaŝajn opoziciulojn, kiuj atentigis pri rompo de homaj rajtoj en Sovetio, oni eknomis disidentoj. La nomon ili poste ekuzis por si mem. Do, tute ne ĉiuj inteligentuloj estis disidentoj (same, kiel ne ĉiuj inteligentuloj de la 19-a jc. estis revoluciuloj), sed ĉiuj disidentoj nepre estis inteligentuloj. La disidentoj estis konstante senkreditigataj de la povo, suferis diversgradajn persekutojn, foje eĉ severajn, sed oni povas rigardi ilin integra parto de la sovetia socio en 1960-aj-80-aj jaroj, ĉar ili efektivigis certan socian kontrolon, kiu reale moligis la ĝeneralan situacion.

10. Kultura kodo

Pripensado kaj inklino rigardi la aferojn de diversaj flankoj impresas kiel nedecidemo kaj malforteco. Tio foje incitas ankaŭ inteligentulojn mem – ja faman esprimon «molkorpa inteligentularo», per kiu oni dum pli ol cent jaroj insultas ĝin, enkondukis en 1884 mem N. Ŝĉedrin. Sed se ni rigardos la portretojn de inteligentuloj en beletro, kaj biografiojn de realaj inteligentuloj, ni observos tute alian bildon – ni vidos homojn kuraĝajn, malmolkarakterajn, kapablajn oferi sian vivon por siaj konvinkoj... Mola konduto nur maskas la duran akson, kiun povas havi konkreta persono. Tamen forta karaktero ne estas ekskluziva aŭ nepra trajto de inteligentulo. Li diferencas per aro de karakterizoj, kiun eblas nomi «kultura kodo».

Homa digno estas la trajto, kiun rimarkis jam la plej fruaj verkistoj, priskribintaj inteligentulojn – N. Ĉerniŝevskij, I. Turĝenev k.a.. Sed ĝi radikale diferencis de la «nobela honoro». Por vera inteligentulo eblis vangobati ofendinton pro kolero, sed neniam povis temi pri duelo. Homo, kies malhonesto ago, rompanta certajn moralajn regulojn – ekzemple, denunco, kunlaboro kun sekreta polico aŭ io simila – sendepende de ĝenerala grado de lojaleco de konkreta grupo, por ĉiam estis el ĝi forpelata (fariĝis «nemanpremebla»). Nu, ĉiam, ekde la komenco – kaj ĝis fino de la 1980-aj – vera inteligentulo ne okupiĝis pri komercaj aferoj. Li vendis nur sian laboron aŭ ĝiajn rezultojn, sed neniam spekulis.

Konduto – nepre afabla (laŭ reguloj de la konkreta epoko), kun, ekzemple, nepra «vi-alparolo» al nekonataj personoj, aŭ reprezentantoj de pli aĝa generacio. Parolmaniero – nepre literature korekta, sen kiuj ajn specifaj kiel nobela instalo de alilingvaj vortoj aŭ frazoj, aŭ negocistaj emfaze «simplaj» vortetoj. Vestiĝo – por ĉiu epoko, kompreneble, malsama, sed akurata, modesta kaj modere sinjoreca. Tamen jam en la 19-a jc. oni senerare povis distingi laŭ la vestaĵoj inteligentulon ĉu de nobelo, ĉu de negocisto, en kadroj de la sama «modo», ĉu temas pri viroj, ĉu pri virinoj. Amuze, dum tre longa tempo estis certa imago, ke inteligentulo portas certaforman ĉapelon (sed neniokaze cilindron!) kaj okulvitrojn (pli frue nazumon). Nu, se temas pri fino de la 19-a

aŭ komenco de la 20-a jc., rigardu portretojn de Ĉeĥov aŭ Zamenhof, por kompreni pri kio temas. Tamen, iom simila stilo ekzistis kaj en 1930-aj, kaj en 1950-aj jaroj. En 1970-aj jaroj komenciĝis transiro al puloveroj anstataŭ jakoj por diferencoj de la komunistpartiaj funkciuloj. Sportaj okupoj estis ne nepraj kaj, ŝajnas, disvastiĝis jam en sovetia epoko. Sed tre ofta kaj karakteriza ekde 1930-aj jaroj estis sporta turismo – piedmarŝoj en arbaroj aŭ montaroj, kajakaj ekskursoj laŭ riveroj, foje alpismo ks. – aferoj, ligitaj kun vizito al naturo.

Intereso pri kulturo estis nepra, se oni estis inteligentulo, sed ne simple klerulo. Legado de «progresemaĵ» literaturaj revuoj (ekde 1850-aj ĝis 1980-aj) kaj enmodiĝintaj «seriozaj» libroj, vizito al gravaj artaj ekspozicioj, ekskursoj al kulture signifaj lokoj (kiel bieno de A. Puŝkin Miĥajlovskoje aŭ de L. Tolstoj Jasnaja Polana) ktp. Nepra intereso al poezio (ja poetoj en emocia formo esprimis ideojn kaj aspirojn de la homoj) – ĝi jam gravis en 1860-aj jaroj kun tiama populareco de N. Nekrasov, kies verkojn oni sciis parkere, kaj evoluis ĝis 1960-aj jaroj, kiam elpaŝoj de famaj poetoj kolektis plenajn plurmillokajn salonojn kaj eĉ stadionojn! Kaj nepra komuna kantado. En 1930-aj jaroj eknaskiĝis pure inteligentula ĝenro – aŭtoraj kantoj, plene disflorinta en 1960-aj–70-aj jaroj. En ĉiu kompanio troviĝis almenaŭ unu homo, kiu kapablis, eĉ se ne tre lerte, ludi gitaron, kaj oni kantis kantojn de la plej konataj en la medio kantistoj, sen kiuj imagi la sovetian kulturon kaj vivon de la 2-a duono de la 20-a jc. ne eblas. La kantoj estis kaj simple lirikaj, kaj heroaj, kaj satiraj aŭ protestaj pri la moderna vivo – sed ili estis nepre sinceraj kaj esprimivaj.

11. Inteligentulo kaj inteligenta homo – ĉu la samo?

Intelligentularo, kiel estis dirite, estas objekto de kritiko kaj mokoj kaj flanke de supraj tavoloj (ĝi estas putra pro neobeemo), kaj desube. Ĝi estas kritikata de interne – pro tio, ke ne estas tia, kia devus esti ideale. Tial, la vorto «intelligentulo» diferencas de la kunteksto, povas havi jen pozitivan, jen negativan ŝarĝon. Tamen, ekzistas alia parenca esprimo, kiu neniam havas negativan ŝarĝon – *inteligenta homo*. Tio estas tiu, kiu estas kultura homo, bone edukita kaj kun bona kaj afabla konduto. Foje, en 1990-aj jaroj, responde al artikolo de malkonfesia persono, kiu fanfaronis ke li ne estas intelligentulo, saĝa maljuna profesoro [15] diris: «li aŭdacas titoli sian artikolon «kial mi ne estas intelligentulo», sed li ne aŭdacis titoli «kial mi ne estas inteligenta homo». Al mi ŝajnas, ke ĉiu ajn kritika rilato al intelligentularo estas neŭtraligata per senrezerve pozitiva rilato al inteligenteco en la homoj!

Tio tre bone kompreneblas el la zamenhofaj PIV-aj ekzemploj pri «malinteligenta» – *la hebreo estis tre malinteligenta* (Zamenhof); *la bopatrino per malinteligenta babilado elvokas mokadon* – ĉu ne?

12. Du kulturoj en Sovetio

Mi volas mencii interesan problemon, kiu estas dense ligita al la intelekta vivo de Rusio kaj ĝiaj specifaĵoj. Siatempe (en 1959) angla verkisto kaj sciencisto Charles Percy Snow (1905-1980) difinis diferencon inter la du kulturoj, kiuj apartenas al du grupoj de menslaboristoj – la homsciencan kaj natursciencan. Inter la grupoj ekzistas granda fendo. Kompreneble, la problemoj koncernis ankaŭ la rusan intelligentularon. Ĝi trovis sian esprimiĝon en fulme famiĝinta poemo far Boris Sluckij «Fizikistoj kaj lirikistoj»

(1956), kaj sub tiu nomo okazadis pluraj diskutoj pri la temo en 1950-aj–60-aj jaroj. Tamen, certa specifeco de la rusa inteligentularo estis ĝia relativa unueco. La fendo ne estis tro profunda: personoj malproksimaj de la natursciencoj vigle interesiĝis pri ili, kaj scienc-popularaj revuoj, havintaj kelkmilionnombrajn eldonkvantojn, estis legataj same de instruistoj pri literaturo kiel de inĝenieroj. Kaj male: literaturaj revuoj, poeziaj kolektoj estis aĉetataj de konstruistoj, fizikistoj kaj biologoj ne malpli ol de verkistoj mem. Poezia kaj kanta amatora kreado (kaj la amatora karaktero povis transiri al la profesia!) estis partoprenata de la homoj de ĉiuj profesioj – kaj kantoj de la eksinstruisto Bulat Okuĝava kaj la aktoro Vladimir Visockij estis same popularaj kiel kantoj de la biofizikistoj Sergej kaj Tatjana Nikitin-oj laŭ la vortoj de la biologo Dmitrij Suĥarev, poemoj kaj kantoj de la geologo Aleksandr Gorodnickij fariĝis vere popularaj – ekzemploj multas. Tial la rusa inteligentularo povis aperi sur la soci-politika scenejo de la lando en la necesaj kazoj pli reliefe kaj unuece ol en tiuj landoj, kie tia reciproka intereso kaj interpenetro de la du branĉoj de la kulturo ne ekzistis.

13. Fino de Sovetio kaj la tria krizo (la ĝisnuna)

La restrukturigo (*perestrojko*) de la landa administrado okazis pro objektivaj bezonoj – ekonomia kaj socia evoluo ekstagnis, kaj la ekzistintaj rimedoj ne plu povis helpi. Evidentiĝis, ke sen demokratiigo de la ŝtata sistemo en diversaj sferoj la ŝanĝoj ne eblas. Do, neeviteble oni ekprovis la projektojn, kiujn proponadis diversaj inteligentulaj grupoj en 1970-aj-80-aj jaroj. Al kelkaj memstaraj ekonomikistoj, sociologoj, juristoj oni oficiale, sed kaŝe, komisiis ellabori diversajn reform-projektojn. Tiaspecaj projektoj (iuj el ricevitaj tiamaniere) poste estis uzitaj dum la *perestrojko*; la potenculoj komence ĵetis sin de unu direkto de la reformoj al alia – sed ĉiuj tiuj direktoj estis delonge pridiskutataj en la inteligentulaj rondoj. Do, *perestrojko* estis ĝenerale farata sub grandega influo de la inteligentularo; ekde 1985 ĝis 1991 ĝia influo ĉiam kreskis. Ĝi estis projekto de inteligentularo, kaj la inteligentularo komence ricevis la plej rapidajn kaj plej aspiritajn akirojn: certajn civitanajn liberecojn, forigon de cenzuro, liberajn kontaktojn kun eksterlando ktp. Ĉiuj inteligentuloj vere kaj sincere ĝuis tion, publikado kaj amasa legado de ĝis tiam malpermesitaj verkoj estis iuspeca tutlanda spirita festeno, kaj almenaŭ pro tio ĉiuj tiamaj penoj estis pravigitaj.

Tamen rapide riviĝis nepacigeblaj diferencoj inter diversaj grupoj de inteligentuloj. La reformoj, komence celantaj demokratiigi kaj humanigi la «realan socialismon» sen rifuzo de ĝiaj realaj socialaj, ekonomiaj kaj aliaj atingoj, rapide moviĝis al la direkto al ĉiam pli profunda restarigo de kapitalismo en plena amplekso. Kaj ĉiam pli aŭdeblas la voĉo de liberala alo de inteligentuloj, kaj ĉiam pli malforte aŭdeblis la voĉoj de «demokratiaj socialistoj». Fine de 1991, en la momento de disfalo de Sovetunio, tio evidentiĝis plene, kaj la venko de liberaluloj, okupintaj la ŝlosilajn poziciojn en ĉiuj iamaj sovetiaj respublikoj, fariĝis klara. En Rusia Federacio en la nova Konstitucio ankoraŭ trafis la vortoj «sociala ŝtato», kaj la vortoj pri «socie orientita merkato» ankoraŭ sonis, sed tio jam aspektis kiel io marĝena, necesa nur por iom trankviligi la amasojn, kies ekonomia stato draste malboniĝis pro estiĝinta profunda ekonomia krizo.

Se en 1989-90 ankoraŭ ŝajnis, ke inteligentularo ĝenerale gajnis, kaj ĝi ricevis ĉion, kion aspiris – kaj pli grandan liberecon en sia agado, kaj pli signifan sendependecon de la ŝtato, kaj pli gravan pozicion en la socia vivo, kaj (tre grave!) pli certan pliboniĝon de la materia stato, ekde 1991 kaj poste ĝi ricevis kelkajn fortegajn batojn. Unue, pro

la ekonomia krizo kaj fermo de entreprenoj oni ne plu bezonis kvalifikitajn inĝenierojn (ekzemple, militaj entreprenoj, anstataŭ planita konvertiĝo al la civila produktado, simple fermiĝis). Nek la nova liberal-demokratia ŝtato, nek novaj mastroj de la ekonomio (grandaj kapitalistoj-«oligarĥoj») bezonis sciencon. Do, grandega tavolo de inĝenieroj, konstrukiistoj, sciencistoj-esploristoj ne plu ricevadis financon subtenon, kompareblan al tiu, kiun ili ricevadis en sovetia epoko. La tuta tavolo kraŝis, la homoj amase forlasadis la menslaborajn okupojn kaj transformiĝis al etaj entreprenistoj, vendistoj, oficistoj en grandaj firmaoj – se ja sukcesadis trovi almenaŭ tiaspeciajn laborlokojn. Multaj forlasis la landon kaj trovis novajn hejmojn en la Okcidenta Eŭropo kaj Norda Ameriko, kie iliaj kapabloj ja estis bezonataj. Paralele – paradokse – pluraj el tiuj homoj, kiuj sukcesadis trovi sian lokon en novaj sociaj cirkonstancoj, ne plu volis havi ion komunan kun inteligentularo: «mi ne estas inteligentulo, mi estas fakulo», ofte sonis en 1990-aj jaroj de tiaj personoj. Laŭ la politika pozicio, tamen, tiaj malkonfesiintaj inteligentuloj proksimiĝis al netaj burĝoj.

Do, pro kliniĝo de granda parto de inteligentularo al liberalaj valoroj kaj pro ilia subteno de restaŭro de kapitalismo en la lando, la inteligentularo, kiel multnombra kaj influa socia tavolo, signife malgrandiĝis kaj malfortiĝis, kaj ĝenerale malfacilas paroli pri ĝia memstara ekzisto. La procezo daŭras: malgraŭ parta restariĝo de intereso de altaj tavoloj pri la scienco, la plej libera kaj memstara scienca instanco de Rusio, en kadroj de kiu okazadis plejparto da fundamentaj esploroj – Rusia Akademio de la Sciencoj –, estis fakte likvidita jam en 2013 kiel memstara institucio.

Sekve, la inteligentularo, kiu stimulis kaj inspiris reformojn en Sovetio en 1980-aj jaroj, en 1990-aj kaj sekvaj jaroj rezulte eksuferis kaj preskaŭ malaperis.

14. Inteligentuloj en Rusio kaj analogoj en aliaj landoj

En la ruslingva literaturo oni ofte diras, ke inteligentularo estas pure rusa fenomeno (eĉ forgesante, ke en la pola lingvo la nocio aperis samtempe kun la rusa, do, la fenomeno estas minimume ankaŭ pola!). Samtempe, sed malpli ofte, oni egaligas la nocion kun la nocio «intelektularo», uzata en pluraj aliaj lingvoj [16]. Fakte, ankaŭ en PIV ni trovas tian komprenon. Mi opinias, ke la afero estas iom pli komplika. Konstanta tavolo de kleraj aŭ «kulturitaj» homoj, kiuj pensas pri la «tutmondaj problemoj» (aŭ pri la naciaj), kaj kies socia loko troviĝas inter la regantaj kaj laborulaj klasoj, ekzistas en ĉiuj evoluintaj socioj, kie klereco jam ne nepre koincidas kun aparteno al regantaj klasoj (pastroj, aristokratoj ktp.). En situacio de nesufiĉa evoluo de demokratio, aŭ simpla manko de civitanaj liberecoj, tiu tavolo nepre venas al kontraŭdiro kun la superuloj, ĉar estas memstara. Tiel okazis en Francio en 18-a jc. – historio de klerismo tie estas historio de inteligentularo, kies gvidantoj estis kaj Voltero, kaj Rusoo, kaj Dideroto kun aliaj enciklopediistoj... La ideoj, kiujn ili produktis, post kelkjardeka evoluo inspiris la Grandan Revolucion. Plena analogo al la rusa inteligentularo! Simila afero okazis en Francio fine de la 19-a jc. lige al la Dreyfus-afero, kiam intelektuloj ekkonsciis sin aparta certa unueca socia grupo, kapabla kontraŭstari maljustaĵoj de la socio.

La movado de intelektuloj, ellaborintaj novajn sencojn kaj ideojn post la 2-a mondmilito, armis per ili la revoluciajn studentojn kaj laboristojn en 1968. Tiuj ideoj, formiĝintaj en trankvilaj universitataj katedroj, skuis plurajn landojn de Eŭropo kaj Norda Ameriko. Socia revolucio ne sukcesis, sed ĝenerala pensmaniero en la tuta mondo rezulte

ŝanĝiĝis nerenverseble. Nuntempa rusa politikisto M. Delagin bone esprimis tion per moto: «Tio, kion hodiaŭ inteligentuloj flustras en kuirejoj, morgaŭ la amasoj krios sur placoj». Sed en situacioj, kiam en la socio eblas malkaŝa diskutado de la ideoj en kondiĉoj de nelimigitaj sociaj liberecoj, intelektularo ja estas simpla aro da fakuloj. Ili ja produktas por la socio sencojn kaj vivprojektojn, sed ne estas pelataj al neeviteble opozicia niĉo. Tial mi povas konkludi, ke la nocioj intelektulo kaj inteligentulo fariĝas sinonimoj, se temas pri ellaboro de novaj sencoj en kondiĉoj de iuforma limigo de libereco, sed intelektularo ne ricevas trajtojn de inteligentularo en plene demokratiaj kondiĉoj.

Ĉe dependaj popoloj, kiuj spertas nacian memkonsciiĝon kaj strebas ŝtatan sendependiĝon, ekzistis kaj ekzistas socia tavolo de kleruloj, kiuj ellaboras propran kulturon kaj similas al inteligentularo. Tio ekzistis en kadroj de imperioj – same en la Rusia kiel en Osmana, Aŭstria, Brita. Evoluigo de la nacia memkonscio estas longa, dolora kaj kontraŭdira periodo, kaj gvidado de plene sendependiĝantaj landoj fare de inteligentuloj ne nepre alportas bonajn rezultojn [17], sed sen ili, verŝajne, ne efektiveblas.

15. Ĉu nun ekzistas inteligentularo en Rusio?

Mem la nocio «inteligentularo» plu ekzistas en Rusio – ja ĝis nun estas tiuj inteligentuloj, kiuj formiĝis en la antaŭa epoko, kaj kiuj ne perdis sian identecon fariĝinte negocistoj, aŭ marĝeniĝinte, aŭ malkonfesiinte sian apartenon. Aperas pluraj artikoloj kun meditoj pri la signifo de la nocio kaj rolo de la tavolo en la historio. Krome, la vorto estas uzata por la elstaraj reprezentantoj de la menslaboruloj, kiel famaj verkistoj, artistoj, akademianoj ks. Sed en la junularo – ĉu studentoj, ĉu junaj sciencistoj, ĵurnalistoj ktp. – la vorto, kiel sinidentigilo ne estas uzata, almenaŭ sisteme. Kaj ĉu ili estas inteligentuloj ankaŭ laŭ objektivaj kriterioj, estas la demando.

Certaj trajtoj estas perditaj – *mesĉanstvo* (etburĝeco) ne plu estas blafemo, okupiĝo pri komerco estas allasebla morale. Ĝenerale, la strikta limo inter homoj de inteligentulaj profesioj kaj etburĝaro erozias, kaj moralaj kriterioj, kiuj difinis tiujn limojn, malaperas. Prestiĝo de inteligentulaj profesioj, ĉefe de la sciencistoj, falas. Novaj mastroj de la vivo tute ne tiom bezonas klerajn homojn, sciencon kaj evoluantan teknologion por sia regado – do, ili povas redukti kvanton da inteligentulaj profesioj. Kio okulfrapas: oni ne plu interesiĝas pri poezio, nuntempaj poetoj, diference de tio, kio estis antaŭ 30-40 jaroj, estas nekonataj por la amasoj. Forte reduktiĝis kreado de aŭtoraj kantoj, kaj populara rok-muziko, kiu ja povas havi gravan (ankaŭ socie) enhavon, ne taŭgas por komuna kantado en intima kompanio – kaj, sekve, por krei amikan medion.

Eble, gravas alia afero. Se inteligentularo estas tavolo inter la burĝaro kaj neklera popolo, do, ambaŭ tiuj klasoj devas ĉeesti por garantii ĝian ekziston. Sed nun la amasoj en Rusio estas ĝenerale kleraj – atestojn pri fino de mezlernejoj havas preskaŭ ĉiuj, kaj minimume 25% de homoj havas kleron universitatnivelan! Do, la malklera popolo malaperis, kaj eksaj inteligentuloj ekstrebis al la burĝa klaso. Rezulte, ĝia meza pozicio malaperas, kaj klera persono estas nun aŭ simpla pli kvalifikita laboristo, aŭ burĝo. Amasaj inteligentulaj tavoloj, kiel instruistoj ks., ne plu povas formi apartan tavolon, ĉiurilate alproksimiĝante al la samaj kvalifikitaj laboristoj. Do, sen difinebla protektenda «simpla popolo» inteligentularo ne ekzistas en sia ĉiama funkcio!

Intelligentularo, kiel specifa socia grupo de reprezentantaj de kreaĵoj profesioj, povos reaperi en specialaj sociaj kondiĉoj – maturiĝo de revoluciaj aŭ, almenaŭ, reformismaj tendencoj sojle de drastaj ŝanĝoj. Tiam la inteligentuloj-famuloj ne nur mem ellaborados novajn vivosencojn, sed havos apogon en tio en pli vastaj tavoloj de sciencistoj, ĵurnalistoj kaj aliaj ne burĝiĝintaj kreivaj fakuloj. Tiam ili komence flustros pri gravaj aferoj, kaj post tio la konkludojn el tiuj flustroj skandos la amasoj sur placoj. Tamen, tiaj renaskiĝoj de intelligentularo estos sporadaj kaj situaciaj, dum konstanta ekzisto de la tavolo ĉesos. Tio ne estos tro bedaŭrinda, ĉio pasas en la historia procezo. Bedaŭrindos, se malaperos inteligentaj homoj!..

Notoj:

[1] Aperoj de intelligentularo devigis rekonsideri la nocion «popolo». Por nobeloj ĉiuj, kiuj ne estis nobeloj, estis «popolo», ankaŭ burĝoj (krom la plej riĉaj negocistoj) estis iom difektitaj, sed ja popolanoj. Ekzemple, eĉ V. Belinskij konsideris Alekseon Kolcovon «popola poeto», kvankam tiu devenis el familio de brutkomercisto, multe pli riĉa ol familio de senbiena regimenta kuracisto, sed nobelo, Belinskij... Tamen, post kiam diversranguloj ekplenumis amase ŝtatajn kaj sociajn oficojn, ili jam ĉesis ŝajni popolanoj kaj por si mem, kaj por nobeloj.

[2] Necesas noti, ke duobla senco de la vorto, kiu, depende de la uzo, povas signifi aŭ la kritike pensantan grupon de la menslaborantoj, aŭ simple ĉiujn klerajn homojn, ekzistis de la komenco – en literaturo de la 19-a jc. oni povas renkonti ambaŭ komprenojn de la vorto.

[3] Ekzemple, kiam la revolucia terorisma organizo «Popola volo» sukcesis mortigi la caron Aleksandron la 2-an en 1882, la kamparanoj parolis inter si, ke tio estis la venĝo de sinjoroj al la caro-liberiganto pro la abolo de la servuta sistemo! Devis pasi ankoraŭ unu generacio, por ke en 1905-a jaro kamparanoj jam voĉdonis por inteligentuloj-popolemuloj dum balotoj al Ŝtataj Dumoj...

[4] Ruse – meŝanstvo.

[5] Ruse – poŝlostj.

[6] Pli detale pri tiuj nocioj kaj fenomenoj de la rusa historio vd. pli detale mian artikolon «Okcidentismo kaj slavismo: du eternaj polusoj de la rusa pensmaniero» en SR n-ro 146, 2018. pp. 20-27.

[7] En la 2-a duono de la 19-a jc. oni plejofte perceptis pozitivismon kiel formon de materiismo.

[8] Iu certa inklino al religia mistikismo aperis ĉe parto de inteligentuloj dum la unua krizo post 1905-a jaro, kaj la dua fojon – antaŭ la tria krizo en 1970-aj jaroj.

[9] Foje, pro neegalrajta pozicio de judoj en Rusio, la judaj inteligentuloj formis apartajn grupojn, aliĝis al specife naciaj (cionismaj) societoj, ktp. – ankaŭ Zamenhof travivis tiun periodon, sed la inteligentulan apartenon de kleraj judoj tio neniel influis. Eĉ pli, korupti judon per dono de nobeleco aŭ io simila ne eblis (judo por tio devis komence baptiĝi, kio estis konsiderata neakceptebla humiliĝo, kaj kion aŭdacis ne multaj), sekve, mensa opoziciemo de la judaj inteligentuloj estis malpli ŝancebla, ol de la slavaj, kiuj povis koruptiĝi pli facile.

[10] Ĉu ne simbole aspektas la fakto, ke en Moskva universitato li studis kune kun «la plej tipa inteligentulo» A. Ĉeĥov?

[11] Kaj same ne hazarde tiom bone sukcesis Bofronto en Francio fine de 1890-aj jaroj – ĝuste tiam tie formiĝis sinkonscio de tieaj intelektuloj sub influo de Dreyfus-afero. Unuiĝo de intelektuloj-Dreyfus-anoj estas evidenta analogiĝo de la rusaj inteligentuloj.

[12] Reflekcio: Filozofia kaj psikologia termino, kiu signifas kapablon de la homa menso analizi sin mem.

[13] Andrej Sinjavskij, politika prizonulo de la poststalina epoko, akuzita en 1966 pro publikigo eksterlande de ideologie neakcepteblaj por la povo verkoj eksterlande, diris, ke havas kun la sovetia povo ne enhavajn, sed *stilajn* kontraŭdirojn.

[14] Al Esperanto estas tradukitaj 9 romanoj kaj kelkaj rakontoj de la fratoj, plejparte far M. Bronŝtejn.

[15] Viktor Grigorjev, i.a. esperantisto.

[16] Ekzemple, en la nuntempa analizo de la fenomeno «inteligentularo» far rusaj marksistoj oni uzas esplorojn de Antonio Gramsci pri *gli intellettuali*, kiu preskaŭ ĉiam estas tradukata al la rusa kiel *intelligencija*. Opinioj de Gramsci pri du specoj de intelektuloj en la socio estas interesaj kaj profundaj, sed postulas apartan esploron. Mi mencias tion nur pro tio, ke traktado de la nocioj kiel sinonimojn ja eblas, ekzistas kaj fruktodonas.

[17] Tre bona ekzemplo estas Kartvelio, kie la unua prezidento post disfalo de Sovetunio fariĝis fama loka inteligentulo Zviad Gamsahurdia, kies regado kondukis al militaj konfliktoj kaj profundega krizo. En kelkaj aliaj postsovetiaj landoj veno al la povo de tre estimataj inteligentuloj ankaŭ kondukis al similaj politikaj sekvoj. Inteligentulo, kiu lasas proprajn al si okupojn kaj fariĝanta politika gvidanto, perdas siajn antaŭajn kvalitojn kaj fariĝas io alia ol origine. Cetere, ekzemplo de revoluciuloj en la 2-a Rusia revolucio – ĉu bolŝevistoj, ĉu aliaj, kiel konstituciaj demokratoj (ilia ĉefo Pavel Milukov, kiu fariĝis adepto de mondmilito, k.s.) montras rezignon pri humanecaj idealoj dum akiro de la povo eĉ ĉe la plej noblaj homoj.

Esperanto kaj la Komisariato pri Propagando de la Kataluna Registaro dum la Hispana Enlanda Milito (1936-1939)

Ester Boquera Diago



Ĉefsidejo de la Komisariato pri Propagando

Baldaŭ post la komenco de la Hispana Enlanda Milito (1936-1939), la registaro de Katalunio kreis propran aparaton, kiu centralizis la tutan propagandon de la kataluna ekzekutivo. La 3-an de oktobro 1936 la Komisariato pri Propagando [1] (*Comissariat de Propaganda*), estis oficiale kreita.

Rapide ĝi fariĝis tre potenca propagandilo. Dum la milito 300 homoj laboris kaj tuj malfermis oficejojn tra la mondo: Parizo, Londono, Bruselo kaj Stokholmo. Tie laboris plurfaka teamo, kiu inkludis ĵurnalistojn, fotistojn, anoncistojn, tradukistojn, politikistojn ktp. kaj politike bunta, ĉar ĝi havis reprezentantojn de malsamaj tendencoj (ERC, PSUC-UGT, CNT kaj POUM).

Ili uzis ĉiujn rimedojn por diskonigi sian propagandon: radion, gazetojn, revuojn, ekspoziciojn, afiŝojn, bildkartojn, fotojn, broŝurojn, dokumentajn filmojn kaj aktualizaĵojn, ĝis la punkto, ke ili ankaŭ kreis kinoproduktejon: Laya Films.

La Komisariato pri Propagando estis organizita per sekcioj kaj Esperanto havis baldaŭ sian propran fakon, jam en januaro 1937, nur tri monatojn post la kreado de la propagandmaŝino.

Ĉi tiu departemento situis ĉe la ĉefsidejo de la Komisariato, en tre centra loko kaj bone konektita, sur avenuo Diagonal, 442 bis, ĉefetaĝo. Ĝi havis tre ofte interrilaton kun la esperantistaj grupoj de Barcelono, kiujn ĝi kunvokis por kunveni en siaj oficejoj.

En la Komisariato pri Propagando ni trovas du gravajn homojn en la disvastigo de Esperanto: Jaume Miravittles kaj Owadja Kupperman.

1. Jaume Miravittles

Jaume Miravittles (1906-1988) estis tiu, kiu elpensis la Komisariaton pri Propagando kaj tiu, kiu direktis ĝin dum la tuta milito, ĝis marto 1939. Li konstatis tre baldaŭ, ke la milito, kiu estis enlanda, havos internaciajn konsekvencojn; tial li uzis diversajn lingvojn por disvastigi sian propagandon en la tutan mondon: katalunan, hispanan, anglan, francan, germanan, svedan kaj ankaŭ Esperanton.

De kie povis veni la sentemo aŭ intereso de Miravittles pri Esperanto? Li estis aktivulo



Jaume Miravittles

de *Esquerra Republicana de Catalunya* (ERC - Respublika Maldekstro de Katalunio), kiu regis la registaron de Katalunio dum la Enlanda Milito. Ĝi estis partio respublikema, maldekstra kaj katalunisma. Tial, li povis simpatii kun la Esperanto-movado, kiu rilatis al la katalunismo.

Se oni esploras, oni vidas, ke Miravittles havis kontakton kun Esperanto antaŭ la milito. Li rilatis al *Ateneu Enciclopedic Popular* (Populara Enciklopedia Ateneo) de Barcelono, kiu estis centro de la laborisma linio en Barcelono kun tre grava Esperanto-fako. Li prenis el *Ateneu* iujn kunlaborantojn al la Komisariato pri Propagando.

Cetere, Miravittles estis la ĝenerala sekretario pri la organizado de la Popola Olimpiko, kiu devis esti okazigita en Barcelono la saman tagon, kiam komenciĝis la Enlanda Milito. La homoj de la Organiza Komitato petis tradukistojn kaj interpretistojn de fremdaj lingvoj kaj ankaŭ de Esperanto.

Antaŭe, Miravittles povis havi kontakton kun Esperanto tra la konata pentristo Salvador Dalí, amiko ekde la infaneco, ĉar ties patro, Salvador Dalí Cusí, estis unu el la pioniroj de la Esperanto-movado en Katalunio.

Certe estas, ke dum la Enlanda Milito Miravittles kaj la kataluna registaro akceptis subteni la «Kontraŭfaŝistan Esperanto-komitaton de Katalunujo» (foje nomata «Kontraŭfaŝista Esperantista Komitato de Katalunio»), kiu arigis esperantistojn el Barcelono, kiuj volonte decidis unuiĝi, preter la ideologiaj kaj sociaj malsamoj, kelkajn monatojn post la komenco de la milito. *Sennaciulo* specifis, ke estis «ĉiuj Esperanto-societoj». [2]

Tiu rilato estis pozitiva por ambaŭ: la komitato ricevis financadon kaj institucian apogon, kaj la Komisariato povis uzi helplingvon por disvastigi la propagandajn argumentojn de la registaro rilate kulturon, ekonomion kaj socian ordon.

Sennaciulo klarigis ankaŭ la kialon por la ekzisto de la komitato: «la malpermeso k[aj] persekutado de l' esp[erantista] movado en Germanio, Portugalio, la kruela mortigo de la Kordoba esperantistaro devas konvinki la esp[erant]istojn, ke ĝia plej granda malamiko estas la faŝismo. Pro tio la Barcelona esp[erant]istaro kuniĝis por konduki se[n]pardonan batalon kontraŭ la faŝismo, esperante, ke la tutmonda esp[erant]istaro sekvos ilian ekzemplon k[aj] kunhelpos en la defendo de homaj rajtoj, kulturo k[aj] paco». [3]

La unua ĝenerala kunveno de la Kontraŭfaŝista Esperanto-komitato de Katalunujo «aprobis vian sintenon en Kongresoj de SAT k[aj] IPE k[aj] dankas pro la bona reprezentado de nia Komitato», laŭ telegramo, kiun ĝi sendis al la eldonejo *Popola Fronto* en decembro 1937. [4] Tiamaniere, li intencis karesi la asocion Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kaj ties komunisman disiĝon Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE), kreita en 1931 [5]. La komitato ankaŭ volis «esprimi al vi [*Popola Fronto*] aliajn plej profundajn esprimojn de estimo k[aj] admiro pro via alta tasko, kiun vi plenumas por la Respubliko k[aj] Esperanto».

La du organizoj okazigis kongresojn en tiu jaro, SAT en Roterdamo fine de julio 1937 kaj IPE tuj poste en Parizo.

Kiel organizantoj en la komitato troveblas nomoj kiel la anarkiisto Domènech Masachs, Owadja Kupperman, Samuel Roca i Rodó, Alberto Díaz, Josep M. Coll kaj Josep Anglada.

Ĝi estis politike plurala organizo. En ĉi tiu senco, *Popola Fronto* priskribis, ke en «tiu organizo partoprenas anarkistoj, marksistoj k[aj] ĉiuj jamaj neŭtraluloj» kaj rimarkis, ke «ĉiuj kunlaboras harmonie k[aj] konkorde por la Propaganda Esperanto-Fako de Katalunio». [6]

Miravittles fariĝis la honora prezidanto de ĉi tiu komitato dum la Enlanda Milito. Li diris: «mi esperas, ke esp.[eranto] kontribuos al rapida venko super la faŝismo k[aj] kunlaboros por instali la pacon k[aj] kulturon en nia lando». [7]

2. Owadja Kupperman

La alia grava homo, tre nekonata, estas Owadja Kupperman. Li estis gvidanto de la Esperanto-Fako en la Komisariato de Propagando kaj la ĉefa iniciatinto de la lingvo Esperanto kaj la Esperanto-movado de la Komisariato pri Propagando.

Li estis ukraina ĵurnalisto, korespondanto de la rusa ĵurnalo *Pravda*. La fakuloj de la ĵurnalismo en la Enlanda Milito asertis, ke la korespondantoj de *Pravda*, la oficiala novaĵagentejo TASS kaj la gazeto *Izvestia*, formis la sovetian informan reton en Hispanio, kiu estis foje identigita de la okcidentaj servoj kiel desegnanto de spionado.

En Barcelono, Kupperman ankaŭ kunlaboris kun la kataluna registaro en la Komisariato pri Propagando. Tiutempe ne estis strange, ekzemple, ke ĵurnalisto laboris por du gazetoj samtempe. Ekzistis simila situacio kun la usona ĵurnalisto Elizabeth O. Deeble. Ŝi estis estro de la angla bulteno, kiun eldonis la Komisariato pri Propagando, kaj samtempe ŝi estis korespondanto de *Manchester Guardian* kaj laboris por *Washington Post*.

En Katalunio, por funkcii kiel ĵurnalisto, oni devis aparteni al sindikato, kaj Kupperman enskribiĝis en *Agrupació Professional de Periodistes* (Profesia Asocio de Ĵurnalistoj), kiu dum la Enlanda Milito dependis de la sindikato UGT (Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj – *Unión General de Trabajadores*).

Li estis grava kunlaboranto por la Komisariato pri Propagando, kun propra loko por skribi al la centraj oficejoj. La kataluna registaro faris paŝojn por aĉeti por li specifan tajpilon kun cirila alfabeto.

La fama fotisto Francesc Català-Roca (1922-1998), kunlaboranto de la Komisariato pri Propagando kaj kiu tiam havis 15 jarojn, rakontis kiel anekdoton, ke ĉiam mankis skribmaŝinoj kaj ĉiam estis iu, kiu prenis la cirilan tajpilon de Kupperman. Vidinte, ke li povis verki nenion, li lasis ĝin ĵetita ĉe iu ajn loko en la konstruaĵo de la Komisariato, kaj estis Català-Roca, kiu devis trovi kaj redoni ĝin al la sola uzanto, Kupperman.

Li estis membro de la «Kontraŭfaŝista Esperanto-komitato de Katalunujo» kaj okupis respondecan postenon: li estis la ĝenerala sekretario. De ĉi tiu pozicio, kaj rezulte de lia kunlaboro kun la Komisariato pri Propagando, oni trovas Kupperman disvastigante Esperanton per pluraj manieroj.

Unue, li partoprenis farante prelegojn malfermitajn al ĉiuj pri specifaj temoj kiel «Esperanto kaj gazetaro», aliaj pli filozofiaj kiel «kion Esperanto volas», aŭ aliajn

simbolajn kiel la konferenco por honori la datrevenon de Zamenhof en 1937, meze de la milito. Li kutime faris la prelegojn ĉe *Casal de la Cultura* (Domo de Kulturo), ejo en la centro de Barcelono, kiu volis kulturi la laboristojn, kiuj dum la milito restis en la malantaŭo.

Due, Kupperman ankaŭ diskonigis Esperanton en propagandaj eldonaĵoj. Li skribis tekstojn pri temoj, kiuj rilatis ne nur al la milita situacio, sed pensis pri la uzo de Esperanto en momento de paco, post la atendita milita venko. Ekzemple, en 1937 li defendis apartajn uzojn de Esperanto: kiel utila lingvo por kunordigi la policon en la tuta mondo kaj pli efike aresti krimulojn; kiel komuna lingvo por disvastigi sciencajn progresojn; kaj por sonigi la filmojn, argumentante, ke produktantoj povus ŝpari multan monon, ĉar ili evitos adapti la filmojn al malsamaj lingvoj.

Ili estis tekstoj, kiuj pravas, ke Kupperman ne nur konis la lingvon tre bone, sed ankaŭ havis konon pri la uzo de Esperanto en la mondo.

Trie, en la ĵurnalisma aspekto de Kupperman, oni trovas, ke li verkis artikolojn pri la internacia politika situacio, ekzemple en la kataluna ĵurnalo *La Humanitat* (La Humaneco), kie li estas prezentita kiel «eksterlanda gazetara korespondanto en Barcelono.» Ankaŭ li partoprenis la monatan anarkiistan revuon *Mi Revista* (Mia Revuo) kaj *Catalans!* (Katalunoj!). Li kunlaboris en publikaĵoj de malsamaj politikaj tendencoj.

Cetere, *Popola Fronto* raportis, ke en januaro 1938 Kupperman komencis propagandan vojaĝon kun «migranta ekspozicio por prelegi en samideanaj rondoj pri la epopea batalo de Hispanio» [8] en diversajn landojn: Francio, Belgio, Nederlando, Britio, Norvegio, Svedio, Danio, kaj eventuale Estonio kaj Finnlando. La periodaĵo klarigis, ke li parolis Esperanton kaj «ankaŭ en aliaj lingvoj».

Tial, pri la disvastigado de Esperanto, oni povas diri, ke Miravittles estis la sparko, kiu lumigis la fajron, kaj Kupperman estis la kandelo, kiu tenis viva la fajron de Esperanto en la propagando de la kataluna registaro.

Sed la funkcio de Kupperman iris preter disvastigadon de Esperanto. Li estis ponto por tiuj volontulaj esperantistoj, kiuj volis vojaĝi al la respublika zono kaj, en januaro 1937, li estis organizanta kolumnon de esperantistoj por batali en la fronto.

3. Propagando en Esperanto

Kiel la Komisariato pri Propagando plenumis ĉi tiun sentivecon kaj intereson pri Esperanto?

Por disvastigi la propagandon de la kataluna registaro, la institucio, kiun direktis Miravittles, elpensis plurajn ilojn en la internacia lingvo. En la sfero de grafikaĵoj, elstaras poŝtkarta represo de unu el la plej konataj afiŝoj de la Enlanda Milito, *Aixafem el feixisme* de Pere Català Pic (1889-1971), kie tol-ŝuo surtretas svastikon. En la Esperanta versio, nekonata ĝis nun, oni aldonis la surskribon «Piedpremu faŝismon!», potencigante la bildon. [9]





Rimarkindas ankaŭ poŝtkarto eldonita tute en Esperanto, kiu alvokas unuiĝon de la du grandaj sindikataj centraloj por batali kontraŭ faŝismo – “UGT-CNT. Laborista Unueco por dispecigi faŝismon!” – kaj la afiŝo havanta la surskribon «Kion vi faras por eviti tion? Geesperantistoj el la tuta mondo agu energie kontraŭ la internacia faŝismo!», kiu celas alvoki helpon de la esperantista komunumo kaj denunci la germanan kaj italan partoprenadon en la hispana konflikto.


Aliflanke, montrante kiel normaligi la uzado de Esperanto kiel kutima lingvo por propagandi, la Komisariato pri Propagando enkalkulis ĝin en siaj eldonoj kune kun aliaj pli oftaj lingvoj kiel la hispana, la angla kaj la franca.

La komunikilo en Esperanto, kiu plej longe daŭris, estis sendube *Comunicat de premsa* (Gazetara komuniko) en la helplingvo, kiun oni eldonis kune kun versioj en la kataluna, hispana, angla, franca, germana kaj sveda. Entute, sep lingvoj.

La unua numero publikiĝis en januaro 1937 kaj grafike samis kiel la *Comunicat de premsa* en aliaj lingvoj: la supra parto de la bulteno indikis, ke ĝi estis oficiala eldono de la Katalunia Registaro. La resto de la artikoloj estis ciklostilita.

La Komisariato pri Propagando publikigis la bultenon ĉiun dekkvinan tagon ĝis julio 1937, post kio ĝi havis malregulan periodecon: ĉiusemajne, semajne aŭ monate. Ĝi restis tiel ĝis la lasta numero, publikigita la 19-an de julio 1938, kiu koincidas pli-malpli kun la momento, kiam la *Comunicat de premsa* en aliaj lingvoj ankaŭ ĉesas eldoniĝi pro manko de papero kaj de pozitivaj novaĵoj.

La bulteno estis eldonita seninterrompe dum 19 monatoj, kaj estis presitaj 700 ekzempleroj. Por kompari, ekzemple, en la germana oni eldonis 800 ekzemplerojn. Tial, pro sia longa daŭro kaj la nombro de presadoj, oni povas konkludi, ke ĝi estis efika propagandilo.



Telegramo publikigita en Popola Fronto



Gazetara komuniko

Verŝajne, ĉi tiun gazeton oni legis kaj ĝi havis influon. Ekzemple, ĝi publikigis la novaĵon pri la ekzekuto de la esperantista grupo de Kordovo fare de frankistaj trupoj, kiu aŭdiĝis per faŝisma radio. Ĉi tiu novaĵo poste estis reproduktita en *Popola Fronto* [10], kiu estas la plej konata eldonaĵo en Esperanto dum la milito, eldonita el *Grupo Laborista Esperantista de Valencia* (Esperantista Laborista Grupo de Valencio).

Ĉi tiu komuniko duoble gravas, ĉar, unuflanke, la kataluna registaro tre frue uzis Esperanton regule, kiel alian lingvon, en sia propagando [11] kaj, aliflanke, ĉar ĉi tiu eldonaĵo iĝis la oficiala informilo de la Kontraŭfaŝista Esperanto-komitato. Iliaj



Kovrilo de la libro «50 anys de Esperanto»

delegitoj voĉdonis tiamaniere. La Komitato ankaŭ decidis, ke du reprezentantoj de la du gravaj sindikatoj, UGT kaj CNT, estu la redaktantoj de la gazetara komuniko.

Kelkajn jarojn post la milito, Miravittles asertis, ke tiu bulteno celis atingi la anarkiistojn. [12] Tiu aserto estas tre klariga, ĉar en Katalunio kaj Hispanio la ĉefa tendenco de la laborista esperantismo estis formita de anarkiismaj grupoj. La plej multaj hispanaj esperantistoj simpatiis pli al la respublikanaj ideoj, ĉu pro liberalaj, naciaj aŭ laborismaj influoj, ol al la frankistaj ideoj.

Unu el la ĉefaj momentoj estis la ekspozicio *50 anys d'Esperanto* (50 jaroj de Esperanto), kiun oni okazigis en Barcelono de la 1-a ĝis la 12-a de septembro 1937. La ekspozicio celis publike rekoni la laboradon de la katalunaj esperantistoj kaj de la «Kontraŭfaŝista Esperantista Komitato de Katalunio». Ĉefe, oni montris librojn en la internacia lingvo por atentigi pri la Esperanto-movado, solidarajn leterojn, taglibrojn kaj afiŝojn, la gramatikon kaj manskribaĵon de D-ro Zamenhof, kiun oni prezentis en vitro-ŝranko.

La ekzekutitaj esperantistoj de Kordovo havis propran angulon. Ĝi estis kiel funebra spaco, prezidata de la verda stelo kovrita per nigra vualo. Malsupre, plako memoris la ekzekutitajn esperantistojn de Kordovo, ĉirkaŭita de bukedoj da floroj kaj flagoj de la esperantistaj societoj de Barcelono.

La ekspozicio okazis kadre de la Esperantista Semajno kune kun prelegoj por disvastigi la komunan lingvon. La Komisariato pri Propagando eldonis la libron *Cinquanta anys d'Esperanto* (50 jaroj de Esperanto) por celebri la okazon. La volumo enhavas tekstojn en la kataluna por diskonigi la internacian lingvon kaj disvastigi ĝian utilon por celoj tiel malsamaj kiel edukado, turismo, kunordigado de policianoj kaj scienca diskonigo. Kurioze estas, ke la nura elemento sur la kovrilo de la libro estas la blazono de la registaro de Katalunio, por emfazi la institucian kaj oficialan subtenon, kiun ĝi donas al Esperanto.

Kelkajn monatojn antaŭe, kaj koincide kun la Internacia Ekspozicio en Parizo en majo 1937, komitato de la Komisariato de Propagando partoprenis la internacian konferencon *Esperanto en moderna vivo*. La prelego farita de Kupperman, kiu klare celis propagandi, provis konvinki la francajn gastigantojn kaj la esperantistan komunumon, kiujn oni instigis peti internacian helpon.

La Komisariato pri Propagando eldonis broŝuron kun konferenco en Esperanto, kie denove la blazono de la Generalitato memoris la subtenon de la registaro de Katalunio.

La ĵurnalisto Kupperman ankaŭ prizorgis la radio-elsendojn en Esperanto de *Ràdio Barcelona* (Radio Barcelono). La Komisariato pri Propagando organizis informan servon per radio por internaciaj aŭdiencoj en fremdaj lingvoj, kaj Esperanto estis unu el ili.

4. Konkludoj

Konklude, kiam oni difinis la komunik-politikon de la registaro de Katalunio dum la

Hispana Enlanda Milito, oni multe atentis pri Esperanto. Tiusence, ĝi faris instrumentan kaj politikan uzojn de Esperanto.

Unue, la helplingvo estis tre utila, ĉar ĝi havis neŭtralan lingvon por alveni tutmonden, eĉ en landojn, kien ĝi ne povis aliri kun la komunaj lingvoj de sia propagando (kataluna, hispana, angla, franca, germana kaj sveda). Tial, Esperanto permesis al la Kataluna Registaro disvastigi la temojn de sia propagando tra la mondo.

Cetere, Esperanto faciligis al la Komisariato pri Propagando akiri apogon de la Esperanto-movado. Ĝi estis dissemiita grupo, kiu ĝenerale havis pli da simpatio al la respublika flanko ol al la faŝisma flanko.


La kataluna registaro uzis Esperanton por disvastigi sian propagandon, same kiel faris la unuaj katalunaj esperantistoj, kiuj uzis la helplingvon por diskonigi la katalunan kulturon en la tutan mondon.

Tial, la Komisariato pri Propagando faris instrumentan uzon de Esperanto, kiel rimedo por komuniki kaj atentigi la mondan publikan opinion, kaj por trovi ligojn al la kataluna Esperanto-movado kaj ĉefe al la internacia.

Due, ĝi faris ankaŭ politikan uzon, kiel ilo por alparoli kaj por komplezi anarkiistojn, kiuj havis fortan ligon al la internacia lingvo. Ni memoru, ke la propaganda komisararo Jaume Miravittles diris post la Enlanda Milito, ke la gazeto *Comunicat de premsa* celis specifan grupon: la anarkiistojn. Ili estis la politika grupo kiu kredeble plej uzis Esperanton dum la Enlanda Milito.

Oni povas konfirmi la aserton de Miravittles, ĉar kiam ni parolas pri Esperanto en la Komisariato pri Propagando, ĉiam ekzistas forta ligo kun anarkiistoj kaj laboristoj: gravaj membroj de la «Kontraŭfaŝista Esperanto-Komitato de Katalunujo», la redaktistoj de CNT kaj UGT de *Comunicat de premsa*, kaj la enhavo de propagando en Esperanto.

Kompreneble, en Katalunio oni batalis kontraŭ la komuna malamiko, kiu estis faŝismo, sed ankaŭ estis interna lukto inter la maldekstraj grupoj. La anarkiistoj estis tre gravaj precipe dum la unuaj tagoj de la milito, kaj estis grupoj celantaj disvenki ilin kaj



aliaj celantaj alianci kun ili. Jaume Miravittles, kiu estis tre proksima al la prezidanto de la kataluna registaro, Lluís Companys, proponis interkonsenton kun la sindikato CNT.

Por fini, ni volas atentigi ke en Katalunio, dum la Enlanda Milito, Esperanto, esperantismo kaj esperantistoj havis apogon de la katalunia registaro dum momento ne facila. La Komisariato pri Propagando havis la kuraĝon uzi Esperanton sisteme kaj nature en sia propagando. Ĝi vidis Esperanton kiel lingvon tiel validan kiel iu ajn alia por diskonigi siajn ideojn tra la mondo.



Ekspozicio «50 anys de Esperanto»


Notoj:

- [1] Foje ĝi estis nomata «Komisarejo pri Propagando».
- [2] «La kontraŭfaŝista kunligo de ĉiuj Esperanto-societoj en Barcelono». *Sennaciulo*, 25-an de majo 1937, p. 44. Laŭ Gazetservo de Kataluna Generalitato.
- [3] «La kontraŭfaŝista kunligo de ĉiuj Esperanto-societoj en Barcelono». *Sennaciulo*, 25-an de majo 1937, p. 45. Laŭ Gazetservo de Kataluna Generalitato.
- [4] *Popola Fronto*, 15-an de decembro 1937, p. 7.
- [5] Por pliaj detaloj, vidu Eduardo Vivancos. *Unu lingvo por ĉiuj: Esperanto – El Esperanto. Un idioma para todos*. Calurnia, 2019, p. 57-59, eldonita origine en la venezuela revuo *Ruta*, 17-an de februaro 1974.
- [6] «Kun la Katalunaj kamaradoj». *Popola Fronto*, 1-an de septembro 1937, p. 4.
- [7] «La kontraŭfaŝista kunligo de ĉiuj Esperanto-Societoj en Barcelono». *Sennaciulo*, 25-an de majo 1937, p. 45.
- [8] «Multan atenton!». *Popola Fronto*, 15-an de decembro 1937, p. 8.
- [9] Boquera, Ester. «L'esperanto com a eina estratègica del Comissariat de Propaganda de la Generalitat de Catalunya durant la Guerra Civil». *Kataluna esperantisto*, decembro 2018. <https://raco.cat/index.php/KatalunaEsperantisto/article/view/347823>. La artikolo malkovris, ke la fama afiŝo de Pere Català Pic «Piedpremu faŝismon!» havis version en Esperanto.
- [10] «Sango en nia stelo». *Popola Fronto*, 1-an de marto 1937, p. 1.
- [11] Ekzemple en la kolekto de bildkartoj *Procés de la Revolució Espanyola 1909-1937* (Procezo de la Hispana Revolucio 1909-1937).
- [12] Boquera, Ester. *La batalla de la persuasió durant la Guerra Civil. El cas del Comissariat de Propaganda de la Generalitat de Catalunya (1936-1939)*. Doktora disertacio. Universitato Ramon Llull. Barcelono, 2015.

Buñuel-Lorca-Dalí [1]


Triopo da genioj

Miguel Fernández



La defio vivi kaj krei estas verko elstare universala kaj elstare hispana. Elstare universala, ĉar ĝia unusola fakta persono, Boksisto, kaj la du pliaj, nevideblaj, kvankam en ĝi konstante aludataj kiel la Poeto kaj la Pentristo, ĝuas tutmondan famon. Tiam universalecon de la tri protagonistoj la aŭtoro, Fernando J. López, volis emfazi ne uzante iliajn proprajn nomojn kaj ja dramigante nur esencajn partojn de iliaj komunaj faroj kaj travivaĵoj. Komunaj, ĉar tiuj homoj konsistigis unu el la plej raraj kaj studindaj triopoj da amikoj en la historio de la hispana kulturo. Sed jam de nun mi malkovru al vi ilian identecon: Boksisto estas neniue alia ol la kinreĝisoro Luis Buñuel, kiu jun-aĝe praktikis boksadon; la Poeto, Federico García Lorca [2], la plej universala el la hispanaj poetoj; kaj la Pentristo, Salvador Dalí. Tia triunuo! Kaj tiaj komunaj faroj! En ĉi tiuj miksiĝas amikeco, amo, ĵaluzo, noblo, perfido... Ĉu ne universala teksbazo?

Sed ni troviĝas ankaŭ antaŭ elstare hispana kreaĵo. Tiu eminenta triopo ŝprucis kaj disvolviĝis kiel produkto de tre difinita epoko, epitetata «arĝenta», de la historio de la hispana kulturo. Tio, ke ne eblus ĝui la parfumon el la spirita atmosfero de ĉi verko nek trakompreni multajn el la «kulturaj okulsignoj» far ĝia aŭtoro sen havi historian perspektivon. Ĉi tiun jen mi provos doni al vi:



Buñuel, Lorca kaj Dalí

La vorto liberal [liberala] naskiĝis en Hispanio komence de la 19a jarcento. Ĝis tiam, ĝi signifis malavaran, sindoneman, noblakoran ks. De tiam, tiu adjektivo aplikiĝis al la defendantoj de la hispana konstitucio de 1812, forte influita de la spirito de la burĝa franca revolucio, kaj tradukiĝis al ĉiuj lingvoj kun la senco «favora al libero kaj toleremo». Ĉar ne ĉiam la klas-malamikoj de la laboristoj, la burĝoj, kondukis tiel reakcie, dekadence kaj filistre kiel nuntempe. Ili havis siajn revoluciojn. Kutime ili trenis la popolon al siaj bataloj kaj, venkinte, lasis tiun en peĉo. Sed ili ja havis siajn revoluciojn.

En Hispanio, laŭlonge de la deknaŭa jarcento, la liberaluloj neniam povis plene realigi sian programon. Nur en disaj kurtaj periodoj oni lasis ilin apliki kelkajn reformojn. En 1873, ili havis la unuan grandan ŝancon plene regi, kiam estis proklamita la Unua Hispana Respubliko. la espero. Sed ĉi espero, kiu por la plej klera, humanisma kaj laika parto de tiuj liberaluloj neniam sukcesintaj realigi sian revolucion iĝis la granda ŝanco finfine ĝin apliki, ne povus ne esti abortigita de la oligarkio, kun la helpo de ĝiaj tradiciaj fakoj: la armita, nome la armeo, kaj la spirita, nome la eklezio, tia pesto suferata de ĉi lando jarcenton post jarcento. Jam en la klerisma Eŭropo, francaj burĝaj filozofoj, politikaj verkistoj kaj enciklopediistoj, ĉefe Montesquieu kaj Rousseau, argumentis, ke la postiĝinteco kaj dekadenco de Hispanio ekskluzive ŝuldiĝas al la danĝera influo de katolikismo sur la kulturon kaj la vivon de la hispanoj.

La Unua Hispana Respubliko, fakte, daŭris 10 monatojn. Generalo Pavía ordonis armeon da Civilgardianoj, hispanaj ĝendarmoj, enrompi en la parlamenton por eksigi ĝin. Nelonge poste oni restarigis la monarkion.

Tiajn respublikanojn la t.n. Monarkia Restaŭrado (1874-1931), la korupta reĝimo, kiu sekvis post ili, baziĝinta sur registare kontrolata kaj manipulata politikpartia reg-alterno kun la apogo de ĉiuprovincaj kacikoj [3] kaj Antonio Cánovas del Castillo, ĝia dezajnisto, ne lasis interveni en la intelektan vivon, ĉesigante la instru-liberon por eviti ke «oni atencu religiajn dogmojn». Nicolás Salmerón mem, eksprezidento de la Respubliko, kaj liberalaj intelektuloj kiel Francisco Giner de los Ríos, inter aliaj, eksigitaj el siaj respektivaj katedroj pro sia rifuzo akcepti tian integrisman trudon, kiu faris el la ŝtato projekton apogitan sur la dia volo, kreis en 1876 la Liberan Instru-Institucion (LII) adoptante kiel gvidilon la principojn de la germana filozofo Karl Christian Friedrich Krause.

Marĝene de la oficiala instru-sistemo, la hispanaj Krause'istoj sukcesis atingi la apertiĝon de nia intelektularo al Eŭropo kaj la aerumadon de la feblegaj korpoj de la hispanaj scienco, arto kaj kulturo, duonmortaj de klerikalismo. Anis ĉe LII hispanaj lucerno kiel Santiago Ramón y Cajal (Nobel-premiito pri medicino en 1906), la poezi-majstroj Antonio Machado kaj Juan Ramón Jiménez [4] (Nobel-premiito pri literaturo en 1956), la filozofo kaj verkisto Miguel de Unamuno... Kunlaboris ĉe LII Henri Bergson, Charles Darwin, Lev Tolstoj, Robindranath Tagor... nome la kremo de la tutmonda tiutempa intelektularo.

Dank' al la klopodoj de LII, kreiĝis la Konsilio por Stud-Vastigo en 1907. Pere de la Konsilio, hispanaj studentoj estis senditaj al plej prestiĝaj universitatoj en la mondo kaj revenis trafenitaj de vibroj novaj, universalaj kaj fekundaj. Ĉi-kuntekste, vojaĝis al Germanio eminentuloj kiel la filozofo José Ortega y Gasset, la juristo Fernando de los Ríos, la matematikisto Julio Rey Pastor ktp ktp ktp... Kaj ni hispanoj komencis eksporti filozofion; niaj matematikistoj kaj fizikistoj verkadis por plej altnivelaj internaciaj revuoj; nia kulturo, por la unua fojo post niaj oraj jarcentoj (la dekseka kaj la deksepa), sukcesis sinkroniĝi kun la eŭropa, sukcesis universaliĝi eĉ pli ol en tiuj jarcentoj, ĉar pleje karakterizas la tiame ekintan periodon, konatan kiel Arĝenta Epoko, la plureco de la universaliĝoj: ĉe la areoj kultura, filozofia, arta, scienca...



Studenta Restadejo

Kaj en oktobro 1910 la Konsilio por Stud-Vastigo generis modelan institucion, la madridan Studentan Restadejon, kun la celo doni al la junaj homoj integran edukadon surbaze de scienca rigoro, laikeco, toleremo, humaneco, responso... Ĝi estis la hispana ekvivalento de Princetono por usonanoj aŭ de Oksfordo por britoj. Jen la baza principo de la Restadejo: «Oni neniam forgesu, ke ĉiu filozofio celas la vivon mem».

Ĉe la tiea laboratorio pri fiziologio, estrata de Doktoro Negrín (kiu poste, de 1937 ĝis 1945, estis ĉefministro de la Dua Hispana Respubliko), edukiĝis Severo Ochoa (Nobel-premiito pri medicino en 1959). Tie kunloĝis, kunvivis, kunkreis,

kunrevoluciis la kulturan panoramon la muzikisto Salvador Bacarisse, la pentristo kaj poeto José Moreno Villa... Kaj Federico García Lorca, la pentristo Salvador Dalí, la kinreĝisoro Luis Buñuel, la poeto Emilio Prados... Tie oni ricevadis la vizitojn de la poetoj Rafael Alberti, Luis Cernuda, León Felipe, Pedro Garfias, Jorge Guillén, Dámaso Alonso, Pedro Salinas, Gerardo Diego, Manuel Altolaguirre... Nome tie aŭroris la plejado nomata Generacio de 1927 [5]. Tie prelegis, inter multaj aliaj internaciaj eminentuloj, Albert Einstein, Marie Curie, Paul Valéry, Igor Stravinski, Le Corbusier, Louis Aragon, Howard Carter, Louis de Broglie, Herbert George Wells, Max Jacob...

Kaj el tiu institucio burĝonis multaj el la homoj, kiuj en 1931 transprenis politikajn responsojn ĉe la proklamiĝo de la Dua Hispana Respubliko aŭ dua provo fare de la jam menciita klera parto de la burĝaro, ade bridata de la oligarkio kaj ties tentakloj religia kaj armita, por efektivigi sian revolucion. Sed la plej surpriza fakto estas, ke la analizkapablo, kiun la tie aplikata pedagogio forĝis ĉe la idoj de tia progresema burĝaro loĝantaj en la Restadejo sekvigis, ke multaj el ili transklasiĝis, identigis sin kun la laborista klaso, aliĝis al ties vicoj, kundividis kun ĝi la tiaman imponan kolektivan revon aŭ antaŭsenton, ke io ŝanĝiĝos, ke ĉio ŝanĝiĝos, ke la revolucio kaj la emancipiĝo de la laboristoj eblas, ke ia nova mondo preskaŭ tuŝeblas per la pinto de la fingroj. Kaj tia kolektiva revo estis la sparko kiu, aplikata al la supre priskribita kultiv-atmosfero, estigis la vivon de la senegala Generacio de 1927.

La triumfo de Popola Fronto (koalicio el maldekstremaj respublikanoj, socialistoj kaj komunistoj) en la elektado de februaro 1936 turnis la sidejojn de la dekstrulaj partioj, la kazernojn kaj la preĝejojn en konspir-centrojn. Tiu triumfo transiris la limon, kiun la hispana oligarkio kot-anima, kruda, bigota, integrisma kaj ridinda pretis toleri. Kaj ĝi organizis faŝisman puĉon. Antaŭ ol ĉi tiu okazis, la eklezio kontribuis al ĝia sukceso liverante monon al la puĉistoj. Kiam la insurekcio eksplodis, ne magra nombro da pastroj prenis la fusilon kontraŭ la Respublikon. Ĝis tioma grado, ke en la diocezoj de Ávila kaj Burgos la faŝismaj aŭtoritatoj devis admoni ilin pro ties «senmezura sinoferemo». Jen ni troviĝas antaŭ la komenco de la hispana enlanda milito.

Reage kontraŭ la puĉon en 1936, liberecanaj laboristoj proklamis anarkiisman revolucion kaj, por la unua fojo en la mondhistorio, sukcesis transigi al la praktiko la Bakunin'ajn teoriojn en pluraj hispanaj urboj kaj vilaĝoj.

En 1939, kaj la Respubliko kaj la liberecana revolucio estis definitive renversitaj de la ribeluloj. Ĉi tiuj ŝuldis sian venkon al la malavara helpo de Hitlero kaj Mussolini kaj al la priplorinde fia konduto de la burĝaj demokratioj, kiuj, anstataŭ apogi la fratan Hispanan Respublikon, kunaŭtoris la hontruĝigan Traktaton pri neinterveno, malgraŭ, ke ili sciis, ke la itala faŝismo kaj la germana naziismo forte kaj efike kunlaboras kun la puĉistoj en la masakrado de la hispana popolo. Tiel Italio kaj Germanio povis fari el Hispanio provejon por siaj armiloj kaj taktikoj, uzotaj en la granda milito, kiun ili preparadis. Nelonge poste ĝi eksplodis. Nelonge poste la burĝaj demokratioj povis konstati, ke ĉiu peko kunportas sian propran punon. Ili suferis proprakarne la rezulton de sia blinda kaj struta (eble nur cinika kaj stulta) politiko. La hispana enlanda milito, kiu estigis i.a. unu milionon da mortintoj, duonmilionon da ekzilitoj kaj 40 jarojn daŭran naci-katolikisman diktaturon, estis nur la unua fazo de la dua mondmilito.

Sed ni retroiru al la dua jardeko de la pasinta jarcento kaj al la Studenta Restadejo. Al ĝi, nia protagonisto, Luis Buñuel (1900-1983), alvenis en 1917. Li naskiĝis en Calanda

(Teruel, Aragono), en 1900, kiel filo de patro riĉiĝinta en Kubo kaj, post sia reveno en Hispanion, edziĝinta al 18-jara knabino 25 jarojn pli juna ol li.

Buñuel, la plej aĝa el kvin gefratoj, studis ĉe la jezuitoj en Zaragozo. Siajn universitatajn studojn li faris en Madrido. Al la hispana ĉefurbo kunprenis lin la gepatroj mem, kiuj, kiel membroj de la moderneca bonhava burĝaro tiutempa, serĉis por li lokon en la Studenta Restadejo. Konsilite de la patro, li komencis studi agronomian inĝenieradon, sed li ne ŝatis matematikon kaj sisteme fiaskis ĉe ĝi. Tri jarojn poste la patro igis lin transiri al industria inĝenierado. Nova fiasko. Fine la patro konsentis, ke li studu kion li vere ŝatis: natursciencojn.

Sed la malkvieta Luis volis «flugi» ekster Hispanion. Iam li sciigis, ke en pluraj landoj petatas lektoroj pri la hispana. Tamen, por kandidati al tiu posteno, endis studi filozofion. Do li komencis prepari filozofi-licencion.

La Buñuel'a malkvieto fame konatas. Li praktikis plej diversajn aktivaĵojn. Li ŝatis muzikon. Aparte ĵazon. Li scipovis ludi banĝon. Aliflanke, la poezio forte altiris lin. Li frekventadis la babilrondojn gvidatajn de la antonomazia avangardisto Ramón Gómez de la Serna, kreinto de la gregerio, en la kafejo Pombo, kaj aliĝis al la ultraismo, avangarda skolo, kiu, apogante poezian neraciismon, antaŭis la surrealismon. Ultraismajn poemojn li publikigis en kelkaj literaturaj gazetoj. Inter la ultraistoj, troviĝis la argentina verkisto Jorge Luis Borges [6], kiu tiam vivis en Madrido. Cetere, Buñuel praktikis i.a. hipnotismon, atletismon kaj boksadon. Ĉi-rilate, en lia membiografia libro *Mon dernier soupir* [Mia lasta suspiro] legeblas jena aserto far lia fratino Conchita: «En Madrido, li fariĝis leĝer-peza ĉampiono en la kategorio amatoro». Sed samlibre Luis mem diras jenon pri tiu afero: «Mi eĉ praktikis boksadon en la kategorio amatoro. Entute mi partoprenis en nur du matĉoj. Unu mi gajnis pro neĉeesto de la kontraŭulo kaj la alian mi perdis per poentoj».

Federico García Lorca (1898-1936) ekloĝis en la Restadejo du jarojn pli malfrue ol Buñuel, nome en 1919. Federico estis andaluzo de Granado, pli precize, de vilaĝeto nomata Fuente Vaqueros. Li venis rekomendita de sia mentoro kaj protektanto, la konata socialisto Fernando de los Ríos, profesoro ĉe la Granada Universitato, kie Federico komencis studi juron kaj filozofion sen trea intereso. Jam antaŭe, li montriĝis inklina al muziko, al pianludado. Ricevinte klasojn el Antonio Segura, disĉiplo de Verdi, li fariĝis la mir-infano de Granado pro la aparta emocio, per kiu li ludis betovenajn sonatojn. Poste li evidentigis sian emon al literaturo verkante kolekton da poeziaj prozaĵoj, kiu sub la nomo *Impresiones y paisajes* [Impresoj kaj pejzaĝoj] estis publikigita sub financado de la patro, riĉa kampara proprieto. Fine, García Lorca turnis al la poezio sian pasiplenan deziron krei.

Baldaŭ li fariĝis intima amiko de Luis Buñuel kaj de alia aragonano, Pepín Bello, bonega homo, studento pri medicino, kiu, laŭ Buñuel, «neniam sukcesis trapasi eĉ unu ekzamenon»... Bello nek pentris nek poemis, sed cementis la amikecon de la triopo. Pri Lorca, Buñuel, en sia memorlibro, asertas jenon:

“Federico havis ian allogon, ian magnetismon, al kiu neniu povis rezisti. [...] Nelonge post ol li alvenis, li konis ĉiujn kaj ĉiuj konis lin. Lia ĉambro en la Restadejo fariĝis unu el la plej popularaj kunvenejoj en Madrido. [...] Nia amikeco, vere profunda, datumas de nia unua renkontiĝo. Malgraŭ ke la kontrasto inter la krudmaniera aragonano kaj la rafinita andaluzo ne povis pli grandi, ni ĉiam kunis (eble eĉ kaŭze de ĝuste tiu kontrasto).

Nokte ni kutime kuniris al kamparo malantaŭ la Restadejo (tiam la kampoj etendiĝis ĝis la horizonto), sidiĝis surherbe, kaj li voĉlegis al mi siajn poemojn. Li estis eminenta deklamanto. Apud li kiel amiko, mi poiome transformiĝis antaŭ nova mondo, kiun tag-post-tage li riveladis al mi. [...] El ĉiuj miaj ĝisnunaj konatoj, Federico rangas la unua. Mi ne parolas pri lia teatro nek pri lia poezio. La ĉefverko estis li. Eĉ pli, ŝajnas al mi malfacila trovi iun similan al li. Jen ĉe piano interpretante Ŝopenon, jen improvizante pantomimon aŭ mallongan teatran scenon, li nerezisteblis. Kion ajn li legis, el liaj lipoj ŝprucis belo. Li havis pasion, ĝojon, junon. Estis kiel flamo».

Federico fariĝis la eterna Restadejano. Dek jarojn li pasigis en tiu amata domo, kies muroj spektis liajn deklamadojn, prelegojn, aktoradojn kaj neatenditajn muzikajn vesperojn.

Per sia Libro de poemas [Poemlibro] (1921), li komencis famiĝi kiel nova talentulo en la hispana poezio. Sed la eksterordinara sukceso de liaj ciganaj romancoj konstituis raran fenomenon de identiĝo de tuta popolo kun poeto. Jam antaŭ ol vidi la lumon libroforme, ili iris de buŝo al buŝo. Lorca preferis diskonigi, «defendi», siajn versojn per recitado – laŭdire, majstra –, ol senmovigi ilin en libro. Ĉi tiu, Romancero gitano [Cigana romancaro], fine aperis en 1928. La sukceso estis fulma kaj tiuepoke sen-egala. Lorca renomiĝis naci-skale kiel eminenta poeto. La popolo recitis liajn poemojn, intelektuloj kaj fakuloj deklaris sin envultitaj de la Lorca'aj kreaĵoj. Laŭ trafa aserto de la hispana esperanta tradukmajstro F. de Diego, Federico García Lorca «atingis per siaj romancoj kion nur la elektitoj de la dioj gustumas: la unu-animan aplaŭdon de ĉiuj tavoloj de tuta popolo». La unua eldono de Romancero gitano [Cigana romancaro] elĉerpiĝis en kelkaj monatoj. Ses pliaj eldonoj aperis en 1929, 1933, 1935 kaj 1936. Nur malmultaj poemaroj en la historio de la hispana poezio konis tiel enorman sukceson.

Salvador Dalí (1904-1989), kataluno de Figueres (Girona), venis al la Restadejo, akompanata de la patro kaj la fratino. La patrino estis mortinta. Kurioze, la patro, samnoma kiel la filo, estis, krom notario en Figueres, pionira esperantisto, kiu, kune kun Paul Berthelot, la kreinto de la revuo Esperanto (1908), pli frue fondis la unuan katalunan E-societon, nomatan Aplec Esperantista de Catalunya [Esperantista Rondo de Katalunio].


Dalí venis Madriden por studi pentrarton en la Reĝa Belart-Akademio de Sankta Fernando. Li altiris ĉies atenton pro siaj ekscentraj karaktero kaj vestaĵoj. En la Restadejo, oni alnomis lin «la polo». En la sarkasmaj okuloj de la Restadejanoj, li aperis kiel estaĵo bedaŭrinda aŭ, en la plej bona taksado, pentrinda. Efektive, nenio povis krei pli frapan kontraston kun iliaj vest-kompletoj laŭ angla fasono kaj kun iliaj golf-ludaj jakoj, ol la veluraj jakoj kaj la ŝvebaj pelerinoj de Dalí; nenio pli diametre kontraŭa ol lia ĝisŝultre longa misorda hararo kaj iliaj elegante tonditaj haroj, super kiuj regule laboris la barbiroj de la unuakategoriaj hoteloj Ritz aŭ Palace. Dalí pensis, ke ili ĉiuj estas posedataj de komplekso de dandismo kombinita kun cinikeco, kiujn ili manifestis kun perfekta mondumaneco. Liaj kompanoj de la Restadejo inspiris al li tian teruron, ke ĉiufoje, kiam ili sin turnis al li, Dalí kredis sin tuj svenonta.

Iam, profitante la foreston de la strangulo, Pepín Bello enŝoviĝis en lian ĉambron kaj admire malkovris pentraĵojn kaj desegnojn eksterordinare bonkvalitajn, brilstilajn kaj iel laŭajn al la kubisma skolo.

La novaĵo, ke la stranga kataluno estas talenta pentristo, trairis la Restadejon, kaj de tiam la ĉambro de Dalí pleniĝis per kunuloj, kiuj iris tien rigardi lin desegni kun tiel eksterordinara facililo, ke ili gapis de miro. Dalí definitive konkeris ilin.

Kaj la duopo Buñuel-Lorca transformiĝis al triopo per la nepra aliĝo de Dalí. Baldaŭ la «triunuo» komencis funkcii surbaze de granda amikeco, reciproka admiro kaj... eĉ amo. Inter la poeto kaj la pentristo estiĝis amo, kiel Lorca vortumas en sia fama Odo al Salvador Dalí (1926):

Sed ĉefe mi prikantas ian komunan penson
ligantan nin en horoj obskuraj kaj oritaj.
Ne l' Art' estas la lumo, kiu nin ja blindumas.
Estas unue l' amo, l' amikec' aŭ la skermo.



Lorca kaj Buñuel



Lorca kaj Dalí

Aliflanke, jen vortoj, per kiuj multajn jarojn poste la pentristo esprimis sian profundan admiron al la poeto: «Nur Lorca impresis min. Li sola personigis la poezian fenomenon en ĝia tuteco, li, kun karno kaj ostoj, konfuza, sangvina, viskoza kaj subluma, blinkanta per milo da fajroj obskuraj kaj subteraj, kiel materio preta por trovi sian originalan formon... Kiam mi sentis la fajron incendian kaj komunikeman de la poezio de la granda Federico ascendi en flamoj folaj kaj malkombitaj, mi klopodis ilin mastri kaj estingi per la olivarba branĉo de mia antaŭtempa oldeco de Anti-Faŭsto».

En 1925, Federico vojaĝis al Cadaqués por pasigi Paskon ĉe Dalí kaj ties familio. Pluraj fotoj el tiu kunrestado evidencigas, ke la poeton kaj la pentriston ligis io pli ol profunda amikeco. Samjare, la malkvieta Buñuel foriris al Parizo por ofici ĉe institucio por intelekta kunagado, kreita de la Societo de Nacioj. Kaj ĝuste tie, finfine, li trovis la esprimrimedon, kiun jam de tiel longe li senlace serĉadis: la kinon. La filmo *Der müde Tod*

[La laca morto], de Fritz Lang, igis lin kompreni, ke li volas kinreĝisori. Kaj li fervore kaj pasie studis tiun novan arton, kinematografion. Plie, li konatiĝis kun bela francino, Jeanne Rucar, kiu, en la futuro, fariĝis lia edzino.


Dume, en Hispanio, la amikeco inter Lorca kaj Dalí pliiintensiĝis, kvankam en 1926 la pentristo estis eksigita el la Reĝa Belart-Akademio kaj reiris hejmen. Jen la kialo: li deklaris la tiean ekzamen-tribunalon nekompetenta por juĝi homon tiel talentan kiel li. Senutilis la klopodoj de la patro, kiu venis el Figueres al Madrido, por solvi la aferon. Salvador Dalí estis senapelacie elpelita.

La jaro 1927 esencis kaj densis pri eventoj en la vivo de Lorca. Lia amikeco kun Dalí kulminis. Li vojaĝis al Katalunio kaj restis longe en ĝi kaj ĉe la granda amiko. La influo de unu sur la alian tiel grandis, ke eblas paroli pri Dalí'a etapo en la verkaro de Lorca kaj pri Lorca'a etapo en la pentraĵoj de Dalí (ekzemple, *La miel es más dulce que la sangre* [Mielo pli dolĉas ol sango] kaj *Cenicitas* [Cindretoj]), kie insiste ripetiĝas la figuro de Federico apud lia. La reciproka influo tielas, ke tiutempe, instigate de Lorca, Dalí kultivas avangardajn poezion kaj poezian prozon (ekz. *Sankta Sebastiano*), kaj, instigate de Dalí, Lorca faras avangardajn desegnojn, kiujn li ekspozicias en la prestiĝaj Galerioj Dalmau, de Barcelono. Kaj ĝuste ĉi-urbe, en junio 1927, okazas la premiero de la Lorca'a teatraĵo

Mariana Pineda, kies dekoracion aŭtoris Dalí. La verko, kiu alprenis la nomon – kaj gloras la figuron – de fama granadanino ekzekutita sur eŝafodo en 1831 kiel martiro de la libero, atingis konsiderindan sukceson. Sed endis atendi ĝis la tridekaj jaroj por vidi la dramaturgan figuron de García Lorca gigantiĝi. Liaj *Bodas de sangre* [Sanga nupto], *Yerma* [Senfrukta] kaj *La casa de Bernarda Alba* [La domo de Bernarda Alba] rigardatas pintaj dramoj en la historio de la pasintjarcenta hispana teatro.

Tiutempe, dum Lorca kaj Dalí troviĝis en Katalunio, Buñuel revenis Madriden por prelegi pri avangarda kino en la Studenta Restadejo. Fakte, inter 1925 kaj 1929 (kiam li forlasis Parizon) la aragonano plurfoje vizitis Hispanion. La pliintensiĝo de la rilatoj inter la du aliaj triopanoj ja kreis ĉe li grandan ĵaluzon. Kelkaj leteroj senditaj de li al Pepín Bello vidigas lin ĝisinsulte furioza al la paro da amikoj. De tiam, li faris ĉion eblan por sapei tiun ligan, por apartigi Dalí-on disde «la fatala influo de García» kaj por instigi lin translokiĝi Parizen.

En decembro, apoteozo. Aro da poetoj de la plejado poste nomata Generacio de 1927 vojaĝas Sevilen por priomaĝi la figuron de la deksepjarcenta hispana poeto Gongoro en la tricenta datreveno de lia morto. Federico deklamas kelkajn el siaj ciganaj romanoj. Elektrite, la publiko aplaŭde svingas poŝtukojn, kaj, kvazaŭ en omaĝo al matadoro post splenda toreado, la andaluza poeto Adriano del Valle ĵetas surplanken antaŭ Lorca siajn veŝton, kolumon kaj kravaton.



Kiel dirite, en 1928 *Cigana romancaro* vidis la lumon kaj komencis ascendi al la empireo de la hispana poezio. Ĉi-verke, Federico atingis propran, neforgeseblan, unikan lingvo-uzon; ĉi-verke kulminis la Lorca'a kunfando de klerulaj kun popolaj tendencoj; ĉi-verke, la romano, poezia strukturo fontinta en la hispana mezepoko, provis sin mirinda ujo kapabla por harmoniigo de skemoj propraj al popolaj kantoj kaj poemetoj kun la rafinita eleganteco de aŭdace sparkaj gongorismaj metaforoj kaj kun la sonĝeska neracieco de la plej avangarda el la tiamaj skoloj, surrealismo. Tamen ĉio ĉi tute ne dampas sed, male, potencigas la vibradon fortan, pasian, homecplenan, senpere kor-trafan, de la Lorca'aj romanoj.

La reagoj de Dalí kaj de Buñuel negativis. La kataluno sendis al la andaluzo longan leteron. En ĝi, li, jam sub la influo de Buñuel, kiu pli frue vizitis lin en Cadaqués, kaj per lingvaĵo ekstravagance surrealista, rifuzas la poezion de *Cigana romancaro* tial, ke, laŭ li, ĝi staras ene de l' o tradicia, kvankam li konfesas, ke en ĝi li rimarkas «la plej dikan poezian substancon iam ajn ekzistintan».

La aragonano perleteris sian malŝaton ne al Federico, sed al Pepín Bello. Lia surrealismece ŝoko-cela lingvaĵo tiel similis al tiu uzita de Dalí en ties letero al la poeto, ke ne eblas ne konjekti, ke Buñuel parolis pri la Lorca'a poemaro kun la pentristo dum sia restado ĉe li en Cadaqués. Ankaŭ por li Federico pintis inter la poetoj samgeneraciaj, sed, lia opinie, ili ĉiuj plue kultivis rance antikvajn tipojn de poezio. Laŭ Buñuel, en *Cigana romancaro* «eĉ enestas bildoj superbaj kaj novegaj, sed maloftaj kaj miksitaj kun intrigo al mi neeltenebla kaj ja kulpa pri tio, ke la hispanaj litoj plenas de menstruoj».

Jen la bazo, sur kiu, laŭ Dalí kaj Buñuel, endus starigi la tiame nuntempan poezion: Fuĝo disde la racio, disde la realo, disde la sentoj, disde anekdotoj kaj intrigoj...

Federico tute ne sentis sin vundita de la letero de sia amiko la pentristo. Des malpli, ke, super ties kritikoj, brilis komentoj tre laŭdemaj al la Lorca'aj personeco kaj poezia genieco. Li opiniis, ke temas pri «letero sagaca kaj arbitra, kiu starigas interesan poezian debaton». Eĉ pli, tiu letero de lia amata Salvador estis decida pri la nova vojo, kiun de tiam entreprenis lia poezio.

Efektive, en 1929, Federico vojaĝis al Usono, kie li pasigis naŭ monatojn. El Ameriko, li kunportis diversajn laborojn kreitajn dum lia tiea restado. En la plej grava el ili, nomata *Poeto en Nov-Jorko*, Lorca rekonstruas sian poezian kosmon sur bazo simila, almenaŭ epiderme, al tiu formulita de Dalí en ties letero. Pri la poemoj de *Poeto en Nov-Jorko*, Federico mem, en letero al la kataluna avangarda ĵurnalisto kaj amiko Sebastià Gasch diris jenon: «Ili respondas al mia nova maniero spiritualisma, krude sincera, libera je logika kontrolo, sed, atentu!, atentu!, kun eksterordinara poezia konscio. Temas ne pri surrealismo, atentu!, plej klara konscio ilin prilumas». Nuntempe *Poeto en Nov-Jorko* aprecatas kiel unu el la grandaj poemaroj el la dudeka jarcento, kiel la ĉefverko de Federico García Lorca kaj kiel unu el la plej imponaj poeziaj hispanlingvaj krioj kontraŭ la fundamentojn de kapitalismo kaj por la emancipiĝo de la subprematoj.

Krome, el Nov-Jorko Federico kunportis unu teatraĵon: *El público* [La publiko], kaj la skizon de dua: *Así que pasen cinco años* [Kiam kvin jaroj estos pasintaj], subtitolita *Leyenda del tiempo* [Legendo pri la tempo]. En ambaŭ verkoj, laŭ la aŭtoro neludeblaj, disvolviĝas radike novaj, revolucie novaj proponoj, nuliĝas la konvencioj de la realisma teatro, ia drama logiko interligas la intrigojn kaj spinas la strukturojn.

Sed iom pli frue ol Federico enŝipiĝis ale al Nov-Jorko, en 1929, la penado de Buñuel por sapei la fortan ligon Lorca-Dalí donis la unuan frukton: la silentan filmon *Un chien andalou* [Andaluza hundo], kiun oni rigardas majstraĵo en la historio de kino kaj kulmino de la surrealisma arto. Temas pri bilda poemo, kie, por la unua fojo, aperas portretita la subkonscio.

Jen kiel Buñuel klarigis la kreon de ĉi duope realigita ĉefverko:

“Ĉi filmo naskiĝis el kunfluo de du sonĝoj. Dalí invitis min pasigi plurajn tagojn ĉe li en Figueres. Alveninte, mi rakontis al li sonĝon de mi havitan antaŭ nelonge. En ĝi, disfadeniĝinta nubo tranĉis la lunon, kaj razklino fendis okulon. Siavice, li diris al mi, ke la pasintan nokton li vidis en sonĝo manon plenan de formikoj. Kaj aldonis: ‘Kial ne fari duope filmon surbaze de tio?’

“Komence mi hezitis, sed baldaŭ ni metis manojn al la laboro, en Figueres.

“En malpli ol unu semajno, ni verkis la scenaron sekvante tre simplan regulon adoptitan en komuna akordo: ne akcepti ajnan ideon nek bildon, kiuj sekvigus eksplikon racian, psikologian aŭ kulturan. Malfermi ĉiujn pordojn al l’o neracia. Akcepti nur la bildojn kapablajn nin impresi, sen peni diveni la kialon.

“En neniuj momento estiĝis ĉe ni eĉ plej eta disputo. Temis pri unu semajno da kompleta identiĝo de unu al la alia».

Konscia pri la fakto, ke neniuj produktoro volus financi tiun filmon ĉiufanke strangan kaj provokan, Buñuel sin turnis al la patrino, riĉa burĝino, kiu neniam rifuzis al sia kara Luĉjo tiuspecajn petojn.

La filmon oni turnis en Parizo laŭlonge de, proksimume, dek kvin tagoj. La premiero, en

«Studio des Ursulines» atingis «sonoran sukceson» multe pli grandan ol atendite de Dalí kaj Buñuel, kiu cinike deklaris, ke *Andaluza hundo* estas ne pli kaj ne malpli ol publika voko al murdo. Jen kelkaj faktoj, kiuj konfirmas la «sukceson»: Ĝi estis prezentata dum ok monatoj; 40-50 spektantoj faris denunciojn kontraŭ ĝin en komisarejo asertante, ke «endas malpermesi tiun filmon obscenan kaj kruelan»; dum la projekciado de ĝi, du virinoj suferis aborton; ŝprucis longa serio da insultoj kaj minacoj, kiuj, laŭ deklaro de Buñuel, konstante persekutis lin, ĝis li oldis.

Kompreneble, post tiu skandala enrompo en «la sepan arton» Dalí kaj Buñuel estis akceptitaj en la pariza surrealistma rondo de André Breton kun plejaj honoroj. La aragonano radiis de ĝojo: finfine li definitive trovis la artan lingvaĵon, kiun li anksie serĉadis jam de tiom longe.

En tiu jaro, grupo da surrealistoj vojaĝintaj Barcelonen por viziti la tiean Internacian Ekspozicion pasigis plurajn tagojn en hotelo en Cadaqués por resti ĉe Dalí. Temis pri la geedzoj Paul kaj Gala Éluard, kiuj kunportis sian etulinon Cécile, la geedzoj Magritte, kaj Góemans, la mastro de belga galerio. Tiu vizito provokis veran tertremojn en la vivo de Dalí kaj en ties rilatoj kun Buñuel, kun Lorca kaj kun la mondo. Gala kvazaŭ hipnotigis la pentriston kaj fakte malvirigis lin, kiu ĝistiame estis montrinta nulan intereson al la sekso, se escepti sian seksan memkontentiĝon, portretitan de li en lia fama pentraĵo *El gran masturbador* [La granda sinmasturbanto] (1929). Dalí transiris de seksa indiferentulo al pasiigito pri seksaj travivaĵoj kapabla skribi 6-paĝan leteron al la amiko Buñuel por Dalí'ce klarigi al li ĉiujn mirindaĵojn de amoro.

Ĉiuj vizitintoj foriris, krom Gala, kiu restis pli longe ĉe Dalí. Tempopase, Gala fariĝis lia parulino, edzino, muzo kaj manaĝerino.

La sukceso de *Andaluza hundo* sekvigis, ke franca snoba aristokrato proponis sin kiel produktoron de alia filmo aŭtorota de la surrealistma duopo. Temis pri *L'âge d'or* [La or-epoko]. Kristnaske de 1929, Buñuel sin turnis al Figueres kun la intenco ripeti kun la pentristo la sukcesan kunkrean sperton ĝuitan en la konceptado de la unua filmo. Sed ĉio iris aĉe. Unue, apenaŭ trafinte la domon de la kataluno, la aragonano travivis plej malagrablan scenon: la patro de Dalí insulte elpelis la filon for el la hejmo por ĉiam. Pli frue, en vortiga eksceso, kun la deziro pruvi sin surrealistoj super surrealistoj, la pleja praktikanto de la devizo *épater le bourgeois* [ŝoki la burĝon], Dalí, kadre de ekspozicio okazinta en Barcelono, nigrainke skribis jenon sur unu el siaj pentraĵoj: «Mi kraĉas sur la portreton de mia patrino».

Dalí petis Buñuel'on kuniri al la domo en Cadaqués. Tie du-tri tagojn ili laboris super la nova scenaro. Sed, malkiel en la antaŭa okazo, nenio iris glate. Ili malakordis pri preskaŭ ĉio. Buñuel atribuis la fiaskon al la negativa influo de Gala sur la amikon, sed, malgraŭ la apenaŭa kontribuo de Dalí, li tenis lian nomon en la prezent-listo de la filmo.

La or-epoko, la dua-tria parola filmo produktita en Francio, projekciiĝis dum ses tagoj en «Studio 28», ĉiam plenplena de spektantoj, kaj atingis «sukceson» eĉ pli sonoran ol *Andaluza hundo*: la patrino de la produktoro, la aristokrato Charles de Noailles, devis vojaĝi al Romo por eviti la ekskomunikon de la filo; la dekstrema gazetaro impetis kontraŭ la filmon; ekstremdekstrulaj bandoj privandalis ekspozicion de surrealistmaj pentraĵoj muntitan en la vestiblo, ĵetis bombojn surekranen, rompis sidlokojn... Unu

semajnon poste la filmo estis malpermesita. Tiu malpermeso daŭris 50 jarojn. Nur en 1980 ĝi estis distribuita en Nov-Jorko kaj en 1981 en Parizo.

Fine de la dudekaj jaroj do la rara triunuo estis rompita, kvankam nur provizore. Eke de la unua forta kunlaboro Dalí-Buñuel, kiu fruktis per *Andaluza hundo*, Federico sentis sin marĝenigita de la duopo kaj eĉ prisatirita de ĝi. «Tiu andaluza hundo aludas min», li plendadis, kvankam Buñuel ĉiam negis tion asertante, ke tiu esprimo estas la titolo de poemlibro, kiun li iam antaŭe verkis.

La distanco inter la pentristo kaj la kinreĝisoro ĉiam pli grandis. Des pli, ke la unua, en sia strebo paradi ĉiam pli propre, pli sakrilegie, pli ŝoke, pli skandale, kaj, verŝajne, ankaŭ proprakonvinke, montris sian simpation al la faŝismoj. Krome, lia personeco estis radike modifita de la ambicia Gala, kiu transformis tiun nepraktikan junulon, kiu, kiel Restadejano, ne scipovis eĉ akiri enirbiletojn por teatro, en malhonestan mon-avidulon, kiun Breton anagrame alnomis *Avida dollars* [dolar-avida]. Tri-kvar jarojn post ol li estis akceptita en la surrealistma rondo, oni ekskomunikis lin el ĝi. Famas lia repliko al tio: «La surrealismo estas mi».

Kontraste, Luis Buñuel ĉiam tenis sin fidela al la kernaj principoj de surrealismo, revolucia movado ne nur arta, sed integra, celanta transformi la mondon kaj ŝanĝi la vivon. Laŭ li, surrealismo proponis ian moralan postulon, kiun li nepre sekvis kontraŭ ĉiaj obstakloj. Li konfesis, ke lia paso tra surrealismo helpis lin rezisti durajn momentojn de la vivo.

Dalí kaj Lorca renkontiĝis en 1935, en Barcelono, sep jarojn post ol ili disiĝis. Jam en 1934, sciiginte, ke Federico vizitas Barcelonon post sia reveno Hispanien el triumfa turneo tra Argentino, Salvador Ieteris al li kun la propono, ke ili restarigu sian amikecon kaj kunverku operon. Li aldonis, ke Gala tre deziras konatiĝi kun li. En septembro 1935, la renkontiĝo okazis. Lorca troviĝis en Barcelono, kadre de la tiea premiero de lia teatraĵo *Yerma*. Ene de intervjuo al li farita, Federico, aludante sin mem kaj Dalí, asertis: «Niaj spiritoj ĝemelas. Jen la pruvo. Jam sep jarojn ni ne vidis unu la alian kaj tamen ni samopinias pri ĉio, kvazaŭ ni interparolintus ĉiutage. Genias, Salvador Dalí genias».

En 1934, Buñuel kaj Federico tute repaciĝis. Ili renkontiĝis ofte. En 1936, kelkajn tagojn antaŭ ol militistoj ribelis kontraŭ la Duan Hispanan Respublikon, la politika etoso grizis tiel, ke oni preskaŭ palpis ian ŝtormon. Kiam, plena de timo, la poeto rakontis al la kinreĝisoro sian projekton foriri al Granado, ĉi tiu provis dekonvinki lin argumentante, ke en Madrido li pli sekuras.

Vane. Federico foriris Granaden. La 18an de julio ekis la unuaj operacoj de la puĉo. En la populara kvartalo Albaycín, laboristoj, preskaŭ sen armiloj, barikade rezistis tritagajn bombadojn kaj flug-atakojn. Iliaj blankaj flagoj anoncis la finon de la defendo de la Respubliko kaj la komencon de kruela subpremado. Ĉiuaŭrore, arestitaj laboristoj spalis la murego de la tombejo. Sekvis klaketado de fusiloj tra la aero. Kaj surdiga silento porĉiama.

Teroro suverenis en Granado. Teruro, en la koroj. Denuncoj, arestoj, malaperoj, pafmortigoj... Jen la amara kaliko, kiun la granadanoj prave-malprave suspektataj adeptoj al la Respubliko eltrinkis ĉiutage.

Lorca ricevis minacojn. Urĝis trovi ŝirmejon. La plej sekura loko ŝajnis la domo de la granada poeto Luis Rosales, amiko de Federico, falangisto (hispana faŝisto) kaj frato de la ĉefaj falangistoj, kiuj organizis la puĉon en Granado. Sed eĉ tie li estis malkovrita kaj arestita nome de la granada provinestro, komandanto Valdés. Ie, inter la vilaĝetoj Víznar kaj Alfacar, proksimaj al Granado, Federico García Lorca estis paf-ekzekutita. Ankoraŭ nun oni ne scias ĝuste, kie kuŝas liaj restaĵoj. Ankoraŭ nun oni ne scias ĝuste, kie kuŝas la restaĵoj de 120 000 homoj murditaj de faŝismaj ribeluloj!

En 1939, fine de la hispana enlanda milito, Luis Buñuel troviĝis en Parizo. La lasta respublika ambasadoro de Hispanio en la franca ĉefurbo komisiis lin iri en Usonon, kiun jam en 1930 la kinreĝisoro estis vizitinta, por kontroli la ĝustecon de la filmoj pri la hispana milito tiam farataj en Holivudo. Nelonge post ol li komencis plenumi tiun okupon, la usona registaro malpermesis ĉiajn filmojn, kaj respublikanemajn kaj faŝistemajn, pri la hispana milito. Baldaŭ Luis vidiĝis sen groŝo en poŝo. Sed, bonŝance, li akiris postenon en la Muzeo de la Moderna Arto de Nov-Jorko. Estis la epoko, kiam Nelson Rockefeller kreis la Komitaton por Interamerikaj Aferoj. En 1942, Salvador Dalí, kiu, same, vivis en Nov-Jorko, publikigis la membiografian libron *La sekreta vivo de Salvador Dalí*. En ĝi, la malnobla *dolar-avidulo* deklaras la amikon Buñuel ateisto. Tiumomente kaj tiulande tio gravis eĉ pli ol esti akuzita kiel komunisto. La kinreĝisoro estis tuj eksigita el la Muzeo. Nelonge post tio Buñuel difinas rendevuon kun la pentristo en trinkejo. Furioza, tuj pugnobotonta la malnoblulon, Buñuel nomas lin porko kaj diras al li, ke liakulpe li perdis sian postenon. Dalí respondas: «Aŭskultu, ĉi libron mi verkis por fari piedestalon al mi mem, ne al vi».

La duopa ligo Dalí-Buñuel preskaŭ tute rompiĝis. Nur unu solan fojon ili denove renkontiĝis post tio.

Kelkajn jarojn poste, Dalí parolis pri Lorca en pluraj okazoj. En 1966, demandite de ĵurnalisto pri tio, kiaj estis liaj rilatoj kun la poeto, dum la periodo, kiam ĉi tiu laboris super sia *Odo al Salvador Dalí*, la pentristo respondis: «Kiel sciate, li estis pederasto kaj estis freneze enamiĝinta al mi. Du fojojn li provis min... kaj tio min ege perturbis, ĉar mi ne estis pederasto kaj tute ne volis cedi. Cetere, li kaŭzis al mi doloron. Resume: nenio okazis. Sub vidpunkto rilata al prestiĝo, mi sentis min flatata. Mi pripensis, ke, se ĉion konsideri, temas pri granda poeto, kaj ke mi ŝuldas al li etan parton de la p...-truo de la Dia Dalí!».

De ĉiam kuris la onidiro, ke Federico samseksemas, sed tiuepoke, ankoraŭ ege malabundis priaj pruvitaj faktoj. La vortoj de Dalí, tiam transformita al groteska histriono, nesatigebla ekshibiciulo kaj senskrupula komercisto pri siaj verkoj kaj pri sia propra bildo, evidentigis lian malnoblon kaj moralan fiecon, sed ilin, eĉ se tio veras, oni ne povus preni serioze.

En 1956, la franco Jean-Louis Schonberg, en sia libro *Federico García Lorca. L'homme. L'œuvre* [La homo. La verko], pledis por la absurda ideo, ke la murdo al Lorca ŝuldiĝis al reguligo de kontoj inter samseksemuloj. Tiu sensencaĵo venis kvazaŭ vokita kaj petita al la Franco'a reĝimo, kiu tiel senkulpigis sin antaŭ la mondo pri la terura krimo, kiun nur ĝi efektivigis. Eble tial, la familianoj de Lorca neniam volis tuŝi la temon «eventuala samseksemo de Federico», kvankam tre povas esti, ke ili, membroj de burĝa bonhava familio, ankaŭ preferis prisilenti fakton rigardatan prihontinda. Aŭ, simple, ke ili ne posedis konkludigajn sciojn pri tiu aspekto de la personeco de la granda verkisto.

Francisco García Lorca, frato de la poeto kaj admirinda literatur-kritikisto, publikigis en 1980 interesplenan libron, *Federico y su mundo* [Federico kaj ties mondo]. En ĝi, krom prezenti sukajn biografiajn erojn, li fajne analizas diversajn stilajn trajtojn de Federico. Sed nenie en la libro legeblas eĉ plej eta aludo al la eventuala samseksemo de la frato.

Pro ĉio ĉi, kiam en 1990 mi verkis mian eseon *Sur la spuroj de Federico García Lorca*, mi nenion menciis pri ĉi afero, cetere esenca por kompreni la varpon de la Lorca'a poetiko. Se tiun libron mi reverkus hodiaŭ, certe mi kalkulus je ĉiuj historiaj esploroj faritaj de Ian Gibson, irlanda hispanisto, kiu akiris la hispanan naciecon. Li dediĉis dekojn da jaroj al la studo de ĉefaj figuroj de la hispana literaturo – kaj, ĝenerale, kulturo –, ĉefe de la plej universala el la hispanaj poetoj. Lia en 1998 aperinta *Vida, pasión y muerte de Federico García Lorca (1898-1936)* [Vivo, pasiono kaj morto de Federico García Lorca (1898-1936)], science farita studo pri la biografio, kaj pri la verkaro, de la poeto, malkovras al la leganto la samsekseman flankon de Federico, ties amantojn, la influon de ĉio ĉi sur liajn elplumaĵojn...

Al la rara kaj mirinda triunuo Lorca-Dalí-Buñuel, Gibson dediĉis multajn interesajn paĝojn, kiujn li plene disvolvis, krom en la supre menciita libro, en siaj du postaj jenaj verkoj: *Lorca-Dalí: el amor que no pudo ser* [Lorca-Dalí: la amo, kiu ne povis esti], aperinta en 1999, kaj *Luis Buñuel. La forja de un cineasta universal (1900-1938)* [Luis Buñuel. La forĝado de universala kinisto (1900-1938)], aperinta en 2013.

Pri Dalí, krom starigi kiel veran la aman pasion travivitan de la pentristo kaj la poeto, Gibson aliĝas al kiuj asertas, ke la fama paranojo de Salvador Dalí, distrumpetita de ĉi tiu mem, estis sekvo de lia radika rezisto cedi al sia kaŝita samseksemo. Buñuel'on li prezentas i.a. en ties junaj jaroj en Madrido, kiam, kiel la kinreĝisoro rakontas en sia membiografio, li kutimis batadi samseksemulojn en madridaj publikaj pisejoj, kun la helpo de aliaj Restadejanoj. Kaj Gibson konjektas, ke tiaj violentaj praktikoj ŝuldiĝas al profunda timo de Buñuel al samseksemo. Timo bazita sur tio, ke lia plej juna frato estis senkompleksa gejo en Madrido, urbo tiame plena de antaŭjuĝoj kontraŭ samseksemon eĉ ene de teorie plej progresemaj medioj, kiel la Restadejo. En la intervjuoj, neniam Buñuel menciis sian fraton.

Kio restas el Lorca, Dalí kaj Buñuel? Ni vidu:

Federico García Lorca rigardatas la plej universala el la hispanaj poetoj. La cirkonstancoj de lia murdiĝo skuis la animon de la tutmondaj pledantoj por la lumo, por kiuj Lorca iĝis emblemo de la juna progresema Hispanio detruita de la ombroj de faŝismo. Sed lia renomo ŝuldiĝas ĉefe al lia superba kaj multflanka talento. Nun eblas aserti, kune kun la ĉefartikolo de la hispana ĵurnalo *El País* de la 19a de aŭgusto 1986, «ke lia verkaro havas ĉiujn trajtojn karakterizajn de genieco; ke li estis murdita, ĉar li reprezentis kultur-formon liberan, popolan kaj eternan, kontraŭ kiun ekribelis la puĉistoj; ke li ĝuis kaj ĝuas plu renomon nur justan, kaj ke, samtempe, li estas unu el la viktimoj de la persekutado al la humanismo kaj unu el la kreintoj de la ideoj, la sentoj, la sensacoj, la humanismo de la dudeka jarcento».

El Salvador Dalí restas lia groteska pozo de degradiĝinta geniulo; la bildo de li ludanta histrionon de la krima Franco'ismo, kiu uzis lin kiel pruvon, ke la naci-katolikismo protektas la grandajn artistojn; la hontinda bildo de li kiel dekadencia parodiisto de si mem kaj prikranto de komercaj strasaj surogatoj de pentraĵoj, kiuj nun dekoras la

murojn de miloj da domoj... Sed restas ankaŭ la veraj pentraĵoj, kelkaj el ili imponaj, kiujn li kreis en la tridekaj jaroj. Uzante teknikon vere eksterordinaran, kvankam, fakte, akademian – malgraŭ ke li abomenis akademiaĵojn – li portretis siajn fantasmojn: la impotenton, la sinmasturbadon, la samseksemon, la aŭtoritaton de la patro... kadre de pejzaĝoj propraj al lia regiono, Empordà, surbaze de simboloj: putraj azenoj, lambastonoj, formikoj, akridoj... Kaj portretis sian muzon, Gala'n, iuspecan amatinon-patrinon-manaĝerinon, kiu portempe liberigis lin el la seksa angoro kaj montris al li la vojon al mon-avido.

El Luis Buñuel, restas splenda kin-kariero, plena de majstraĵoj, de geniaj eltrovoj kaj intuoj, de plej propraj alportoj, multaj el ili en surrealismeca tonalo, al la «sepa arto». Krom la pioniraj surrealismaĵoj *Andaluza hundo* kaj *La or-epoko*, restas filmoj kultataj de kinemuloj kaj emblemaj en la tutmonda historio de la kino, kiel *Viridiana*, premiita per la Or-palmo en la Cannes-Festivalo 1961, *El ángel exterminador* [La eksterma anĝelo], *Simón del desierto* [Simono de la dezerto], *Belle de jour* [Bela en la tago], premiita per la Or-leono en la Veneci-festivalo 1967, *La Via Láctea* [La Lakta Vojo], *Tristana*, *El discreto encanto de la burguesía* [La diskreta ĉarmo de la burĝaro], Oskar-premiita kiel la plej bona eksterlanda filmo en 1972, *El fantasma de la libertad* [La fantomo de la libero] kaj *Ese oscuro objeto del deseo* [Tiu obskura objekto de l' deziro].

Ian Gibson asertas jenon: «Mi certas, ke ne ekzistis eĉ unu sola tago, en kiu Buñuel ne pensis pri la lastaj momentoj de Lorca antaŭ plotono de faŝistoj en Granado, en lia Granado, kiun li prikantis pli bone ol iu alia. Mi scias, ke la lasta penso en la vivo de Buñuel estis la paf-ekzekuto de Lorca. Same pri Dalí. Laŭdire, kiam Dalí estis mortanta, oni aŭdis lin diri «Lorca', Lorca'».

Madrid, 05-02-2017

Notoj:

[1] Ĝenerale, hispanaj homnomoj konsistas el nomo(j) plus patra familia nomo plus patrina familia nomo. Ĉi-okaze, jen la nomoj de la tri aluditoj: Luis Buñuel Portolés, Federico García Lorca kaj Salvador Dalí Domenech. Ordinare, kiam oni mencias iun per familia nomo, elektatas la patra, sed, se ĉi tiu tro komunas kompare kun la patrina, oni elektas ĉi lastan. Tial oni parolas pri Lorca anstataŭ pri García.



[2] En Esperanto, legeblas jenaj verkoj de ĉi aŭtoro: la poemaro *Cigana Romancaro*, en traduko de Fernando de Diego, Stafeto, La Laguna, 1971, 110 paĝoj; la teatraĵoj *Sanga nupto* kaj *La domo de Bernarda Alba*, en traduko de Miguel Fernández, en unu sola volumo, n-ro 23 de la Serio Oriento-Okcidento, Madrida Esperanto-Liceo, La Misma, Madrido, 1987, 229 paĝoj; diversaj elektitaj poemoj en la antologio *Poezio: armilo ŝargita per futuro*, en traduko de Miguel Fernández, SATEH, Madrido, 2013, 363 paĝoj. Krome, pri ĉi verkisto, legeblas la esaro de Miguel Fernández *Sur la spuroj de Federico García Lorca*, Universidade de Santiago de Compostela, Santiago, 1996, 117 paĝoj.

[3] *kaciko*: (aldone al la du signifoj en NPIV) (f) (fm): Homo, kiu, ĉefe en vilaĝoj aŭ kamparaj distriktoj aŭ regionoj, uzas troan influon ĉe politikaj-sociaj aferoj.



[4] De Antonio Machado legeblas en esperanto jenaj verkoj, ili ambaŭ en traduko de Fernando de Diego: *La lando de Alvargonzález*, HEF, Zaragoza, 1969, 47 paĝoj; elektitaj poemoj en «*Sentempa simfonio*. Poem-antologio hispana», diversaj aŭtoroj, n-ro 3 de la kolekto Hispana Literaturo, La Misma, Madrid, 1987, 154 paĝoj. De Juan Ramón Jiménez legeblas en Esperanto jenaj verkoj: la poemoj *Oktobro* kaj *Feliĉa estulo* en la ĉi-supre menciita antologio kaj «*Platero kaj mi*. Andaluza elegio», en traduko de Liven Dek, n-ro 9 de la kolekto Hispana Literaturo, Andaluza E-Unuiĝo, Málaga, 2009, 200 paĝoj.

[5] En Esperanto, legeblas poemoj de ĉi plejado en la jam menciitaj antologioj *Sentempa simfonio* kaj *Poezio: armilo ŝargita per futuro*. Plie, pri ĉi plejado, la eseo *La Generacio de 1927 kaj la tradici-tipa kastilia liriko*, aŭtorita de Miguel Fernández, legeblas en *Beletra Almanako*, n-ro 11, p. 49-65.

[6] Kolekto da elektitaj prozaĵoj kaj poeziaĵoj de Jorge Luis Borges, esperantigitaj de kelkaj el niaj plej elstaraj literatoroj, legeblas en *La sekreta miraklo*, Sezonoj, Kaliningrado, 2008, 200 paĝoj.

Tragedio pro la atombomboj en Hiroŝima kaj Nagasaki

Hori Jasuo

Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro atombomboj, tial multaj japanoj opinias, ke Japanio devas gvidi la mondon al sennuklearmila mondo, ratifante «la Pakton pri malpermeso de nukleaj armiloj» adoptitan ĉe Unuiĝintaj Nacioj la 7an de julio 2017.

Tiu pakto estis malfermita por subskribo la 20an de septembro 2017 kaj post ratifado de 50 ŝtatoj ĝi ekfunkcios. Antaŭ la 28a de februaro 2018, 56 ŝtatoj subskribis, el kiuj 5 ratifis ĝin. Sed strange Japanio rifuzis subskribi la pakton kun jena preteksto:

Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro la atombomboj, tial ĝi havas la komunan celon aboli nukleajn armilojn. Tamen aliflanke Norda Koreio ekspluatas nukleajn armilojn, kaj tio estas tre serioza kaj urĝa minaco al paco kaj stabilo de la internacia mondo. Al landoj kiel Norda Koreio, ordinaraj armiloj ne efikas, tial Japanio bezonas subtenon de Usono, kiu posedas nukleajn armilojn, sub la koalicio inter Japanio kaj Usono.

Se Japanio tuj ratifos la pakton, kiu malpermesas nukleajn armilojn, tio damaĝos la justecon de la nuklea politiko de Usono kaj endanĝerigos la vivon de la japanoj.

Kontraŭ la japana registaro multaj homoj protestas. Precipe tiuj, kiuj postvivis la atombombadon en aŭgusto 1945, forte deziras, ke Japanio ratifu la pakton. Jen spertoj de atombombitoj en Hiroŝima kaj Nagasaki el artikoloj aperintaj en ĵurnaloj.

1. Blanka lumo kuris tra la lerneja sportejo



Jamada Reiko

Verkita de s-ino Jamada Reiko, naskiĝinta en 1934, nun loĝanta en Tokio. Tradukita el la ĵurnalo Akahata (4an de decembro 2017).

Je la 8a horo la 6an de aŭgusto 1945, mi, 11-jara lernantino, estis en la sportejo de la elementa lernejo Koi kun aliaj gelernantoj. Mi vidis aviadilon fluganta alte kontraŭ la blua ĉielo.

“Belege!”

Ĝi ekrevenis, kaj tiun momenton blanka lumo trakuris la lernejan sportejon, kaj tuj poste venis eksploda ventego. Sablo trafis nin. Ni kuregis al la ŝirmejoj laŭ la monteto. Jam ili estis plenaj de homoj, kaj multaj staris ekstere en la nigra, nuklea pluvo.

Kiam mi revenis hejmen kun mia pli aĝa fratino, mi renkontis multajn vunditojn. Iu virino vokis la nomon de mia fratino, sed ŝi estis tiel nigra, ke mi ne povis rekoni, kiu ŝi estas, kaj ni forkuris. Ankoraŭ nun mi demandas min pri tio kaj bedaŭras pro mia ago.

Mia amikino perdis sian patrinon. Kiam ŝi hejme atendis la patrinon kun siaj 4 gefratoj, en la venonta tago enkuris nigra maso en la domon. Ŝi pensis, ke ĝi estas nigra hundo,

sed ne. Ĝi estis ŝia patrino. Ŝi falis tie kaj tuj mortis. Ili bruligis ŝian kadavron en la ĝardeno.

Post 3 tagoj de la katastrofo oni komencis kolekti kadavrojn kuŝantajn ĉie sur la stratoj kaj bruligis ilin en la sportejo de la elementa lernejo. Oni diras, ke ĉirkaŭ 2300 kadavroj estis bruligitaj kiel sennomuloj. Mi ne forgesas la voĉojn de la vunditoj. Tiu memoro obsedas min.

Mia patro estis bombita en la konstruaĵo unu kilometron for de la epicentro. Li estis savita el la detruitaĵoj, sed lia korpo estis kovrita de sango kaj vitraĵpecetoj. Poste el lia korpo aperadis tiuj pecetoj, kaj post 20 jaroj li suferis pro pluma kancero kaj leŭkemio, kaj mortis kun oftaj spasmoj.

Mi komencis rakonti pri mia sperto, sciante, ke multaj homoj suferas pro la sekvaĵoj de la atombombado. Mi rakontis ne nur en Japanio, sed ankaŭ en eksterlando. Mi renkontis eĉ nepon de tiama usona prezidento Truman, kiu ordonis la uzon de atombomboj sur Japanio. Mi rakontis ankaŭ al lernantoj en Usono. Ili larmis kaj diris al mi: «Usono faris teruran aferon al la japanoj. Estas certe, ke ili malamas Usonon». Mi respondis, ke ni ne malamas Usonon, sed malamas nukleajn armilojn. Tiun momenton revenis al ilia mieno ridetoj.

Mi volas, ke ĉiuj sciu, kio okazis en Hiroŝima tiun tagon kaj pro kia malfacilo la atombombitoj suferis poste, kaj ke la nukleaj armiloj estas tiuj de diablo.

2. Unufoje mi forviŝis la atombombon el mia memoro

Verkita de s-ino Jamaguĉi Kazuko, 91-jara, loĝanta en Nagasaki.

Tradukita el artikolo de la ĵurnalo Asahi (10an de aŭgusto 2019).

La 9an de aŭgusto 1945 mi estis 17-jara kaj mi laboris en fabriko de Micubiŝi en Urakami, Nagasaki. Kiam mi sidiĝis ĉe mia tablo, mi ricevis fortan lumon. Kiam mi elrampis el la detruita konstruaĵo, ĉio ŝanĝiĝis ekstere. Fajrego kaj nigra ĉielo. Vunditoj kun starantaj haroj, kun sango el la kapo...



Jamaguĉi Kazuko

En la rifuĝejo mi aŭdis, ke neniuj pluivivis en mia distrikto. Poste mia juna fratino 11-jara estis trovita morta hejme, kaj la patrino kaj la fratino 14-jara malaperis. Mi neniam havis informon pri ili. Mia patro jam june mortis. Mi havis peksenton pro tio, ke nur mi pluivivis, tamen mi decidis antaŭeniri, forgesinte la atombombadon. Mi neniam parolis kun miaj samklasanoj pri mia sperto pri la atombombo.

30 jarojn poste mi komencis retrorigardi la pasintecon. Mi havis presejon kaj foje legis tekstojn pri la atombombitoj, kaj rememoris miajn gepatrojn kaj fratinojn. Mi opiniis, ke tia tragedio neniam ripetiĝu. Iun tagon, kiam la ĉielo estis same bela kiel tiun tagon, naskiĝis poemo en mia koro:

34 jarojn post tiu tago
mi dankas al la blua ĉielo,
ĉar nun ne estas milito en Japanio.
Kiam estis milito,
homoj ne povis dormi eĉ en nokto,

timigitaj de sirenoj pri aeratakoj,
 pasigis mallumajn noktojn en ŝirmejo,
 ne havante manĝaĵon por malsata stomako,
 krom taso da supo kiel akvo kun folioj de batato.
 Tamen homoj iris al batalejoj
 ne nur patroj, sed ankaŭ filoj,
 kun peza pafilo por mortigi homojn.
 Knabinoj 15-jaraj faris armilojn
 per fajliloj tagnokte por mortigi homojn.
 Kaj en la varmega tago kun brila suno
 estis faligita unu atombombo
 sur Urakami en la urbo Nagasaki.
 Ĝi eksplodis kun lumego, varmego kaj ventego,
 kiujn neniam antaŭe homoj spertis.
 Membroj de miloj da homoj disiĝis,
 intestoj elfluiĝis,
 vermoj rampis sur la haŭto.
 Vivantoj serĉis siajn familianojn,
 trovis iliajn kadavrojn kaj bruligis.
 Fumo el la bruligataj kadavroj leviĝis,
 sango el senkulpaj homoj
 tinkturis ruĝe la riveron Urakami.
 La urbo fariĝis ebena,
 plena de krakantaj tegiloj kaj nigraj kadavroj.
 Finfine la milito finiĝis.
 Finfine la milito finiĝis, postlasante keloidojn.
 Sed mi ne plu havas gepatrojn, nek gefratojn.
 Homoj estas forgesemaj,
 do ili ripetas erarojn,
 sed ili ne forgesu tiun tragedion,
 ili ne ripetu tian tragedion,
 neniam kaj neniam...

3. Fumoj el kremaciaj kadavroj

Verkita de s-ro Tanaka Joŝimicu, 92-jara, nun loĝanta en Tokio.

Tradukita el artikolo de la ĵurnalo Akahata (22an de majo 2019).

Kiam mi estis 18-jara, mi estis sendita al la kontraŭaera artilerio sur la monteto Konpira en Nagasaki.

La 9an de aŭgusto 1945, tuj antaŭ la atombombado, la soldatoj estis ordonitaj prepari sin por la kontraŭpafado kaj kuris al la pozicio. Dume mi aŭdis siblan sonon, kaj je la krioj de la bandestro «Eksplodo proksima! Kuŝu!», mi faligis min teren kun oreloj kovritaj de la manoj. La lumo estis tiel forta, ke mi povis travidi ostojn en miaj fingroj.

Mi estis forblovita 10 metrojn kaj falis en la kloakon. Mi elrampis kaj trovis, ke la monteto kovritaj de verdaĵoj fariĝis bruna, tial mi pensis, ke miaj okuloj difektiĝis.

La centro de la urbo Nagasaki estis en flamegaro. Baldaŭ ekfalis nigra pluvo, kaj faris

nigrajn striojn sur la ĉemizo.

Ni estis ordonitaj esplori la damaĝojn kaj iris al la kuirejo, magazeno kaj lavejo. Tie kolektiĝis ĉirkaŭ 30 lernantoj. Ili perdis la harojn kaj tiel serioze brulvundiĝis, ke mi ne povis scii, ĉu ili estas viroj aŭ virinoj. Mi donis akvon al ili, sed ili ne povis trinki ĝin, ĉar iliaj gorĝoj estis brulvunditaj.

Poste ni estis ordonitaj iri al la kremaciejo. Kava tereno, kie estis forbruligitaj barakoj, estis uzata kiel kremaciejo. Ni bruligadis po 40-50 kadavroj. Iu soldato legis sutron al ili.

La 10an ni estis ordonitaj iri al rifuĝejo. Tamen ĝi estis nur tereno kun sternitaj lankovriloj. Ne estis medikamento, do oni ne povis kuraci la suferantojn. Ni donis akvon kaj kaĉon al ili. Kiam homoj mortis, ni bruligis ilin.

Poste mi mem suferis pro akuta radiadomalsano kaj suferis pro alta febro kaj lakso. Mia amiko perdis la harojn, sur lia haŭto aperis purpuraj makuloj kaj la buŝo sangis. Li baldaŭ mortis, dirante, ke li atendos min en la alia mondo.

Post la milito mi laboris en la gubernio Ooita en la eduka kampo kaj rakontis mian sperton en Nagasaki al gelernantoj.

En tiu tago nur per unu atombombo multege da homoj mortis en la varmo de 3000 gradoj. Ja okazas eĉ nun militoj en la mondo, sed ne ekzistas aliaj armiloj krom atombombo, kiuj povas mortigi pli ol cent mil homojn momente, malnormaligas genojn kaj malfaciligas la vivadon. Nukleaj armiloj postulas mortojn eĉ en postaj generacioj. Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro atombombo du fojojn, do estas nia devo aboligi nukleajn armilojn.

Mi versadas poemojn pri mia sperto en Nagasaki. Unu el tiuj poemoj vi legu ĉe la dorsa kovrilpaĝo.

(En la tria tago post la katastrofo dum kremaciado de kadavroj, mia koro estis plenplena de kolero.)

4. Tero leviĝis, homoj forflugis, fajroj okazis

Verkita de s-ino Hanagaki Rumi, 79-jara, loĝanta en Kioto.

Tradukita el artikolo de la ĵurnalo Akahata (6an de aŭgusto 2019).

En 2003 mi partoprenis en la ceremonio por memori la mortintojn en Hiroŝima. Reveninte hejmen, mi komencis skribi raporton pri ĝi, kaj tiun momenton subite reaperis en mia kapo la sceno pri lanterno-flosado. Mi demandis min, kio ĝi estas. Mi estis subpremita de la revenantaj memoroj kaj tremante mi tenis min ĉe la lito de mia nepo.

Malgraŭ tiuj ŝokaj memoroj, mi finis verki raporton pri la ceremonio. Kiam mi relegis ĝin, mi ne povis legi ĝin pro larmoj, kaj kiam mi korektis la enhavon, denove nova memoro revenis. Tio estis terura momento.

La 6an de aŭgusto 1945, mi loĝis en la distrikto Misasa-Honmaĉi en la urbo Hiroŝima. Alarmo pri aeratako nuliĝis, do mi revenis hejmen kaj en la dua etaĝo de mia domo mi



Hanagaki Rumi

ludis. Kiam la atombombo estis faligita, mi sentis la teron leviĝi kaj poste venis terura bruego. Pro varmegaj ondoj kaj impulsaj ondoj fenestroj kaj kurtenoj estis forblovitaj. Kojno el meblo pikiĝis en mian kapon kaj la angulo de la ŝranko enpuŝiĝis en mian frunton.

Avino en lito estis forblovita kun lito, sed ne vundiĝis. Ankaŭ patrino en la ĝardeno kun mia frato sur la dorso estis forblovita, sed nenio serioza okazis al ili. Baldaŭ vidiĝis fajroj en diversaj lokoj. Onklino trovis tirĉaron kaj portis la avinon sur ĝi. Ni fuĝis en la najbaran bambuan arbaron. Ŝi trovis *geta*-ojn, lignajn sandalojn, por mi.

En la bambua arbaro estis kokinejo. Mi vidis senkapajn kokinojn, ankaŭ senkapan katon kaj multajn cikadojn mortaj sur arboj. Bambuaj folioj ekflamis, kaj bambuoj eksplodis kun krakadoj. Mi estis surprizita, vidante mian patrinon piki kadavrojn per stango. Ŝi provis forpeli kokinojn, kiuj bekpikis ilin.

Dum mi fuĝis, mi vidis pupon, kiu similis al la pupo, kiun mia patrino faris por mi. Ĝi bruletis. Mi sentis grandan malĝojon.

Kiam mia patrino reprenis mian fraton de sur la dorso, haŭto ĉe liaj sidvangoj deŝiriĝis, eble ĉar li ricevis varmegon de fajro. Ŝi tranĉis parton de sia vestaĵo, moligis ĝin en manoj kaj metis ĝin ĉe liajn sidvangojn.

Filo de mia onklino, Tojohiko, lernanto en la unua lernojaro, estis en la lernejo. Post tritaga serĉado ni trovis lin sur la riverbordo kaj tie bruligis lin. Multaj homoj plonĝis en la riveron, kaj mortinte ili estis portitaj al la maro kaj revenis pro tajdoj, kaj fine atingis la riverbordon. Mia onklino vizitis tiun lokon ĉiun jaron ĝis sia morto. Laŭ la riverbordo de Hiroŝima ofte vidiĝis tia sceno.

Mia patrino mortis en la aĝo de 84 jaroj pro kancero. Mi fartas bone, sed mia filino, kiu suferis pro renmalsano, fariĝis melankolia, sin mortigis. Mi kritikas min pro ŝia morto. Kiam mi aŭdas, ke miaj gefiloj kaj genepoj ne fartas bone, mi timas, ke mia elmetiĝo al radioaktiveco el la atombombo povis kaŭzi ilian malsaniĝon.

Mi nun agadas, rakontante mian sperton en kaj ekster Japanio. Por efektivigi sennuklearmilan mondon ni devas agadi energie. Ni estu la lastaj suferantoj pro nukleaj armiloj. La japana registaro rifuzis subskribi por la internacia pakto por aboli nukleajn armilojn, sed ĝi subskribu. La mondo mokas Japanion.

Foje mi vizitas la Pacparkon en Hiroŝima, kaj tiam mi kutimas fari unu aferon. Mi batetas la teron per bastono kaj salutas la mortintojn, verŝante akvon el botelo. Sub tiu parko estas multaj ostoj, kiuj ne estis kolektitaj. Mi alparolis ilin: «Vi sentis varmegon tiun tagon. Trinku akvon. Ni ĵuras al vi, ke ni neniam ripetos tiun eraron, uzon de nukleaj armiloj».



Jamaŭaki Joŝiroo

5. Mi rakontados pri teruro de atombombo

Verkita de s-ro Jamaŭaki Joŝiroo, 85-jara, loĝanta en Nagasaki.

Tradukita el artikolo de la ĵurnalo Akahata (30an de julio 2019).

Kiam komenciĝis la dua mondmilito, mi estis en la dua lernojaro de elementa lernejo. En Nagasaki. La milito ankoraŭ daŭris, kiam mi estis en la 6a lernojaro. En tiu somero Usono bombis Hiroŝima-on

kaj Nagasaki-on per atombomboj. Mia familio konsistis el 9 familianoj; gepatroj kaj 7 infanoj. Tiun tempon mia patrino rifuĝis al sia eksa familio kun siaj kvar gefiloj. La 9an de aŭgusto mia patro iris al la fabriko de elektra kompanio Micumiŝi kaj mia pli aĝa frato iris al fabriko por fari armilojn.

Kiam mi eniris en la manĝoĉambron de la verando kun mia ĝemela frato, dirante: «Mi estas malsata!», blua lumo trakuris la domon kun bruego. Kiam mi levis mian kapon, mi trovis, ke la muro falis, tegiloj kaj mebloj estis disĵetitaj sur la plankon kaj la tegmento malaperis. Mi povis vidi la ĉielon.

Unu horon poste mia frato revenis hejmen. Ni kune rifuĝis al la najbara ŝirmejo. Ĝi jam estis plena de virinoj kaj infanoj. Infanoj, kiuj estis ekster la domo, brulvundiĝis sur la nudaj korpopartoj kaj aliaj kriis pro pikvundoj de vitraĵoj.

Ni atendis mian patron dumnokte. En la venonta mateno ni trio iris al la fabriko de mia patro. Ĝi situis 500 metrojn for de la epicentro. Sur la stratoj multaj homoj kuŝis mortaj. En riveroj flonis multaj kadavroj. Mi vidis junulinon kun blanka zono en la rivero. Mi pli bone vidis ŝin kaj trovis, ke ŝi ne estis zono, sed intesto eliĝinta el ŝia ventro.

La fabriko de mia patro detruigis nur kun skeleto el feraĵoj. Mia patro fariĝis nigre ŝvelinta kadavro same kiel aliaj homoj. Ni bruligis lin surloke, kolektinte restintajn lignaĵojn. Ni preĝis por li, plektante la manojn. Kiam mi levis mian vizaĝon, mi vidis liajn piedojn en flamoj. Mi ne povis plu vidi tion. Homoj de la kompanio diris al ni, ke ni revenu la sekvantan tagon. En la sekvanta mateno ni iris al la kompanio. La korpo de mia patro ne estis plene bruligita. Kiam mi provis preni oston el la kranio, ĝi rompiĝis. Terurite ni forkuris. Ankoraŭ nun mi foje rememoras tiun scenon.

Post emeritiĝo, mi laboras kiel rakontisto pri la tragedio en «Pac-asocio de Nagasaki». Mi rakontas ne nur pri mia sperto, sed ankaŭ pri la teruro de atombombo, nome varmega lumo, eksploda ventego kaj radioaktiveco. Nur en la lasta jaro mi prelegis 50 fojojn. Pri la teruro de radioaktiveco, mi parolis pri miaj oftaj malsaniĝoj. Kiam mi estis 32-jara, mi enhospitaliĝis pro akutaj hepatmalsano kaj nefrito. Ekde tiu tempo mi enhospitaliĝis 15 fojojn antaŭ mia emeritiĝo. Mi opinias, ke tio estis kaŭzita de radioaktiveco el la atombombo. Tiutempe mi eniris en la urbon pli ol 10 fojojn.

Mi opinias, ke la tasko de la atombombitoj estas rakonti la kruelan realon de atombombo. Mi esperas, ke plej multaj ŝtatestroj vizitos la muzeojn de atombomboj kaj scios la realon de la damaĝoj, aŭskultante rakontojn de atombombitoj. Precipe mi forte deziras, ke la japana registaro montru sian decidon kontraŭ nukleaj armiloj. Mi tre bedaŭras, ke ĝi ĉiam sekvas la usonan politikon.

6. La japana registaro fanfaronas, sed nenion faras

Jene la japana registaro parolis ĉe la UN-Asembleo:

La japana registaro respondecas pri la vivo kaj proprietaĵoj de la japanoj taŭge alfrontas al la reala danĝero, sincere traktos la vojon al redukto de nukleaj armiloj, ludos la rolon de peranto inter landoj posedantaj nukleajn armilojn kaj landoj subtenantaj tiun pakton kaj strebos realisme, praktike kaj persiste por la celo.

Sed mi neniam aŭdis, ke ĝi faris ion por abolo de nukleaj armiloj. La ĉefministro Abe estas lojala hundo de Trump, do li ĉiam sekvas la mastron, neniam kontraŭbojante.

7. Apud stakigitaj kadavroj mi kremaciis mian patrinon

Verkita de s-ino Namiki Kajoko, 88-jara, loĝanta en Tokio.

Tradukita el artikolo de la ĵurnalo Asahi (19an de oktobro 2019).

Mia familio translokiĝis al Hiroŝima de Tokio, ĉar mia patro komencis labori en la filio de asekura kompanio en Hiroŝima. Komence ni vivis tre agrable en milda klimato kaj kun bongustaĵoj, sed baldaŭ la situacio fariĝis tre kriza. Ni ne sciis, kio okazos al nia vivo, tial la patrino ĉiam portigis al mi cent-enan monbileton kudritan en mian zonon, montris al mi kiel kuiri, kiel kudri, kiel porti pezajn pakaĵojn ktp. kaj ĉiam diris al mi: «Kiam ni gepatroj mortos, vi devos gardi viajn junajn fratinojn kaj revenu al nia hejmloko Tokio».

Kiam mi estis 14-jara, la urbo estis bombita per atombombo. En tiu tago mia patrino estis en la centro de la urbo, mobilizite por malkonstrui domojn por malhelpi fajron disvastiĝi okaze de aeratako. Mia patro estis ankoraŭ hejme kaj legis ĵurnalon. Mia juna fratino ial ne volis iri al la lernejo kaj restis hejme. Ankaŭ mi estis hejme, ĉar ne estis laboro en la fabriko de armiloj, al kiu la lernantoj estis mobilizitaj.

Kiam mi estis apud la fenestro por fari fajron en la forno, eklumegis. La fenestroj rompiĝis kaj pli ol 20 pecoj el la vitro pikiĝis en mian kapon. La patro eltiris min kaj mian fratino svenintajn el sub la detruita domo. Li, portante mian fratino sur la dorso, kaj mi nudpiede direktis nin al rifuĝejo, nome la najbara templo. Tie mi trovis mian patrinon. Ŝi brulvundiĝis sur la tuta korpo. Poste ŝi suferis pro lakso kaj sangado, kaj post 20 tagoj ŝi mortis. Ŝi diradis al mi: «Vi gardu viajn fratinojn».

En la najbara vaka tereno estis montoj da kadavroj, sur kiuj oni surverŝis benzinon por bruligi tiujn. Ni volis mem kremacii la patrinon, do ni kolektis brullignojn kaj kremaciis ŝin.

En la venonta jaro mi fariĝos 90-jara. Estas nur lastatempe, ke mi povis rakonti pri tiu pezega kaj obseda sperto.

Jen alia eseo verkita, kiam ŝi estis 80-jara, en 2014, temanta pri tio, kio okazis poste al ŝia familio:

Post la morto de mia patrino ni loĝis en kabano konstruita de mia patro najbare. Li sternis tavolo herbojn sur la planko kaj la kabano estis apogita per mallongaj lignoj, kaj ĝia tegmento estis kovrita per bruligitaj zinkitaj ladoj kolektitaj en la ruino. Mia patro amis montgrimpadon, kaj lia tia sperto utilis. Niaj najbaroj kaj parencoj sinsekve translokiĝis al siaj konatoj kaj parencoj, sed ni ne havis tian konaton, do ni restis tie ĝis la fino de oktobro.

Meze de aŭgusto mia fratino revenis de la rifuĝejo* en kampara vilaĝo kun instruisto, s-ro Jamada. Ŝi estis tre maltrankvila, ĉar povis okazi, ke ĉiuj ŝiaj familianoj mortis. Ŝi estis tre ĝoja, vidante min apud la eksa domo.

La 15an de aŭgusto, ne aŭdiĝis averta sireno pri aeratako. «Kial?», mi demandis min. Baldaŭ mi aŭdis, ke Japanio malvenkis. Mi estis ĝoja, ke mi ne plu bezonas timi pafadojn el aviadiloj. Eĉ nun mi bone memoras la pafadbruojn.

Oni diris, ke pro la veneno el tiu novstila bombo ne kreskos herboj dum la sekvantaj 75 jaroj sur la tero, sed post unu semajno jam ekkreskis herboj. Ni plukis ilin, volvotigojn

de batatoj, foliojn de kukurboj kaj ĉiajn manĝeblaĵojn. Ni kuiris ilin en ferkasko kaj uzis akvon elŝprucantan sur stratoj.

Pli kaj pli kuraciĝis vundoj de vitraĵoj sur la kapo. Ankaŭ en mia dekstra flanko enpikiĝis vitropecoj. Malgrandajn mi mem elprenis. Kiam la korpo kuraciĝis, la pecoj mem aperis kaj falis. Vundo sur la malantaŭo de la kapo estis iom serioza, sed ne estis medikamento hejme krom jodoformo. Mi iris al la kuracejo. Ankoraŭ nun mi sentas ion malnormalan tie.

Kiam mi revenis al Tokio du jarojn poste, mi vizitis la hospitalon de la universitato Tokio, sed la kuracisto forpelis min, pretekstante, ke li ne havas sufiĉan informon pri la atombombo. Mi volis kuracadon nur pri la vundoj de vitropecoj, kiuj ne havis rilaton kun la atombombo. Mi pensas nun, ke jam tiutempe komenciĝis diskriminacio al la atombombitoj.

Komence de septembro mi suferis pro serioza lakso. Mia patro iris al apoteko en la distrikto Eba, kiu ne suferis pro la fajrego post la bombado. Li aĉetis geranion kaj hejme infuzis ĝin en la ferkasko. La sekvantan tagon, dank' al ĝi aŭ dank' al mia forta korpo, mi saniĝis. Kiam mi resaniĝis, mi vidis la plenan lunon en malluma ĉielo. Ĝi donis al mi grandan kuraĝon.

Poŝto ekfunkciis. Mia patro estis okupita pro refunkciigo de la kompanio. Najbare estis mia samklasanino, kies patrino mortis en la malkonstruata laboro de domoj same kiel mia patrino kaj mortis kun siaj aliaj du filinoj.

Meze de oktobro ni translokiĝis al domo en la distrikto Kaita. En la unua etaĝo estis oficejo de la asekura kompanio kaj en la dua etaĝo ni loĝis. Mi komencis viziti la superan mezlernejon Kaita kaj miaj fratinoj vizitis la urban elementan lernejon. En Kaita najbaroj tre afable traktis nin. Ni povis reakiri homan vivon tie.

Mi ne povas forgesi diversajn spertojn en tiuj jaroj. Ni estas feliĉaj, ĉar neniu el ni malaperis. Mi sentas feliĉon, ĉar mi ne plu spertis militon dum la pasintaj 70 jaroj.

8. Senbraka pentristo pentras realon de la eksperimentejo de nukleaj bomboj



Karipbek Kuyukov

Tradukita el artikolo de la ĵurnalo Asahi (19an de oktobro 2019).

Kredenco ektemas kun bruetoj. Radio informas, ke okazis kutima eksperimento de nuklea bombo por pacelo. Ĝi estas eksperimentejo Semipalatinsk en Kazaĥio, kie Sovetio eksperimentis nukleajn armilojn pli ol 600 fojojn. 90 kilometrojn okcidente s-ro Karipbek Kuyukov naskiĝis sen brakoj. Tio estis influo de elmetiĝo al radioaktiveco. Li pentradis per peniko en sia buŝo homojn falintajn pro eksplodaj ventegoj, fungajn nubojn, amikon kun ŝvelaĵoj sur la vizaĝo ktp.

Lia patro estis ŝoforo. Kiam li naskiĝis, kuracisto rekomendis, ke li estu mortigita per veneno, sed la patro rifuzis tion. Liaj frato kaj fratino mortis tuj post la naskiĝo. «Najbare estis multaj infanoj sen brakoj kaj sen kruoj. Mi devis persvadi min, pensante, ke mi estas pli feliĉa ol ili, ĉar mi povas paŝi.» Tenante kraĵonon per piedfingroj, li desegnis pejzaĝojn de sia hejmloko.

Fininte la lernejon de librotenistoj en la aĝo de 20 jaroj, li fariĝis bovisto. Fine de la malvarma milito, en 1989, li partoprenis en la movado, kiu celas fermi la eksperimentojn kaj ekspoziciis en Usono kaj en Japanio siajn pentraĵojn temantajn pri la nukleaj eksperimentoj. Okaze de la 70-jariĝo de la komenciĝo de la nuklea eksperimentado en Kazaĥio, en septembro li estis invitita al Japanio por la internacia konferenco kontraŭ nukleaj armiloj organizita de la kazaĥia ambasadejo.

Li loĝas kun sia fratino 7 jarojn pli maljuna. Li uzas saĝtelefonon per piedfingroj. Li havas ĉirkaŭ 3000 amikojn en Facebook. Al la demando «Se vi povos renaskiĝi, kion vi volas fari?», li respondis, «Mi ne elektos profesion. Mi plej volas havi sanan korpon. Mi forte deziras, ke ni estu la lastaj homoj, kiuj suferas pro nukleaj armiloj.»

Jen resumo de lia parolado en la internacia konferenco «Konstruado de mondo libera de nukleaj armiloj» okazinta en Kazaĥio la 29an de aŭgusto 2016:

Estas terure scii, ke dum la 40 jaroj okazis 470 nukleaj eksperimentoj. La loĝantoj en Semipalatinsk tiun tempon eliris el sia domo por vidi la eksperimentojn. Ili tute ne sciis pri minaco al sia sano, nek pri la negativaj konsekvencoj pro la krimoj faritaj kontraŭ ili. La loĝantoj estis traktitaj kiel kobajoj. Esploroj pri la flaŭro kaj faŭno estis faritaj. Oni diris, ke radioaktiveco ne influas la flaŭron. Kiel terura mensogo! Radioaktiveco kaŭzas kanceron kaj leŭkemion. Pli terure radioaktiveco influos 5 aŭ 6 generaciojn.

21 jarojn antaŭe la eksperimentejo en Semipalatinsk estis fermita dank'al la prezidento Nazarbajev. Mi estas fiera pro tio, ke mi loĝas en Kazaĥio, la unua lando, kiu forĵetis nuklean frenezecon kaj agadas kiel valora ekzemplo por sennuklea mondo. Mia ĉefa misio estas fari ĉion ajn por ke la homoj kiel mi estu la lastaj viktimoj de nukleaj eksperimentoj. Mi daŭre alvokados al ĉiuj homoj ĝis mia morto, ke ni havu sekurecon sur nia terglobo. Niaj voĉoj estu unu forta voĉo. Ni postulas eternan ĉesigon de nukleaj eksperimentoj.

9. Nagasaki, kiun mi vidis en la aĝo de 10 jaroj



IMOHIRA Sakue

Rakontita de s-ino ŜIMOHIRA Sakue, 87-jara, loĝanta en Nagasaki.

Tradukita el artikolo de la ĵurnalo Asahi (24an de oktobro 2019).

Jam pasis 40 jaroj post kiam mi komencis rakonti pri la teruro de nukleaj armiloj. Ankaŭ nun mi rakontas al la lernantoj, kiuj vizitas la urbon Nagasaki.

Kiam mi estis 10-jara en la elementa lernejo Ŝirojama en Nagasaki, mi estis atombombita. En tiu aŭgusto preskaŭ ĉiun tagon sirenoj alarmis nin pri la aeratako de usonaj bombaviadiloj, tial mi pasigis multajn horojn en la ŝirmejo 500 metrojn for de mia hejmo en la distrikto Aburagi. La distrikto situis 800 metrojn for de la epicentro de la atombombado. Mia patro laboris en la urbo Isahaja kiel militlaboristo. Ĉiun matenon li ekiris je la 4a matene kaj revenis hejmen je la 10a vespere.

La 9an de aŭgusto, matene sireno alarmis nin pri aeratako, sed mi ne volis iri al la ŝirmejo kaj ludis en la domo apud la patrino. Ŝi diris al mi: «Mi antaŭsentas, ke hodiaŭ vere okazos aeratako», kaj hastigis min kaj mian 8-jaran fratinon kun 1-jara nevo al la ŝirmejo. La patrino restis hejme, preparante akvon kaj forprenante la fenestrojn

kontraŭ la ebla aeratako. Ni reciproke adiaŭis, svingante manojn, kaj tio estis la eterna adiaŭo inter ni.

Post iom da tempo la alarmo estis nuligita. Knaboj gaje ekstereniris. Mi, mia fratino kaj la nevo restis en la ŝirmejo. Subite lumegis kaj aperis nigraĵo en miaj okuloj. Mi svenis. Tio okazis je la 11a kaj 2 minutoj. Ni estis en la fundo de la ŝirmejo, do ni evitis elmetiĝon de varmega radio. Kiom da minutoj pasis? Mi estis vekita de iu kaj rekonsciiĝis. Tie mi vidis mizeregajn homojn pikitajn de vitropecoj sur la tuta korpo kaj homojn en ĉifonaj vestaĵoj. Tiaj homoj sinsekve eniris en la ŝirmejon. Ili ĉiuj estis tiel vunditaj kaj preskaŭ nudaj, ke mi ne povis rekoni ilin.

Mi aŭdis kriojn «Panjo, panjo!», kaj subite mi rememoris mian patrinon kaj kriante ekploris. Neniu el mia familio aperis al la ŝirmejo. Kio okazis ekstere? Mi komprenis, ke io ne imagebla okazis.

La aero en la ŝirmejo pli kaj pli malbonodoris kaj sufokis nin. Vespere aŭdiĝis voĉo de mia patro. «Venis Paĉjo!» Tiun momenton mi kaj mia fratino denove ploregis. Patro diris al ni: «Ne restu ĉi tie. Vi mortus!», kaj ni ekstereniris. Tie estis monto da kadavroj. Ĉe la enirejo de la ŝirmejo kuŝis brulvunditaj homoj kun pendantaj haŭtoj kaj kun ĝemadoj. Ni paŝis, atentante, ke ni ne piedpremu mortintojn kaj mortantojn.



Tie kaj ĉi tie estis fumoj de kremaciado.

Kiam la patro sciis, ke miaj patrino kaj fratino ne troviĝas, ni iris al la distrikto de mia domo. La distrikto estis en flamegaro. En la sekvanta tago ni denove iris al la distrikto. Ni apenaŭ rekonis nian domon dank' al la restinta betona pordo. Inter la ruinaĵoj vidiĝis kadavro. Ĝi estis mia 22-jara fratino. Mirakle ŝia vizaĝo estis sen vundoj. Post du tagoj ni trovis mian patrinon en la najbara domo. Ni rekonis ŝin per ŝiaj orplakitaj dentoj. Kiam mi tuŝis la nigre bruligitan korpon, ĝi peciĝis. Ni kolektis lignopecojn el la ruino kaj bruligis ilin. Tie kaj ĉi tie estis fumoj de kremaciado.

Mia plej aĝa frato mortis en la maro de Filipinoj kiel kamikazo. Mia dua frato, studanta medicinon, tute ne vundiĝis, sed eksuferis pro sangado kaj laksado, kaj vomante flavaĵon, mortis post 4 tagoj. Mia juna fratino, kiu estis kun mi en la ŝirmejo, pluvisis. Tamen, kiam ŝi estis 18-jara, ŝi estis operaciita je la ĉekumo, kaj la vundo ne fermiĝis eble pro manko de blankaj sangoglobetoj pro la radioaktiveco. Ŝi fariĝis tro nervoza pro malbonodoro el la vundo, kaj kiam ŝi estis 19-jara, ŝi mortigis sin sub trajno.

Mi komencis paroli pri mia sperto en Nagasaki antaŭ 40 jaroj, ĉar mi ekpensis, ke rakonti tiun tragedion estas devo de postvivintoj. Troviĝas multaj homoj, kiuj ne scias la realon en Nagasaki kaj Hiroŝima.

Kiam mi aŭdas iujn elparoli pri ebleco uzi nukleajn armilojn aŭ movon por produkti uzeblajn nukleajn armilojn, mi estas plena de kolerego. Granda urbo povas ruiniĝi per unu nuklea armilo. Eĉ se ni postvivas la katastrofon, ni ne povas vivi homece kun homa digno dum la tuta vivo, suferante pro vundiĝo, cikatroj kaj la perdo de niaj familianoj.

Ni devas nepre aboli tiajn armilojn.

Tamen estas ne malmultaj landoj, kiuj posedas aŭ volas posedi nukleajn armilojn, eble pro senscio pri la vera teruro de la nukleaj armiloj. Tiuj, kiuj ne povas kompreni, kiel granda tragedio ekestos el la uzo de nukleaj armiloj, priparolas la uzon senpense.

Senscio estas problemo ankaŭ en Japanio. Kiam ni atombombitoj formortos kaj neniu povos rakonti pri la teruro de la nukleaj armiloj, ekestos vera krizo. Tial mi rakontadas mian sperton al lernantoj por semi la kontraŭatombomban ideon. Aperas knabinoj en la mondo, kiuj kontraŭas la terglobo varmiĝon kaj batalas por paco. Mi esperas, ke ili, ricevante la semojn, kiujn mi semas, heredos la torĉon de paco kaj abolo de nukleaj armiloj.

Noto :

* Tiun tempon la registaro ordonis, ke la elementlernejoj en grandaj urboj rifuĝu en kamparaj vilaĝoj. La vivo tie estis tre severa por junaj lernantoj pro manko de sufiĉaj manĝaĵoj kaj pro manko de prizorgado de gepatroj. Post la milito iuj trovis, ke ĉiuj iliaj familianoj mortis en atombombado aŭ aeratako. Ili fariĝis orfoj.



Bildo desegnita de atombombito

Enhavtabelo

1	Bildo kiel enkonduko al «Esprimlibero per desegnoj»	<i>Sergo Sir'</i>
2	Kolofono	
3	Prezento	<i>Redaktoskipo</i>
4	Esprimlibero per presdesegnoj	<i>Marcelo Redoulez</i>
18	Vatto	<i>Huzimaki Ken'iti</i>
23	Rusa inteligentularo – disfloroj, faloj kaj renaskiĝoj	<i>Nikolao Gudskov</i>
42	Esperanto kaj la Komisariato pri Propagando de la Kataluna Registaro dum la Hispana Enlanda Milito (1936-1939)	<i>Ester Boquera Diago</i>
50	Buñuel-Lorca-Dalí [1]	<i>Miguel Fernández</i>
64, 76	Tragedio pro la atombomboj en Hiroŝima kaj Nagasaki	<i>Hori Jasuo</i>

...Tragedio pro la atombomboj en Hiroŝima kaj Nagasaki.

Ne estingu la subbrulojn

**La 11an de aŭgusto 1945
Bruligita urbo Nagasaki.**

**Tie kaj ĉi tie
ankaŭ hodiaŭ
subbrulas
multaj fumoj.**

**Foje nigre, foje flave,
ŝanĝiĝas la koloroj.**

**En la kavo apud la strato,
apud la rompiĝinta muro,
tavole kuŝas kadavroj,
Aĥ tiuj kadavroj brulas.**

**En ventoj
fumoj kurbiĝas,
foje rektiĝas,
fumoj, fumoj,
ĉu ili estas**

**aŭ bedaŭro fortiĝanta eĉ post la morto,
aŭ senvoĉaj voĉoj
vokantaj gepatrojn kaj gefilojn ?**

**Sennomaj homoj,
ĉu vi
jam brulmortigitaj
per varmegaj lumoj el la atombombo,
nun, denove, en tiu kavo,
brulas kiel fajro ?**

**Senvoĉaj homoj,
el tiu ĉi infera mondo,
kie ĉio perdiĝis,
profundan malĝojon,
bolantan koleron,
kolektu kaj bruligu,
kaj neniam estingu la subbrulojn.**

Alta estas la ĉielo de Nagasaki.

Tanaka Joŝimicu



Pentraĵo farita de Karipbek Kuyukov